



András Bencsik
Atilo, reĝo de la skitoj



Hungaria Esperanto-Asocio

e-libro HEA

András Bencsik
Atilo, reĝo de la skitoj

Legendo en du aktoj

*Saluton al vi, Atilo, granda reĝo de la skitoj¹,
filo de Bendeguzo, nepo de la granda Magoro²,
sango de la potenca Nimrodo,
naskita en Edeso kaj plenkreskinta en Sikambrio,
kiu estas la suvereno de la hunoj kaj hungaroj,
medoj, ĝermanoj, gotoj, keltoj, panonoj, danoj
kaj pliaj cent popoloj,
teruro de la tuta tero,
skurĝo de Dio,
mentoro de la kristanoj!*

Hungaria Esperanto-Asocio
2026

¹ Skitoj: en pli vasta senco stepaj, arkpafaj rajdpopoloj inter Dono kaj Danuba delto.

² La fratoj Hunor kaj Magor estas laŭlegende la prauloj de la hunoj kaj hungaroj; la komunan originon ankaŭ genetikaj esploroj pruvis.

Atilo, reĝo de la skitoj

Originala titolo: Attila, a szkíták királyá
in: Aurum Coronarium, A Szent Korona legendás története
Eldonis: Artamondo kiadó, 2024

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio, 2026

Titolpaĝo: Jozefo Horvath
(sceno el la usona-litova filmo “Atilo, la skurĝo de Dio” kun G. Butler)

ISBN 978-963-571-546-6

CC BY-NC-ND

PERSONOJ:

Atilo la reĝo de la skitoj
Leono papo
Gencelo..... legendeca ŝamano aŭ mago
Atanzio..... la ariana ĉefepiskopo de Raveno
Soardo..... skita komandanto, konfidenculo de Atilo
Prospero Tiro sekretario de papo Leono
Genadio Avieno romia ekskonsulo el la papa akompano
Memio Emilio Trigezio..... romia eksprefekto el la papa akompano
Edekono..... skira reganto, kortegano de Atilo
Odoakero infano ĉ. dek-jara, filo de Edekono
Krimhildo.....la vidvino de Sigfrido el la *Kanto de la
Nibelungoj*, burgunda princino
Guntero..... frato de Krimhildo, burgunda princo
Ĉaba.....filo de reĝo Atilo

Soldatoj, gvardianoj, pastroj, popolo

Okazas sur la bordo de la rivero Sieve, ie nord-oriente de Florenco, duonvoje inter Raveno kaj Romo, en la tendaro de la hunoj, poste sur la placo de Raveno antaŭ la preĝejo Sankta Apolinario, poste en la preĝejo, meze de la kvina jarcento, en septembro de 452.

UNUA AKTO

1a sceno

Tendaro de Atilo. Mallumas sur la scenejo. Enpaŝas blankvesta, blankhara kaj blankbarba maljunulo, malrapide antaŭenvenas ĝis la ribalto. Lumo ĉirkaŭas lin. Longe li esplorigardas la publikon, kvazaŭ li serĉus iun, aŭ kvazaŭ li volus trovi tiun, kiu plej atentus lin.

*Dum li recitas la poemon *Pri la nombroj* de Attila József, post lia dorso laŭgrade lumiĝas la sceno, la tendaro de la hunoj, la placo antaŭ la giganta tendo de reĝo Atilo, sur la bordo de la rivero Sieve. Fone videblas kvin flagoj kun oritaj drakokapoj sur lancopintoj.*

Gencelo

Ĉu vi jam lernis pri la nombroj?

Voĉo el la spektejo

Ni lernis!

Gencelo

(ekridetas) Ja certe, ankaŭ la homoj estas nombroj.

*Ja estas nombroj mem la homoj.
Kiel multaj unuoj enĉajere,
Sed ĉi tiuj per si mem kalkuliĝas,
Kaj miras treege la ĉajero,
Ke ĉiu pensas nur pri si mem,
Volas superi la aliajn,
Kaj senracie aparte potenciĝas,
Kvankam eĉ se farus tion senfine,
La unu restas tiele nur unu,
Kaj ne obligas unu, nek onigas.*

Voĉo el la spektejo

Kion do ni faru?

Gencelo

*Vi homoj, ekregu do vin mem,
Kaj antaŭ ol ĉio
Komencu per la plej simpla afero –
Adiciigu do,
Por ke enorme plimultiĝante,
Dion mem, kiu estas senfino,
Vi iamaniere alproksimigu!*³

*Forironte li rimarkas kaj atente pririgardas la du romianojn, sed tiuj
kvazaŭ ne vidus lin.*

*Dion mem, kiu estas senfino,
Vi iamaniere alproksimigu! (for)*

La du maljuniĝantaj aŭtoritatuloj, ekskonsulo Avieno kaj eksprefekto Trigeccio el la akompano de papo Leono, enportas ĝeme-pene keston de mezaj dimensioj. Unue ili metas ĝin en angulon, rigardas ĝin explore, la loko ne plaĉas al ili, prefere ili transportas ĝin en la alian angulon, poste tamen transflanken, tiras ĝin antaŭen, poste ili ekirus kun ĝin al la alia flanko... ili volus kaŝi ĝin en sekuran lokon, kiam la enpaŝanta Soardo, komandanto de reĝo Atilo ekvidas ilin. Soardo estas belaspekta, fortavoĉa juna viro. Sur lia flanko pendas milde arka sabro, konforma al la estraj sabroj de la avaroj, kun bela, orgarnita, leda pafarkujo, pendigita sur lia alia flanko. Sur lia dorso sagoj en ujo. Soardo surhavas mallongan lanpalton kaj pantalonon, kurtatubajn botojn. Sub la lanpalto videblas butonebla ĉemizo. Lia vesto diferencas de tiuj de la du romiaj patricioj, kiuj portas tunikojn kaj togojn. La tuniko de Avieno estas malhel-blua kun blanka togo super ĝi. La tuniko de Trigeccio estas blanka, lia togo bruna. Ili portas sandalojn.

Soardo

Kien vi puŝas vin, homfratoj? (La du aŭtoritatuloj paraliziĝas.) Kia keso to ĝi estas? Ĉu vi alportas aŭ forportas ion?

³ Traduko de Jozefo E. Nagy.

Avieno

Ho, ĝi estas nur simpla vojaĝkesto. Entenas uzitajn vestojn kaj kelkajn aĵetojn.

Trigecio

Ni venis delegacie al la reĝo de la skitoj. Ni estas el la akompano de Lia Sankteco papo Leono. Ni alportis donacojn al reĝo Atilo.

Soardo

Ĉu uzitajn vestojn? Kaj ĉu la mezuroj konformas?

Avieno

Ni celis bagatelaĵojn. La vestoj necesis por ŝirmi la bagatelaĵojn, kiujn ni intermetis.

Trigecio

Por ke ili ne damaĝiĝu dumvoje.

Soardo

Bagatelaĵoj... (*okulmezuras la du romianojn*) Kiujn mi povas honori en la sinjoroj?

Avieno

(*klinas sin*) Mi estas Genadio Avieno, por via honoro. Iama romia konsulo. Mia familio havas originon de kvincent jaroj ĝis mia glora praulo, generalo Marko Valerio Mesalo Korvino. Korvino, kiel vi scias, signifas korvon.

Trigecio

(*klinas sin*) Mi estas Memio Emilio Trigecio. Iama romia prefekto.

Soardo

(*klinas sin*) Mi estas Soardo el la gento Aba. La unua komandanto de reĝo Atilo. Por kia celo vi venis vizite en la tendaron de la skitoj?

Avieno

Ni akompanas papon Leono, kiu venis sendita al via sinjoro.

Soardo

Mi aŭdis prie. Oni diras, li estas saĝa homo. Oniaserte li komprenas eĉ

la lingvon de la birdoj. (*paŝas pli proksimen*) Mi ĵetus rigardon en tiun keston.

Avieno

Pardonu min, sinjoro, sed ne estus konsilinde...

Trigecio

Tio estas nome diplomatia afero. Statas tiel, ke malfermi ĝin ankoraŭ ne tempos.

Soardo

Ĉu ne tempos? Ĉu mi alvoku la gvardion? Aŭ la arkpafistojn? Kion vi kaŝas?

Avieno

Ho, sinjoro, ni devus trakti tion prefere diskrete.

Soardo

(*ĉiam pli incitite, kun minaca tono*) Ĉu diskrete?

Trigecio

(*paŝas rapide antaŭ Avienon*) Pardonu, sinjoro, la malfidemon de mia kunulo! Tro multe da malbonaj spertoj lin trafis en la vivo... Ĉu vi nepre volas vidi ĝin?

Soardo

Nepre (*metas la manon sur la fuston de sia glavo*).

Avieno kaj Trigecio interrigardas.

Avieno

Do bone. Estu laŭ via deziro. Sed promesu, s-ro komandanto, ke ĝis ties tempo alvenos, vi ne malkaŝos, kion vi vidis en la kesto. Lia Sankteco celas ĝin kiel surprizaĵon por via reĝo. Ne estus ĝuste, se la enhavo de la donaco antaŭtempe diskoniĝus. Pro certaj kaŭzoj, pri kiuj nun kaj ĉi tie ankoraŭ ne estus konsilinde paroli pli detale, povus kaŭzi diplomatiajn komplikaĵojn ĉi tiu, ĉi tiu...

Soardo

Bagatelaĵo.

Trigecio

Tio, jes tio!

Avieno

Tio estas bagatelaĵo.

Soardo

Ĉu vi fine malfermos ĝin?

Avieno kaj Trigecio malŝlosas per po unu ŝlosilo la serurojn de la kesto kaj singarde levas ĝian kovrilon. Soardo enrigardas.

Mi vidas nenion.

Trigecio flankenmetas la vestojn en la kesto, tiam krepuskanta lumo plenigas la malfermitan keston. Soardo konsternite rigardas ĝin.

Fulmo kaj tondro! Kio ajn ĝi estu, ĝi estas vere bela! Neniam mi vidis ion kompareblan!

Avieno

(singarde remetis la vestojn, la lumo estingiĝas, poste mallevas la kovrilon de la kesto) Via grandeco povis vidi, ke ĉi tiu bagatelaĵo estas efektive eksterordinare valora donaco. Vi estas la unua, kiu povis vidi ĝin propraokule. Sed mi petas vin, komprenu, ke pli ni ne povas diri. Kredu, alvenos la momento, kiam vi ĉion ekscios, kaj mi certas, ke vi estos kontenta.

Trigecio

Vi iĝos atestanto de grandaj aferoj.

Soardo

Ŝajnas tiel. Tamen por intertempe alportu la keston en mian tendon! Tie ĝi estos en sekureco, ĝis alvenos la granda momento, kiel vi promesis. Kaj poste ni ion glutos, ĉar mi malsatas. Eble ankaŭ kelkaj gutoj da trinkaĵo troviĝos por ni. Venu kuraĝe! Vi estas miaj gastoj. *(for, la du romianoj sekvas lin kun la kesto)*

Trigecio

(elirante flustras al Avieno) Mi ja diris, ĉu, ke li estas brava homo!

Avieno

(same flustre) Vi ja diris nenion.

2a sceno

Samloke. Enpaŝas Atanzio, akompanata de dek-jaraĝa knabeto Odoakero. Atanzio estas seka viro, ĉirkaŭ kvindek-jara, eleganta; surhavas bizancstilajn veston kaj mantelon kun ĉapo sur la kapo.

Edekono surhavas skitajn ledveŝton kaj pantalonon, sed sur ledrimeno, pendanda de lia ŝultro, li portas romian glavon. Odoakero estas en ĉiutaga vesto.

Atanzio

(ĉirkaŭrigardas) Ĉi tie ni povas interparoli en sekureco. Kiel mi diris, taskas al vi, Edekono, ke la reĝo neniel renkontiĝu kun episkopo Leono, ĝis li anoncos la verdikton. La katolikoj devas pere. Kun aparta konsidero de tiuj du ruzaj maljunulaĉoj Avieno kaj Trigecio. Mi ne scias, kion ili turnadas en la kapo, kial ili decidiĝis fari ĉi tiun danĝeran vojaĝon, sed mi certas, ke ili elteksis ion kontraŭ ni.

Edekono

La reĝo jam engaĝis sin por vi, episkopa moŝto.

Atanzio

Mi estas ĉefepiskopo.

Edekono

(klinas sin) Kiel vi deziras, ĉefepiskopa moŝto. Mi trankviligas vin, apenaŭ ni forfumumis la herezulojn el Raveno, same ni forfumumos ilin ankaŭ el Romo.

Atanzio

Ne sufiĉas. Oni devas ekstermi ilin en la tuta imperio. Per ĉiuj rimedoj, ajnakoste. Eĉ infanojn oni ne devas ŝpari, ĉar se ili plenkreskos, ili povos venĝi sin pro la murdo de siaj gepatroj. *(rimarkas Odoakeron)* Kiu estas ĉi tiu infano?

Edekono

Mia filo Odoakero⁴.

Atanazio

Frapu en mian manon, knabo! Kresku granda! Akiru multon, kiel via patro! Kiu scias, foje vi povos iĝi eĉ imperiestro! (*ridas ironie*) Imperiestro de la orientaj stepoj! Hahaha!

Edekono

Atentu, sinjoro, la sorto aŭdos vian mokon kaj koleriĝos pro tio, kion vi diras! Miaj prauloj estis regantoj de la vandaloj, kaj ankaŭ mi mem estas reĝo, se vi ne scius. Ni estas ne stepaj trampoĵoj kiel la skitoj.

Atanazio

Jes ja, mi scias. Granda homo vi estas, Edekono. Naskita por regado, ja kapo de nombre sensignifa, sed ambicie des pli aspirema vandala tribo. Kiel reĝo vi balaas la korton de reĝo Atilo. Vere honoriga kaj certe enspeziga ofico. Kvankam vi akceptis de Teodozio kvindek funtojn da oro, por murdi vian mastron. Mi vidis en Bizanco ankaŭ la palacon, kiun vi elektis por vi. Sed poste vi denunciis prefere Teodozion al Atilo, kiu terure furioziĝis. Ho jes, tio venigas al mi en la menson, kio okazis al la oro?

Edekono

Venenita estas via lango, ĉefepiskopo Atanazio. Mi vidas, hodiaŭ vi estas en aparte pika humoro. Sed miaj aferoj neniom tuŝas vin. Mi fidele servas reĝon Atilo.

Atanazio

Nu jes. Depende... Nu, sed gravas, ke nun ni estas aliancanoj. La glora armeo fine ekmarŝis al Romo, por forbalai la herezulojn, sed ĉi tie ĝi ial ekkampadis, kaj nun ni nur atendas, ade atendas. Kaj tio ne plaĉas al mi. Dume la ruza Soardo trapredis, fronte de siaj trupoj, Sud-Italion, sed mi vetriskus mian kapon, ke li havis pli da farendoj. Li ĉirkaŭflaradis ĉiuflanke, kvazaŭ li serĉus ion. Aŭ ĉu iun?

⁴ Odoakero (433-493): ĝermandevena militestro, faligis la lastan romian imperiestron Romulo Aŭgustulo kaj fariĝis reĝo de Italio.

Edekono

Ni parolu prefere pri la negoco. Ĉu vi tenas vin al via promeso?

Atanzio

(*ĉirkaŭrigardas*) Kion mi diris, mi ja diris (*ĵetas rigardon al la infano*). Nun jam elsendu la knabon!

Edekon

(*al sia filo*) Ek, Odoakero! Rigardu niajn ĉevalojn! Tiuj pigraj servistoj certe jam dormas. Instigu ilin per kelkaj piedfrapoj! (*Odoakero elkuras.*) Nun vi jam povas paroli. Atanzio.

Atanzio

Ĉi tiu nuna imperiestro... (*ironie*) Dio donu al li longan vivon! Jam ne longe li tiros sin. Li iom malsanadas.

Edekono

Ĉu li ne havas bonajn medikamentojn?

Atanzio

Nu, ĝuste tio tuberas, li havas eĉ tro bonajn. De ili li iĝas ĉiam pli malsana (*rikanas malice*). Sed li prenas ilin, ĉar lia kuracisto instigas lin. La ĉielo do baldaŭ vokas al si Valentinianon la 3an (*nemiskompreneble movas la manon preter sia kolo*). Kaj tiam senatoro Petronio Maksimo paŝos lialoken. Kaj tiu estas mia homo. Kaj kiel mi promesis, vi ricevos de li konsulan oficon. Kaj via filo, se li ĝisvivos la plenkreskulan aĝon, povos edzinigi patrician filinon.

Edekono

Se li ĝisvivos... frostoj trakuras mian dorson, dum mi aŭskultas vin.

Atanzio

Ba! Kial? Ne timu min! Vi ne troviĝas en mia listo. Tamen tenu vin al via promeso, ĉar se ne, vi povos facile enlistiĝi, kaj ankaŭ via familio. Leono devas morti. Se eblas, jam hodiaŭ. Sed ni flankeniru, ĉar iuj proksimiĝas. (*ambaŭ for*)

3a sceno

Samloke. Enpaŝas Guntero kaj Krimhildo.

Krimhildo

Ne, kara frato, la tempo nenion ŝanĝas. En mia koro Sigfrido vivas, kvazaŭ li estus nur forveturinta. Mia menso scias, ke li estas mortinta jam de dek du jaroj, sed mia koro reatendas lin.

Guntero

Dek tri jaroj, Krimhildo. Jam dek tri jaroj pasis post la morto de la heroa Sigfrido, kiun ankaŭ mi funebras, sed foje vi devas delasi lin. Nun vi estas ankoraŭ juna kaj bela. La naturo volas, ke vi ree amu kaj ree iĝu feliĉa flanke de brava viro. La sorto kreis vin ne por lamentado kaj funebro.

Krimhildo

Jes ja! Mi kredis, ke mi naskiĝis por amo, mi kredis, ke mi estos enamiginta edzino kaj patrino flanke de brava viro, sed la destino faris min demono de la venĝo. Neniam mi forgesos lin. Kaj neniam mildiĝos en mi la venĝemo kontraŭ liaj murdintoj.

Guntero

Karega fratineto! Venĝemo venenas la animon.

Krimhildo

(incitite) Mi scias! Kaj maljunigas la korpon... Milfoje vi ripetis. Kaj ja rigardu min! Kiel faltita estas mia haŭto, kiom da sulketoj ĉirkaŭas miajn okulojn! Hodiaŭ matene mi malkaŝis blankajn harojn inter miaj bukloj... Jes, Guntero, venĝemo damaĝas la virinan belon, sed mi malgraŭe ne povas forgesi. Kaj neniam mi pardonos. Neniam! Neniam! La sango de Sigfrido krias por venĝo. Mi fariĝis malica sorĉistinaĉo, Guntero. Sangosoifa, diabla virinaĉo. Krimhildo, la animita knabino, kiu adoris la heroan Sigfridon, mortis kune kun sia amato, kaj ŝialoken paŝis la senindulga Krimhildo, kiun viroj, se ili volas bonon al si, prefere timu.

Guntero

Tamen hodiaŭ matene, prepariĝante veni ĉi tien, en la tendaron de la reĝo, tra duonhora vi kombadis la harojn, elektadis inter viaj roboj, ne domaĝante la ruĝigilon por viaj lipoj.

Krimhildo

Ĉar mi estas virino. Kion komunan tio havas kun venĝemo? Kelkfoje vi havas ete vastan horizonton, Guntero.

Guntero

Pardonu min, fratineto! Mi volis nur diri, ke ĉi tie, en la tendaro de la skitoj videblas multaj bravaj militistoj. Nuraj elstaraj kavaliroj, multaj admirindaj herooj, kelkaj ankaŭ supermezure riĉaj. Ili plaŭdas en oro kaj diamantoj. Ĉu eĉ unu ne gajnis vian plaĉon?

Krimhildo

Kruduloj el foraj stepoj. Ili tempeste galopas kaj ĝojkriadas, ekvidante belan virinon. (*moke*) Ho he! Ujujujuj!... Ba! Sigfrido estis reĝo kompare kun ili.

Guntero

Tamen ili apartenas al la kortego de la mondreganto. Ni troviĝas inter militistoj de reĝo Atilo. Faru almenaŭ tiom por mia kontento, ke vi ne kovras viajn okulojn. Promesu, ke vi alĵetos rigardon, se brava kavaliro ĝentile salutas vin. Ne surĉevale, sed kiel decas, surpiede, riverencante. Kaj se vi alridetos lin, viaj okuloj brilos pli bele ol la suno, kaj ne troviĝos bravulo, kiu kapablos kontraŭstari ĉi tiun brilon.

Krimhildo

Ho, Guntero, karega mia frato! Kiom da amo loĝas en vi al mi. Se vi ne ekzistus, mi jam delonge estus forĵetinta mian vivon.

Envenas Soardo. Li paŝas aŭtoritate. Ŝajnas, li serĉas iun. Li estas solene vestita. Lia vesto plenas de glimantaj juveloj, liajn botojn kaj ledzonon ornamas orgarnaĵoj, ankaŭ lia glavingo lukse brilas. Sur lia skita kapornamo videblas riĉa neĝblanka plumo, en kies ingo radias enorma, orkadrita juvelo. Soardo montras tre imponan vidon. Li preterirus ilin, kiam Guntero alparolas lin.

Guntero

Saluton al vi, grandsinjoro! La burgundia Guntero kaj lia fratino Krimhildo honore salutas vin.

Soardo

(haltas, okulmezuras ilin) Bonan tagon! Pri kio mi povas helpi vin?

Guntero

Ni volus veni antaŭ la reĝon, por esprimi nian omaĝon kaj peti lian patran subtenon.

Soardo

En kio?

Guntero

Pardonu, sinjoro, kiel vi komprenas tion?

Soardo

En kio la reĝo subtemu vin?

Guntero

Mia fratino, kiu staras apud mi, Krimhildo, princino de Burgundio, antaŭ dek tri jaroj perdis sian edzon, kiu falis viktime de murda konspiro. Kaj la konspirantoj, la murdintoj eĉ hodiaŭ vivas nepunataj.

Soardo

Aha... Ĉu vi venos al la festeno?

Guntero

Al kiu festeno?

Soardo

La granda reĝo donas hodiaŭ vespere brilan festenon. Ni atendas tre multajn kaj nobelajn gastojn. Certe pro tio vi venis.

Guntero

Nu, ne ĝuste pro tio...

Krimhildo

(intermetas) Jes ja. Ni venis por la festeno. Ĉu vi malkaŝus vian nomon,

glora kavaliro?

Soardo

Mi estas Soardo. La unua kapitano de reĝo Atilo. Kion vi diris, kiel vi nomiĝas?

Krimhildo

Ne mi diris, mia frato malkaŝis mian nomon. Mi estas Krimhildo, bur-gunda princino.

Soardo

Do tiam rapidu, princino Krimhildo, faru vian tualeton, surmetu vian plej belan robon, kombu vin bele, ne malutilos ankaŭ, se vi iom lavos vin, ĉar hodiaŭ vespere ĉiu montros sian plej belan aspekton antaŭ la reĝo. Nu, ĉion bonan, klopodu! Vespere ni renkontiĝos. (*Soardo for*)

Krimhildo

Krudulo.

Guntero

Tio estas eble troigo.

Krimhildo

Krudulo.

Guntero

Eble nur tro okupita.

Krimhildo

Eĉ tiam krudulo. Li diris, ke mi estas odoraĉa.

Guntero

Li ne diris tion.

Krimhildo

Li diris.

Guntero

Li parolis nur ĝenerale, kio estas la etikeda tualetto en la vespera feste-no aŭ ion similan. Li komprenis tion ne persone pri vi.

Krimhildo

Guntero! Ĉi tiu estas mia plej bela robo! Kaj ĉi tiu krudulo eĉ ne rimarkis ĝin. Kaj hodiaŭ matene, jes ja, mi lavis min. Diru, ĉu ĉi tiu estas tiu brava kavaliro, al kiu mi devus doni mian koron? Al tia senkora, bruska krudulo? Ho, dioj! Kia krudulo! Krudulo! Krudulo!, Ho, ve al mi! Ni iru hejmen! Eĉ minuton mi ne volas resti ĉi tie.

4a sceno

Aperas Atilo. Li surhavas simplan, polvokovritan kaj ie-tie ŝiritan veston. Videble li tre lacas: sidiĝas sur roko. Siajn pafarkon kaj sagujon li lasas fali apud sin. Li rimarkas Krimhildon kaj Gunteron.

Atilo

Saluton al vi!

Guntero

Ankaŭ al vi saluton, migranto.

Krimhildo

(mismaniere) Bonan tagon!

Guntero

Vi ŝajnas esti laca.

Atilo

Vi havas bonajn okulojn, sinjoro. La ĉaso vere lacigis min. Mi pelis bel-egan cervon kun miaj kunuloj, sed kiel miaj du prauloj, Hunoro kaj Magoro, ankaŭ mi lasis ĝin forkuri. *(ĵetas rigardon al Krimhildo)* Sed kiel miaj bravaj prauloj en la marĉoj de la Meota Maro, jen, mi same trafis mirindan fenomenon. Saluton al vi, belega damo!

Krimhildo

(perplekse raspas la gorĝon) Saluton...

Atilo

Kiujn mi povas honori en vi?

Guntero

Mia fratino estas Krimhildo, burgunda princino. Kaj mi estas ŝia frato, princo Guntero. Ĉu vi estas lokano, sinjoro?

Atilo

Oni povus diri.

Guntero

Iu brila grandsinjoro, certa komandanto Soardo invitis nin al la vespera festeno de reĝo Atilo. Kiel vi opinias, ĉu ni povas akcepti la inviton?

Atilo

La inviton de kapitano Soardo oni devas preni serioze. Kaj la hodiaŭ-vespera festeno promesas esti vere pompa.

Krimhildo

Ĉu vi ne ricevos skoldojn pro tio, bona sinjoro, ke vi ne povis paffaligi la cervon?

Atilo

Kial mi havus?

Krimhildo

Certe vi devus kapti ĝin por la festeno...

Atilo

Eble restos iom por manĝi ankaŭ sen mia cervo. Sed mi dankas vin por via konsento, belega sinjorino mia. Viaj vortoj konsolas min. Mi refreŝiĝas de ili kaj jam sentas min malpli laca. Vere mi bedaŭras, ke mi ne sukcesis predi tiun pompan cervon, sed eble la saĝa naturo volis tiel, por ke la mondo plezuriĝu pri la sovaĝa beleco de tiu nobla bestio. Bel-eco estas la plej bona donaco de la ĉielo, ĉu ĝi ornamas beston, idilian pejzaĝon aŭ sveltan damon, ĝi egale feliĉigas tiujn, kiuj povas ĝui ties vidon.

Krimhildo

Dika komplimento, magra sukceso.

Atilo

Mi intencis ĝin ne kiel komplimenton. Beleco estas dia donaco, kiun oni akceptu kun ĝojo kaj omaĝo. Kaj vi, mia damo, vi estas tre bela. Nur tiom mi celis diri.

Krimhildo

Kiel bela pejzaĝo. Aŭ bela bestio. Ĉu? Ekzemple bela krispahara porko?

Atilo

Mi prefere pensus pri bela, malhele beja ĉevalo, pri fiera, ardnatura, danĉpaŝa rajdĉevalo kun stelo sur la frunto.

Krimhildo

Pri kastrita stalono, ĉu?

Atilo

Ĉevalinon mi ja ne povis diri.

Krimhildo

Tio estis morda esprimo.

Guntero

Mi povus akcepti bonrasan ŝarĝĉevalon. Tian potence fortan, nigran, abundharan bestion, kies grupo tremas... kaj havas jen tiel dikajn piedojn!

Krimhildo

Guntero! Pri kio vi parolas?

Guntero

Mi kredis, ke ni parolas pri ĉevaloj.

Krimhildo

Karega frato! Vi estas kompleta idioto.

Guntero

Sed kial, fratineto?!

Krimhildo

Tamen ankaŭ tiel mi amas vin! (*alkuras, kisas la vangon de sia frato*)

Vi estas la plej amata frato en la mondo! (*al Atilo*) Ĉu vi havas fraton?

Atilo

Mi havis. Sed li jam mortis.

Krimhildo

Akceptu, sinjoro, mian profundan kunsenton.

Atilo

Dankon. Al mi pli plaĉis, kiam vi parolis al mi malpli ceremonie. Kial vi ŝanĝis la tonon? Ĉu vi eble koleras min?

Krimhildo

Konfuzis min la bestrilata amindumado. Mi ne konas la hunan etikedon. Ĝi devas esti tiel praa aĵo kiel ŝtonhakilo. Ni, burgundaj principinoj veturas prefere kaleŝe. Ni timas ĉevalojn.

Atilo

Kvankam ĉevalo pli timas homon ol inverse. Ĝi estas tre saĝa. Kaj ne miskomprenu, kion mi diras, sed ĉevalo estas bela. La plej bela besto en la mondo. Kaj vi estas eĉ pli bela ol ĝi.

Guntero

Magia ĉevalo!

Krimhildo

(*rigardas lin riproĉe*) De longaj jaroj neniu diris, ke mi estas bela. Post la morto de Sigfrido vi estas la unua, kiu tion asertas, kaj mi vidas, ke vi sincere pensas, kvankam iom krude vi vortumas tion. Ne, mi ne koleras. Se vi volas, mi ne plu ceremoniumos. (*suspiras*) En tiu simpla mondo, kie mi ĝis nun vivis, ĉiu parolas senceremonie.

Guntero

Nur ne diru, ke mi estas simpla provincano...

Krimhildo

Guntero, vi povus bonvole iom silenti.

Atilo

Sinjorino, kvankam viaj vortoj pikas kiel vespo, mi tamen vidas tiel, ke

vi estas mirinda kreaĵo de Dio. Kie ajn vi vivis ĝis nun, tie troviĝis la mezo de la mondo.

Guntero

Nu jen, tion elĝuŝigu!

Krimhildo

Mi ne scias, kiu vi estas, bona sinjoro, sed afabla vi estas al mi. Mi konfesas, viaj vortoj tuŝis min.

Guntero

(gampiras pro la sincereco de Krimhildo) Krimhildo!

Atilo

Ankaŭ vi estas kara al mia koro, karega princino! Sed pardonu min, mia vestaĉo ne decas al ĉi tiu momento. Kun mia eksteraĵo, humida de pluvo, ŝirita de dornoj, kovrita de polvo estus apenaŭ dece resti antaŭ vi. Kun via permeso mi foriĝos.

Krimhildo

Mi lasas vin foriri, kavaliro. Tamen eksciu, mi vidas, ke la vetertaŭzita eksteraĵo kovras noblan animon.

Atilo

(klinas sin) Akceptu mian elkoran dankon. Mi esperas, ni ankoraŭ revidos nin! *(for)*

Guntero

(al Krimhildo) Nu, vi vere kapablas surprizi min. Pli frue vi nomis tiun brilvestan grandsinjoron krudulo, kaj ĉi tiun ĉasiston vagulon, kiu eĉ cerwon ne povis predi, vi akceptas en vian koron. Kio je li tiom plaĉis al vi?

Krimhildo

Mi vere ne scias. Io imponis al mi en lia rigardo. Kaj ankaŭ en lia voĉo. Mi sentis en li specon de natura digno. Ŝajnas al mi, ke li ne estas servisto.

Guntero

Vi ja povas certi, ke li estas tio. Kaj vi ne povas permesi al vi kontakti

malpli rangajn. Nenio pli mankus, ol ke oni eksciuj, ke la burgunda prin-
cino Krimhildo koketas kun ĉifonaj ĉasistoj.

Krimhildo

Mi ne koketis.

Guntero

Ĉu vi ne koketis? Jes ja, vi efektive koketis! Mi vidis per ambaŭ okuloj.
Rigardu, kiel viaj vangoj ruĝiĝis! Kaj ankaŭ viaj okuloj brilas kiel ne-
niam!

Krimhildo

Ba, Guntero! Nur agrablis interŝanĝi kun li kelkajn vortojn. Finfine viro,
kiu ne volas aspekti pli ol li estas. Min ne interesas, kiun rangon aŭ po-
zicion li havas, mi volas de li nenion. Simple agrablis vidi kaj aŭdi lin.
Sed nun, kara frato, ni reiru en nian tendon, ĉar kion ajn diras tiu bril-
aspekta krudulo, mi ne tute preparis min por la vespera festeno. Mi
volas, ke ĉiu admiru Krimhildon, princinon de Burgundio.

Guntero

Al kiu vi volas tiom plaĉi?

Krimhildo

Al kiu, al kiu? Ĉu ne estas indiferente? Al mi. Ni ekiru, Guntero, ĉar
baldaŭ vesperiĝos. (*ambaŭ for*)

5a sceno

*Dum Krimhildo kaj Guntero foriras, aperas Avieno, kiu longe
postrigardas ilin.*

Avieno

De kie mi konas ĉi tiun virinon? Mi firme memoras, ke ie mi jam vidis
ŝin. Ne romia virino... sed ŝi havas tre belan pugon. (*ĉirkaŭrigardas*) La
tendaro de la hunoj estas silenta. Silenta kiel pejzaĝo antaŭ tempesto.
Hu! (*faras krucosignon*) Trigecio! Kie vi estas?

*Atanzio aperas, eskortata de kvin ravenaj soldatoj,
kiuj portas laŭ romia maniero baltee surŝultran, rektan glavon kaj*

lancon kaj kaskon sur la kapo.

Avieno rimarkas Atanazion.

Ej nu, kiun vidas miaj okuloj! Mi salutas vin, ĉefepiskopa moŝto. Mi ĝojas revidi vin. Estis ja antaŭ sufiĉe longe, kiam ni renkontiĝis en Romo. Ĉu vi memoras? En la naskiĝtago de la imperiestro. Mi petas vin, honorinda Atanzio, akceptu la omaĝan saluton de konsulo Avieno! (*klinas sin*)

Atanzio

Kia malordo regas en ĉi tiu dirta tendaro? Ĉu jam ĉiu vaganta hundo povas engliti? Ankaŭ mi memoras vin, vagulaĉo! Vi estas la spurhundo de tiu hereza Leono, kiu proklamis sin episkopo de Romo. Pri kio vi klopodas ĉi tie, pri kio vi snufadas, Avieno? Kial vi ne forportas vian haŭton? Malaperigu vin, hundo, dum vi povas!

Avieno

Jen bonvenigo! Ankaŭ mi amas vin, Atanzio. Sed vi timas min. Vi dentogrincas kiel bestio, pelita en kaptilon. Plej volonte vi mordus mian etenditan manon. Kio trafis vin, ĉefepiskopo? Ĉu vi rabiĝis?

Atanzio

Mi scias, kion vi celas, damnito! Vi akompanis la herezan Leonon kun tiu alia fripono, Trigecio. Ĉu vi kredas, mi ne travidas viajn maĥinaciojn? Ĉu vi kredas, mi ne scias, kiu vento alblovis vin?

Avieno

Ni venis delegacie al la reĝo de la skitoj. Mildigu vian furiozon, ĉefepiskopo. Espero kaj bona intenco alvenigis nin.

Atanzio

Ĉu bona intenco? Diablo kaj infero! Vi venis murdi, ĉar vi timegas, ke Atilo forbalaos vin ankaŭ el Romo, kiel en Raveno li jam faris. Vi volas kaŝmurdi la reĝon, ĉar en Raveno jam eĉ unu katoliko ne restis, kaj vi scias, ke la samo okazos ankaŭ en Romo. Sed vi jam ne ĝisvivos tion, ĉar sur la ĉefplaco de Raveno vi estos palisumita. Soldatoj! Kaptu tiun spionon! Kaptu lin!

La soldatoj ekiras al Avieno, sed pro lia ekkrio ili haltas.

Avieno

Halt! Mi venis delegacie! Ĉu vi freneziĝis, Atanazio? Ĉu vi akuzas kaj igus min senplie ankaŭ mortigi? Ni ja ambaŭ estas kristanoj! Ni adoras la saman Dion, Lia beno brilas sur nin ambaŭ... Aŭskultu min, Atanazio! Elektu ankaŭ vi la vojon de la paco!

Atanazio

Ĉu vi parolas pri paco? La pinto de via glavo elvidiĝas sub via mantelo. Vi estas kiel vipero: vi tordiĝas, sed ajnamomente vi povas ĵeti vin por mortiga piko. Soldatoj! Mortigu lin! Nun tuj! Mortigu lin!

La soldatoj ekiras al Avieno, levas siajn lancojn por piko. Avieno falas surgenuen, sed eltiras sian mallongan glavon el sub la mantelo, kiam aperas Soardo.

Avieno

(kun tremanta voĉo) Mi ne timas...

Soardo

Halt! *(La soldatoj detenas sin.)*

Atanazio

Mortigu lin! *(La soldatoj ree levas siajn lancojn.)*

Soardo

Mi diris halt! Arkistoj!

Aperas du hunaj arkistoj, metas sagon sur la tendenon, kaj streĉinte la arkon, alcelas Atanazion. Soardo malingas sian glavon.

Ĉi tie estas la tendaro de reĝo Atilo. Neniu uzas armilon sen mia permeso. La soldatoj demetos siajn lancojn kaj glavojn sur la teron. Ĉu komprenite?

Atanazio

Ni estas ses kontraŭ tri...

Soardo

Ĉu vi freneziĝis, ĉefepiskopo? Ĉu vi ne vidas pro la kolero? La tendaro

jam vekigis. Dudek mil okuloj nun atentis vin nevideble, kaj se necesos, dudek mil sagoj flugos en vian koron. Ĉu vi certe volas ekkoni la skitan morton? Armilojn demeti!

Atanazio

(*raŭke*) Soldatoj, demetu la armilojn! (*La ravenaj soldatoj obeas.*)

Soardo

(*al Avieno*) Kio okazis?

Avieno

(*stariĝas pene*) Okazis disputeto. Eta miskompreno.

Soardo

Kiu respondecas? (*Avieno silentas.*) Kiu iniciatis la kunpuŝiĝon?

Soardo

Ĉu la s-ro ĉefepiskopo?

Atanazio

(*kolerblasas*) S-ro komandanto, permesu al mi foriri. Soldatoj, sekvu min! (*for*) (*Aperas Trigeccio.*)

Soardo

(*al la arkistoj*) Levu la armilojn kaj deponu ilin en la armilejo! (*al la du romianoj*) Sinjoroj! Se eblas, alifoje pli bone gardu vin! (*for*) (*La arkistoj elportas la armilojn.*)

Trigeccio

Kio okazis, Avieno?

Avieno

Okazis, ke mi enpisis. Mi jam estas maljuna por dece morti.

Trigeccio

Ĉu vere?

Avieno

Bedaŭrinde jes... Sed mi vivas! Venu, Trigeccio, mi havas sekan ŝanĝo-veston, mi volas plej baldaŭ transvestiĝi.

Trigecio

(brakumas la ŝultrojn de sia amiko) Mi lasas vin sola por momento, kaj vi tuj trafas en implikaĵon. Kiam vi fine saĝiĝos, karega amiko?

Avieno

Mi kredas, nun mi sufiĉe saĝiĝis. *(ambaŭ for)*

6a sceno

Samloke. Apogita sur sia longa, kurba bastono, envenas papo Leono.

Maljunulo, liaj malmultaj haroj blankas. En la mano tenas grandan pontifikan bastonon, kies supra ekstremo estas rekurbigita. Liaj tuniko kaj togo estas negblankaj. Granda orkruco kun dika ĉeno pendas de lia kolo. Li paŝadas malrapide, lace, dume ĉirkaŭrigardas, videble serĉas iun, kiu orientus lin. Kiam komandanto Soardo enrapidas la scenon, la papo haste alparolas lin.

Leono

Dio donu al vi bonan tagon, grandsinjoro!

Soardo

(haltas) Kiel densas la trafiko hodiaŭ... Kiun vi serĉas, bona maljunulo? Vi ŝajnas esti konata. Ĉu ni jam ie renkontis nin?

Leono

Mi ne memoras, juna viro. Mia nomo estas Leono. Mi estas la episkopo de Romo. Oni diras ankaŭ ĝia papo. Mi volas trovi du miajn kunulojn, kiuj alvenis antaŭ mi.

Soardo

Aha! Tiel mi jam memoras! Mi vidis vian portreton sur kupra monero. Mi notis al mi vian grandan terpom-nazon. Mi estas Soardo, la unua komandanto de la reĝo. Do, vi estas la papo, ĉu? Vi venis delegacie al la reĝo.

Leono

Jes, estas mi. Kaj jes, mi venis delegacie al reĝo Atilo.

Soardo

Ĉu nur tiel sola?

Leono

Mia granda terpom-nazo tuttempe akompanis min. Kiel miaj du kunuloj, (*emfaze*) kiujn mi ĝuste serĉas.

Soardo

Bona maljunulo, miaj vortoj ne pikis vian koron! Jen tia homo mi estas, kio en la kapo, tio tuj sur la lango. Mi ja scias, ke mi ne devus senplie eldiri, kion mi pensas, mi provas de kutimiĝi sed sensukcese. Nun, antaŭ ne tro longe mi diris al eminenta damo, ke ŝi estas trivita kiel la hufferoj de mia ĉevalo. Ĉi tiuj skitaj sinjorinoj kutimas iĝi tre nervozaj... Hu... Per kio mi povas helpi vin, episkopo, mi volas diri papa moŝto?

Leono

Elkore mi dankus, se vi kondukus min al la tendo de la reĝo, ĉar kiel jam ankaŭ vi scias, komandanto Soardo, kun miaj kunuloj, kiujn bedaŭrinde nenie mi trovas, mi klopodas veni antaŭ reĝon Atilo. Ĝuste kiel vi menĉis: kiel delegito.

Soardo

Do tiam vi jen alvenis. (*kun vasta gesto li ĉirkaŭmontras*) Jen tio estas lia tendaro. Sed li ankoraŭ ne enhejmas. Li foriris ĉasi, sed baldaŭ li revenos hejmen, ĉar vespere li donos grandan festenon honore al vi.

Leono

Ĉu honore al mi?

Soardo

Bone, tio estis troigo. (*afable li frapetas la dorson de la papo*) Li donas festenon nur tiel, por sia amuzo. Mi nur volis pligajigi vin, se ni jam kuntrafis. Atendu momenton!

Li elrapidas, enportas du soliumojn, romstilajn tronojn, demetas ilin ne tre for unu dis la alia. Papo Leono sidiĝas sur la maldekstra, Soardo sur la alia. Dum tempeto li sidas kaj rigardas la papon.

Estas bone sidi, ĉu? Al mi estas agrable. Mi faris terure longan vojon

kaj ĵus revenis en la tendaron.

Leono

Longan vojon... Kaj kie vi pasis, s-ro komandanto?

Soardo

Tion mi ne povas diri. Milita sekreto.

Leono

Mi komprenas... (*rigardadas la tronojn, en kiuj ili sidas*) Beleglaj pecoj.

Soardo

Milita predo. (*subite saltleviĝas*) Be, nun enkapiĝas al mi, mi havas amason da farendoj. Mi devas iri! (*elrapidas*)

7a sceno

Samloke. Leono sidas kaj atendas, dume ĉirkaŭrigardas. Post tempeto aperas reĝo Atilo malantaŭ lia dorso, en pura, simpla sed eleganta vesto. Kun blanka ĉemizo, same blanka jako, krudkolora pantalono, enŝovita en kurtatubaj botoj. En la mano li tenas seningan sabron kun kurba fusto, la legendan Atilo-glavon, kiun nun oni konservas en Vieno. Li tenas ne la fuston sed la klingon, ĉar post ĝia trovo ĝi ankoraŭ ne havis sian ornamitan ingon. Parto de la klingo estas envolvita en mola ŝtofopeco, por ne tuŝi ĝin per la mano.

Li atente pririgardas la papon, sed ne ekparolas, sidiĝas sur la alia seĝo kaj viŝas, poluras kun amema zorgo sian glavon. La papo rimarkas Atilon, sed ankaŭ li plu silentas. Post tempeto la papo tamen alparolas lin.



Leono

Bela peco.

Atilo

Bela.

Leono

Mi estas Leono.

Atilo

Atilo.

Leono

Ĉu la reĝo?

Atilo

Ĉu la papo?

Ambaŭ rigardas fikse la alian. Atilo komencas viŝi la klingon, Leono rigardas lin. Ili silentas.

Leono

Ĉu akra?

Atilo

Akra.

Leono

Iom kurba.

Atilo

Ĉu ĉi tio?

Leono

La fusto. Iom kurba.

Atilo

(Iavas la glavon antaŭ siajn okulojn, zorge ekzamenas ĝian fuston, turnadas ĝin) Ĉu vi pensis pri ĉi tio?

Leono

Pri tio.

Atilo

Kiel vi diras, sankta patro. Ĝi estas vere kurba. Sed ĝi estas ne glavo sed sabro. Oni devas per ĝi ne bati kaj piki kiel per la romiaj *gladius*, sed haki, falĉi de sur ĉevalo. Tial estas ĝia klingo arka kaj ne rekta. Ni, skitoj, batalas ĉiam surĉevalo. Per viaj mallongaj glavoj ni eĉ ne atingus la malamikon. Sed estas ja vere, ĝis nun ankaŭ mi ne vidis tiel kurban fuston. Bela sabro, vere pompa artefakto, sed kio koncernas ĝian fuston, ĝi estas, kiel vi trafe konstatis, kurba. (*ekzamenas ĝin*) Mi ricevis ĝin donace. (*prenas la fuston en la manon, faras kelkajn hakojn en la aero*) Malgraŭ tio oni povas al kutimiĝi.

Leono

Mi aŭdis, ke laŭ la skitoj ĝi estas la glavo de Dio. Nu, de via dio.

Atilo

(*malsereniĝas*) Nu, de via dio... Kvazaŭ estus tiel granda diferenco inter dio kaj dio. Ĉu eble ne la sama senfina ĉielo altiĝas super Italio kaj Hunio? Ĉu eble la steloj ne same brilas nokte? Ĉu eble la suno ne same trakuras sian vojon de matena ĝis vespera krepuskoj? Ĉu ni ne same naskiĝas kaj mortas laŭ la volo de la sinjoro de la ĉielo? Ĉu eble ni ĉiuj ne same sopiras, amas, brakumas kaj mortigas? Kion vi scias pri nia dio?

Leono

Mi konfesas, ne multe. Vi honorus min, se vi parolus pri li.

Atilo

Bone, mi rakontos. Vi adoras la Patron. Ankaŭ ni. Nur ni nomas lin Sinjoro de la Ĉieloj, aliffoje Sinjoro de la Armeoj aŭ Granda Dio, sed la esenco estas, ke Li estas nia patro. Vi adoras ankaŭ la Filon. Ankaŭ ni. Kvankam ni nomas lin en niaj legendoj Filo de la Blanka Ĉevalo, tamen tiel same ni konas kaj amas lin. Vi adoras ankaŭ la Sanktan Spiriton. Ankaŭ ni. Super vi Li flugas en figuro de kolombo, super ni en tiu de sankta falko, la *turulo*. Tamen estas diferenco inter ni, ĉar vi ĉi tie finas. Ni, male, adoras ankaŭ la ĉielan Patrion, krome antaŭ ĉio. Ŝi estas nia Beata Virgulino. Diru, papo Leono, kial vi ne havas supre patrinon?

Leono profunde spiras, por ekparoli, sed Atilo forĝestas.

Sed ne diru al mi, ke tio estas komplika demando!

Leono

Mi ja ĝuste tion volis diri.

Atilo

Nenio estas komplika. Kio estas supre, tio estas malsupre, kaj kio estas malsupre, tio estas supre. Jen tiel simple.

Leono

Ĉu vi konas Hermeson Trismegiston?

Atilo

Ni skitoj memoras ĉion. La granda, Trioble Sankta Hermeso mesaĝas pere de mi, ke ĉiu epoko havas siajn diojn, sed apenaŭ vi elĝuŝigas ilin el ilia kostumo, donacita de la samtempuloj, vi tuj ekkonas la dion de la antaŭa epoko. Antaŭ Apolono estis Zeŭso, antaŭ li Ra, pli frue Samas... Kaj aŭrore de la tempoj Anu. La mortemuloj adoris la Patron ĉiam en la bildo de la sankta suno. Kaj ĉiam li havis ĉielan amatinon, kaj ĉiam li havis infanojn... Patro, patrino, infanoj. Jen tiel la afero funkcias tie supre kaj ĉi-malsupre. Nur tiel, alimaniere ne eblas. La patro estas viro, la patrino virino...

Li ekzamenas la glavon.

Ĉu ĉi tiu estus la glavo de Dio? Ne, patro, ĝi pretiĝis per homaj manoj, sed ĝi estas tiel bela kaj tiel mistera, ke miaj militistoj opinias, ke ĝi estas eble vere la glavo de la Sinjoro de la Armeoj, ja estas fakto kaj vero, ke ĝi elteriĝis kun sia pinto supren sur paŝtejo. Paŝtista knabo trovis ĝin, kaj kio estas aparte kurioza, ĝi kuŝis, neniu scias, de kiel longa tempo sub la tero, tamen eĉ papavero da rusto ne gluiĝis al ĝi. La knabo portis ĝin al mi, ĉar li kredis, ke la glavo de la Sinjoro de la Armeoj apartenas al la Sinjoro de la Mondo. Sed ni iru al la kerno!

Li manvokas, servisto enkuras, transprenas la valoran glavon kaj elrapidas kun ĝi.

Mi eldiras al vi sincere patro, kvankam eble ankaŭ vi mem scias, mi ve-

nis elpeli la katolikojn el Romo kaj post Raveno malfermi ankaŭ tie spacon por la fideluloj de episkopo Ario. Laŭ miaj planoj ni falĉos glave ankaŭ vin kune kun viaj pastroj kaj fideluloj.

Leono

(faras krucoŝignon) Impona koncepto.

Atilo

Sed ĉi nuna vespero ankoraŭ apartenas al ni. Hodiaŭ regas paco en Etruskio, sed morgaŭ aŭdiĝos stertoroj kaj lamentoj. *(rigardas la papon, kiu sidas trankvile)* Kial vi ne falas genuen? Kial vi ne petegas por indulgo?

Leono

Ĉu tio havus sencon?

Atilo

Ne.

Leono

Do mi prefere ankoraŭ sidadus dum mia restinta vivo... Mi preskaŭ forgesis: la popolo de Romo deziras al vi kaj viaj karuloj fortikan sanon.

Atilo

La sama bono okazu al la romianoj, kian ili deziras al mi.

Leono

Tiam ili povas kalkuli je ne multo bona.

Atilo

(ekridas) Vi plaĉas al mi, episkopo Leono. Vi estas kuraĝa homo. Kaj sincera. Ĉu vi havus emon vespermanĝi kun mi?

Leono

Prefere mi interparolus.

Atilo

Interparoli eblas ankaŭ dum manĝado.

Li manvokas, servisto enportas tableton kaj demetas ĝin antaŭ Atilon.

Sur la tablo fajnaĵoj: viando, legomoj, fruktoj. Atilo metas vinberon en la buŝon.

Propre kian disopinion vi havas kun la arianoj? Preskaŭ la samon vi diras. *Homouision, homoiusion*⁵. Ĉu valoras tiom murdadi pro unu litero i?

Leono levas sian manon, kvazaŭ li volus paroli.

Mi komprenas, pri kio vi disputas, do ĉu la kvalito de Jesuo estas de absoluta aŭ relativa valoro. Ĉu li identas kun la Di-Patro aŭ nur preskaŭ identas, tamen staras super la homoj. Ni, skitoj aŭskultas pri tio la helenojn, kiuj nomas iun tian duondio. Ĉu vi sciis, ke Heraklo, kiun vi nomas Herkulo, estis origine skito? Tiam li ankoraŭ ne estis duondio, sed la helenoj, kiel kutime, bunte kolorigis lian vivon kaj faris lin duondio. Li iĝis filo de Zeŭso, kiun naskis tera patrino. Fine Zeŭso levis lin al si en la senmortecon. Tiel same kiel la Ĉiela Patro Jesuon.

Leono

(faras kruconsignon) Vi blasfemas Dion. Jesuo klare diris: “la Patro kaj mi estas unu”.

Atilo

Tamen li mortis sur la kruco.

Leono

Sed li reviviĝis. Homo ne kapablas reviviĝi. Nur dio.

Atilo

(frapas sur la tablon) Mi ne eniras la kaptilon! Mi ne disputas pri religio. Mi revenis post unu jaro, ne por remaĉadi pri religiaj aferoj. Mi revenis, por eldiri verdikton. Vi vegetas mizere sur la ruinoj de potenca imperio. En mia junaĝo mi longe vivis en Romo. Mi vidis la pompon de la eterna urbo, sed vidis ankaŭ ĝian degeneriĝon. Mi vidis, ke ĝi forgesis sin mem, mi vidis, kiel ĝia egoismo blindigis ĝin, kaj ĝi ne rimarkis la danĝeron de la ĉien penetranta barbarismo eĉ tiam, kiam ĝi jam eĉ movi sin ne povis. Inter statuoj de mortintaj dioj vi diskutas pri la

⁵ Homouision: esence sama (estas Jesuo kun la Patro Dio). Homoiusion: simila (estas Jesuo al Patro Dio, sed ne dio).

kvalito de Jesuo, dum periferie de la eterna urbo jam flamas la domoj, kiujn la barbaroj enflamigas. Jesuo diris anticipe: *Consummatum est!* Estas finite! Romo jam estas mortinta, sed ĝi ankoraŭ ne scias tion.

Nervoze li iras tien-reen.

Jes! Mortinta!

Leono

Tamen iom ankoraŭ restis. Eble iam nova vivo povos ĝermi el ĝi... Imagu, antaŭ nelonge oni montris al mi plej fajne ellaboritan oran braceleton, kiun pretigis oraĵisto de via popolo. Mi rigardis ĝin kaj diris, se ĝi estas laboraĵo de hunoj, tiam popolo, kapabla je tia artefaktoj, inklinas ankaŭ akcepti la Vorton de la Vivo. Tial mi kuraĝis veni al vi sen armita eskorto...

Atilo

(kvazaŭ li ne aŭdus la vortojn de la papo) Kie estas Aecio, la granda militestro, kiun mi venkis antaŭ unu jaro sur la ebenaĵo de Mauriacum? Kien li kuris, kie li nun timkaŭras, kie li kaŝis sin antaŭ mia kole-ro? Kial li ne varbis militistaron, por ree alfronti min? Mi, Atilo, la skurĝo de Dio jen estas ĉi tie.

Leono

La militestro Flavio Aecio mortis. Estas murdita.

Atilo

Kiu faris tion?

Leono

La imperiestro mem, Flavio Placidio Valentiniano. Kaj senatoro Petronio Maksimo.

Atilo

Ĉu murdita?

Leono

Oni diras, ĉar li atencis la vivon de la imperiestro. Sed mi opinias, li estis baro sur la vojo de Maksimo. Tiu nome aspiras la oficon de la ofte

malsana Valentiniano. Sed Aecio estis tre populara en Raveno. Li povus fariĝi eĉ imperiestro... Kaj ja li sufiĉe batvenkis vin ĉe Catalaunum... (*Atilo eklevas la kapon.*) Pardonon. Ĝis nun ĉiu sciis tiel.

Atilo

Ĉu ankaŭ vi?

Leono

Ankaŭ mi.

Atilo

Tamen nun vi jam vidas tion iom diference, ĉu?

Leono

Nu, jes...

Atilo

Estas bele de vi. Se eventuale vi tamen restos viva, rakontu hejme al la popolo kaj senato de Romo, ke laŭ la ĉiuj indikoj tamen ne Aecio sed Atilo venkis, kaj ne ĉe Catalaunum sed ĉe Mauriacum. Nur por la historia fideleco. Ĉu vi faros tion?

Leono

Se mi tamen restos viva, mi faros.

Atilo

Dankon. Ĉu vi scias, ke Aecio vivis longe en la kortego de mia patro? Li ellernis nian lingvon, ekkonis niajn kutimojn, lia unua granda amo estis huna junulino el la domo de mia onklo. Ĉu vi sciis, ke mi faris kun li sangokontrakton? (*suspiras*). Mortis Flavio Aecio, la lasta romiano. Ho, agoniantaj romiaj dioj, kiom la mondo degeneris! Mi memoras, mia patro diris al li foje: "Aecio, vi fariĝis bona rajdisto kaj certamana arkisto, se vi volas, mi konfidas al vi la estradon de huna regimento". Mi amis lin. Mi rigardis lin kiel mian fraton.

Leono

Tamen vi batalis kontraŭ li. Cent mil mortintoj restis sur la ebenaĵo de Catalaunum... mi volas diri, de Mauriacum.

Atilo

Vi, okcidentanoj frenezigas min! Ĉion vi troigas. Cent mil mortintoj! Sume ne ne estis eĉ ties duono! La du armeoj kune. Pri mi oni disvastigas, ke mi estas hundorela. Nun rigardu min! Ĉu mi havas hundajn orelojn? (*Papo Leono kaj Atilo okulmezuras sin reciproke.*) Ja ne diru, ke jes!

Leono

Laŭ mi viamaniere vi estas belaspekta viro.

Atilo

(*ridas*) Miamaniere! Vi trankviligis min... Efremo, la siriano, kiun vi kristanoj estimas kiel sanktulon, skribis pri ni, ke ni manĝas viandon de infanoj kaj trinkas sangon de virinoj. Kiel freneza ideo! Kaj niaj krioj estas blekado de leono. (*eligas blekon*) (*Leono mire rigardas lin.*) Kia ĝi estis?

Leono

Mi konfesas, mi ankoraŭ ne aŭdis leonan blekon.

Atilo

Mi jes. Nokte en stepo. Ne tia ĝi estas. Se vi aŭdas ĝin proksime, la sango koaguliĝas en viaj vejnoj kaj viaj oreloj zumas tra tagoj..., se vi transvivas tian renkontiĝon. La maljuna Efremo skribis, ke ni flugas kiel ventego sur niaj ĉevaloj ĉe la limo inter la ĉielo kaj la tero. Kaj ke ni vekas hororon sur la tuta terglobo, kiun niaj armeoj kovras inunde... (*enpensiĝas*) Multaj mortis sur la kampo de Mauriacum, ĉar la sorto tiel volis. Sed mi batalis tie ne kun Aecio sed kun Romio. Nu, sed Flavio Aecio estis romiano, kaj la plej brava inter la romianoj, tial li devis komandi la armeon kontraŭ Atilo... Tiu estis mirinta interpuŝiĝo! Mi sentis lian forton dum la batalo, kaj ankaŭ li sentis la mian. Ĉu vi scias, kial mortis tiel multaj en la batalo? Ĉar ni tiel volis... Ho, se vi estus vidinta la interpuŝiĝon! Kiel dancis, kiel siblis en la vento la flagoj de la skitoj, la longaj kaj koloraj orkapaj drakoj sur alte tenataj lancoj!

Li kaptas drakan flagon sur lancopinto kaj flirtigas ĝin dekstren, maldekstren, por ke la bunta ventosako pleniĝu per aero.

Flugu, drako, flugu!

Antaŭ batalo, kiam la ĉevaloj ankoraŭ ne movas sin, vi vidas ĉi tiujn ventosakojn nur koloraj ĉifonoj, pendantaj de lancopintoj, sed kiam la rajdista sturmo ekiras, kaj ili pufiĝas de la vento, dek mil sovaĝaj serpentoj tordiĝas en la vento. Ili eĉ laŭte siblas, kiam dum la potenca galopado la tempesta vento trablovas ilin. Brilkapaj, ruĝhaŭtaj, orskvamaj drakoj flugegas kun ni al la triumfo. La malamiko ŝrikante fuĝas antaŭ ni, kaj ni indulgas neniun. Drakoj ne konas indulgon... (*remetas la flagon ĝialoken*) Jes. Mi vidis lin. Ankaŭ li batalis sur ĉevalo. Li bone ellernis ĉe ni la rajdistan batalmanieron. Sed persone ni ne kunpuŝiĝis. La dio de la romianoj kaj skitoj ne volis, ke ni damaĝu unu la alian.

Leono

Malgraŭ tio li mortis.

Atilo

(*pasie*) Li devus mortfali tie, sur la batalkampo. Per mia mano. Kaj li, per sia lasta forto, puŝus sian ponardon en mian koron. Kaj tiam ni, du sangofratoj, mortfalus tie sur la teron, du bravaj herooj. Kaj la mondo priplorus nin genufalinte... Ho, kiel bele estus... (*rekonsciiĝas*) Ĉu tial necesis ĉi unu jaro, kiun li ankoraŭ ricevis, ke fine kaŝmurdistoj finu kun li? Ho, Acio! Vi ne ricevis la gloron de nobla morto.

Leono

Sed vi, la granda reĝo de la skitoj vivas kaj regas.

Atilo

Ĉar la sorto tiel destinis. Mi regas super la mondo. Mia imperio estas tiel potenca, ke neniam la suno subiras en ĝi. Okcidente ĝi ankoraŭ ne sinkis sub la horizonton, kiam oriente ĝi jam alte brilas. Ĉu vi sciis tion, episkopo de Romo? Ĉu vi vidas sur mi la neniam formortontan lumon de la senfina potenco? (*iradas tien-reen antaŭ la papo*)

Leono

Vi ludas kun mi kiel kato kun muso. Oni diras, kato turmentas muson, ŝaj-nigas en unu minuto, kvazaŭ ĝi ne volus mortigi ĝin, kaj poste sursaltas ĝin, mordas en ĝin, poste liberlasas ĝin, por kulminigi timon kaj hororon

en la muso, ĉar tiel la viando de la muso iĝas pli bongusta por ĝi.

Atilo

Mi ne manĝos vin, episkopo Leono. Via viando estas maljuna kaj penmaĉebla. Turmenti mi ne volas vin. Ĉu vi kredas, ke mi ludas kun vi? Ho, ne, mi nur volas interparoli kun vi, antaŭ ol alpreni decidon, kiu ŝanĝos ne nur vian sorton, sed tiun de ĉiuj homoj sur la tero. Mi longigas la tempon. Tiel gravan decidon oni ne trohastu.

Leono

Sed vi jam decidis, el Raveno vi elpelis la katolikojn per la sangaj eĝoj de viaj glavo, ĉar vi partianiĝis al la fideluloj de Ario. La malkuraĝa imperiestro Valentiniano falis genuen antaŭ vi kaj kisis viajn piedojn. Kaj nun vi ekmarŝos kontraŭ Romo kun potenca armeo. Pli granda, ol vi marŝis kontraŭ Aecio. Sed Romo ne plu havas armeon. Neniu troviĝas, kiu aŭdacus alfronti vin.

Atilo

Nur unu kaduka, maljuna episkopo. Kial oni nomas vin patro?

Leono

Ne patro sed papo. La vorto devenas el la greka, origine ĝi signifis patron. Ĉi tiu titolo ŝuldiĝas al la episkopo de Romo, ĉar mi heredis la tronon de Sankta Petro, kaj per tio mi fariĝis patro de ĉiuj kristanoj. Kaj eble pro tio, ĉar la roma popolo amas min.

Atilo

Oni tamen ne amas vin tiom, ke oni kuraĝus akompani vin. Ĉu sola vi volas haltigi la plej fortan armeon de la mondo? Ĉu sola vi volas haltigi Atilon? Kio donas al vi tielan kredon, papo Leono?

Leono

Tio, ke mi kredas la indulgon de Dio. Mi kredas, ke vi, kiu venis el la disto de senfinaj stepoj kun via potenca armeo, por etendi vian regadon al la tuta mondo, povas ne nur detrui sed ankaŭ konstrui. Nun vi tamen tiel pensas, ke vi venis, por ekstermi en la mondo tiujn kristanojn, kiuj vidas en Jesuo la enkorpiĝon de la plej alta Dio. Sed mi vidas en viaj okuloj la lumon de kompreno, kaj ĝi plenigas min per es-

pero. Mi vidas la serenon sur via vizaĝo. Vi estas potenca sinjoro. La plej potenca reganto, kiu iam ajn vivis. Sed ankaŭ vi estas homo, kun homaj emocioj.

Pene li leviĝas el sia seĝo kaj genuiĝas. El sia interna poŝo li elprenas paperon, el ĝi li legas la historian tekston.

“Reĝa moŝto! La senato kaj la popolo de Romo, iam triumfanto super la tuta terglobo, humile petas de vi indulgon kaj rifuĝon. Atilo, reĝo de reĝoj! Kiam temas pri la grandega gloro de viaj faroj, ne povas haviĝi al vi pli granda honoro, pli glora en la nuna tempo kaj pli memorinda en la futuro, ol ke genufalas antaŭ vi petegante tiu popolo, antaŭ kiu iam reĝoj kaj popoloj rampis surtere, same petegante. Atilo, vi subjugis la tutan terglobon, kaj jen al vi iĝis donite, fine submeti la super ĉiuj popoloj triumfintajn romanojn, tial ni nun petas vin venki vin mem, jam venkintan ĉiujn aliajn. Vian skurĝon sentis maliculoj, vian indulgemon sentu nun petegantoj!” (*remetas la paperon*) Jen tion petas de vi la senato kaj la popolo de Romo.

Atilo

La senato kaj la popolo de Romo! Sed kie do ili estas? Ili ne kuraĝis veni ĉi tien!

Li iras al Leono, helpas lin residiĝi sur la seĝon.

Nur vi venis al mi, maljuna homo, kroĉante vin al via bastono kaj viaj du servistoj, kiuj jam apenaŭ povas reprezenti la senaton kaj la popolon de Romo. Vi estas sola, papo, dolore sola.

Leono

Mi ne estas sola, dum mi povas preĝi al la majesta Di-Sinjoro.

Li stariĝas de sia seĝo, lia voĉo altiĝas.

Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova, la kreinto de la ĉielo kaj de la tero; kaj je Jesuo Kristo, Lia ununura Filo, nia Sinjoro, koncipita per la Sankta Spirito, naskita el Maria la Virgulino, suferinta sub Poncio Pilato, krucumita, mortinta, kaj entombigita, sobirinta en la regnon de la morto. La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj, supreniris al la ĉielo, sidas

dekstre de Dio, la Patro ĉiopova, de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Mi kredas je la Sankta Spirito, la sankta katolika eklezio, la komuno de la sanktuloj, la pardono de la pekoj, la releviĝo de la mortintoj, kaj la vivo eterna.

Li faras krucosignon kaj sidiĝas.

Atilo

Amen. Mi konas ĉi tiun tekston. Bone vi, pastroj elpensis ĝin en Niceo, enestas ĉio, kio gravas. Kvankam se mi konsideras, eble eĉ pli ol necesus... Propre kiel eniras Pilato en la Kredkonfesion? Estas egale. Vi scias... Ĉu certas, ke vi ne petas ion? Jam krepuskas, kaj vi veturis la tutan tagon. Vi devas esti malsata kaj soifa, posteulo de Sankta Petro. Ankaŭ Jesuo Kristo konsumis sian lastan vespermanĝon, eĉ vinon li trinkis. Manĝu, papo Leono! Kion ajn la morgaŭo alportos, vi meritas vespermanĝon.

Li alkrias la papon, kiu ĉiam plu sidas senmove sur sia seĝo.

Manĝu!

Leono

(alarmiĝas) Mi manĝos.

Dume li ŝovas sian seĝon pli proksimen al la tablo kaj singarde prenas pecon.

Atilo

Ankaŭ trinku glason da vino. Delicaj vinoj produktiĝas ĉi tie en Etruskio.

Leono

Mi trinkus, sed mankas glaso.

Atilo

(kunfrapas la manojn, servisto enrapidas) Vinon kaj glasojn!

La servisto alportas vinon kaj lignopokalajn. Atilo mansignas, la servisto eliras. Atilo mem verŝas vinon en la pokalojn.

Ĉu vi volas ligi kun mi sangokontrakton, papo Leono?

Leono

Kion tio signifas?

Atilo

En la okuloj de la huna popolo ĝi estas la plej sankta afero. Du viroj, kiuj estimas kaj respektas unu la alian, fluigas po guton da sango el sia brako en pokalon da vino, kaj kune ili trinkas ĝin. De tiam ambaŭ viroj pretas oferi eĉ sian vivon por la alia, se tiu trafas en malfeliĉon. La sangokontrakto havas tiel grandan forton.

Leono

Ĉu mi ligu sangokontrakton kun vi antaŭ mia morto? Kian sencon tio havus?

Atilo

Ne longe sed profunde oni vivu, patro! Ĉu Jesuo ne kontraktis kun siaj disĉiploj antaŭ sia morto? Pano kaj vino faris ilin fratoj. Pano estas la Korpo kaj vino la Sango! Ni skitoj pensas tiel, ke de tiam ĉe ĉiu komuniĝo milionoj da kristanoj fariĝas reciproke gefratoj, fratigante tra generacioj finsume kun Jesuo mem, tra la senfina vico de la disĉiploj de disĉiploj. Se nun ni ligas sangokontrakton, la kristana eklezio kaj la skita imperio unuigas, en potenca frateco, Eŭropon ekde Kaŭkazo ĝis Atlantiko.

Leono

Kaj la arianoj?

Atilo

Nun ni lasu politikon! Mi parolas pri io multe pli grava (*alpuŝas sian pokalon*) Je via sano, papo Leono! Manĝu! Konsumu laŭplaĉe!

*Ili trinkas gluton, Atilo iradas tien-reen, li rakontas,
papo Leono manĝetas.*

Vivis foje inter la skitoj juna batalisto, nomata Hargito. Unu tagon li aŭdis, ke ne tre for de tie vivas alia juna batalisto, kiun lia ĉirkaŭaĵo estimas kiel heroon pro liaj kuraĝaj faroj. Lia nomo estis Karpato. Hargito vizitis Karpaton kaj petis lin ligi kun li sangokontrakton. Li petegis lin

dum semajno, ĝis Karpato akceptis lin sia frato. Solene ili ligis la sango-kontrakton. De tiu tempo ili batalis kune kaj akiris al si bonan famon. Kaj iun tagon la persoj, kun kiuj la skitoj daŭre batalis, kaptis Karpaton dum surprizatako. Kiam Hargito sciiĝis pri la okazintaĵo, li tuj tranaĝis la riveron al la transborda tendaro de la persoj, por liberigi sian sango-fraton. Li estis kondukita antaŭ la estron de la persoj. “Kion vi povas doni interŝanĝe por via frato”, demandis la komandanto. “Mi estas malriĉa, forprenu mian vivon!” “Ĝin mi ne bezonas”, diris la militestro, “sed donu al mi, kio plej karas al vi.” “Kion vi petas?” “La lumon de viaj okuloj”, respondis la komandanto. “Ĝi estas la plej kara en la mondo.” La persoj moke ridis, sed ili silentiĝis, ĉar Hargito trankvile respondis

“Forprenu ĝin!” Tiam la persoj kaptis lin kaj elpikis liajn okulojn. Hargito eĉ ne eligis veon. La estro morne manordonis liberlasi Karpaton. La du skitaj junuloj ekiris. Antaŭe marŝis la liberigito, post li, metinte la manon sur ties ŝultron, la blinda Hargito. Neniu tuŝis ilin. Sendifekte ili elvenis el la tendaro de la persoj, tranaĝis la riveron al la skitoj, kiuj jubile akceptis ilin. Kaj la persoj sekvatage malaperis for de la transbordo, ĉar ili pensis, ke se ĉi tiu simpla skita batalisto kapablas doni tielan oferon por sia kunulo, tiam ne konsilindas eniri batalon kun ili.

Leono

Por mi ĉi tiu historio temas pri la forto de la memofera amo.

Atilo

Ĝi havas plurspecajn mesaĝojn. Se vi volas kompreni nin, vi bezonas koni ĉi tiujn rakontojn. Troviĝas ankaŭ malpli belaj. Virinrabo kaj similaj. Sed estas komuna en ĉiuj tio, ke ni ĉiucirkonstance kaj ĉiupreze tenas nin al nia vorto. Se mi akceptas vin mia frato, dum mi vivos, mistrakto ne trafos vin, ĉar mi faros ĉion eblan, por scii vin en sekureco, eĉ preze de mia vivo.

Leono

Kaj mi kion devus fari por vi?

Atilo

(enpensigās) Preĝu por mi! *(ekridas)* Mi tre bezonas tion. *(stariĝas,*

refaldas la manikon sur sia maldekstra brako) Ankaŭ vi liberigu vian subbrakon!

Leono

(stariĝas kaj obee refaldas la manikon de sia vesto) Kaj nun?

Atilo

Prenas tranĉilon de sur la tablo, vundas sian manplaton, poste ankaŭ tiun de papo Leono, kiu apenaŭ aŭdeble eksiblas. Atilo alprenas vinpokalon de la tablo, kaj tenas unue lian, poste sian manon super la trinkujo, por enfluigi sangon.

Okazis. Trinku nun!

Leono trinkas, poste Atilo eltrinkas la reston de la vino el la pokalo.

Nun restis nur unu afero. Ni devas brakumi, trifoje kisi la alian kaj eligi sputon maldekstren. Sed neniel dekstren, atentu, nurnure maldekstren!

Ili stariĝas vidalvide, Atilo brakumas la papon, kiu staras sufiĉe ĝenite, poste singarde brakumas Atilon, kiu trifoje kisas lin sur la vangoj kaj laŭte eligas sputon maldekstren.

Pu! Sputu ankaŭ vi!

Leono sputas sufiĉe mallerte maldekstren, poste ili restas interbrakumitaj.

Leono

Ĉu vi ne volas ellasi min?

Atilo ellasas lin el sia brakumo, Leono sidiĝas singarde.

Kial ni bezonis sputi?

Atilo

La tri kisoj simbolas la trioble sanktan ĵuron de la skitoj, ke deposte ili tutkore amos unu la alian. Kaj sputi ni bezonas, ĉar droziofilo trafis el la vino en mian buŝon.

Leono

(*ekridas*) Ho, vi skitoj estas kiel infanoj.

Atilo

Kial vi miras? Ni estas ankoraŭ juna popolo. Apenaŭ kvin mil jaroj pasis post tio, ke nia prapatro Nimrodo konstruis la grandan turon.

8a sceno

Samloke. Enpaŝas Atanzio, la ĉefepiskopo de Raveno. Li haltas.

Atanzio

Saluton al vi, granda reĝo, reganto de la mondo! Mi aŭdis, kaj tial mi venis rapide, ke la kapo de la paganaj romiaj herezuloj, la damnita Leono, speco de diablo intencas viziti vin... (*li ekvidas Leonon*) Plej sankta ĉielo! Li jam eĉ alvenis.

Leono

Saluton al vi, Atanzio! Mia animo ĝojas revidi vin.

Atanzio

Nu, mi ne povas diri la samon. (*flanken*) Mi esperas, ke jam hodiaŭ vespere oni sidigos vin sur palison. (*klinas sin al Atilo*) Granda reĝo! Sinjoro de la mondo! Mi memorigus vin pri tio, kion ni priparolis...

Atilo

(*kolere*) Mi ne vokis vin.

Atanzio

Mi scias, sinjoro, sed...

Atilo

Foriru, Atanzio!

Atanzio

Sed, sed... Ĉi tiu homo (*montras al Leono*)...

Atilo

Foriru! For de mi! (*kriegas*) For de mi!

Atanzio terurite dorsiras for.

Gvardio!

Enpaŝas du soldatoj. Atilo iras pli proksimen al la soldatoj, kaj ne kolere, plie amikeme sed tre decide diras, simile al instruisto, kiu volas klarigi gravan tezon al siaj disĉiploj.

Soldatoj! Se ĉi tiu pastro ankoraŭfoje aŭdacos veni proksimen al mi sen mia permeso, vi pagos per via kapo. Ĉu vi komprenis, kion mi diris?

Estro

Ni komprenis.

Atilo

Bone. Plenumu viajn farendojn!

La gvardianoj eliras.

(al Leono) Mi vidas, vi miras. Pli frue mi volis falĉi vin kune kun ĉiuj katolikoj per mia glavo kaj nun mi forpelis la ĉefepiskopon de Raveno, kiu akceptis min kun vere pompa propono. Kvankam se mi farus laŭ lia plaĉo kaj liberigus lin de vi, li donus al mi laŭ sia promeso tutan Italion kaj Afrikon. Kaj mi komence inklinitis, ĉar estas granda plezuro sinjori la mondon... tamen mi ne certis pri mi. Kaj poste okazis io. Io, kio definitive ŝanĝis mian decidon, kvankam komence mi ne komprenis tion en ties tuteco.

Papo Leono levas la manon.

Leono

Se vi permesas...

Atilo

Ne, ne parolu! Mi petas, aŭskultu min ĝisfine. Frumatene, kiam mi estis eldormiĝonta, duone jam vekiginte, sed duone ankoraŭ en la mondo de sonĝoj, mi vidis vizion. Mi vidis potencon viran figuron kun mirinde bela vizaĝo, kiu flugis en nuboj super min. En sia mano li tenis brilan sabron, sed ne minace, eĉ, mi sentis tiel, ke ridetante li etendas al mi la glavon. Ĉirkaŭ lia kapo brilis tia lumrondo, ke mi preskaŭ blindiĝis. Li diris ion, aŭ estis ion dironta. Sed dum mi levis min, por pli bone vidi lin, la vizio disperiĝis. Vekiĝinte tute, mi sentis, ke mi konas lin,

tamen li restis nekonata. Ĉu vi scipovas malĉifri ĉi tiun sonĝon?

Leono

Ĉu li estis maljunulo aŭ junulo?

Atilo

Plie maljuna.

Leono

Ĉu kun barbo?

Atilo

Jes, barbohava. Kiel la plej multaj skitoj.

Leono

Mi ne estas aŭguristo, ne havas kapablon por tio, kaj por diri sincere, mi ne kredas je la sonĝoj. Mi ne kutimas sonĝi. La sonĝofiguro povis esti kiu ajn. Eble li estis Sankta Petro kaj li svingis al vi la glavon, ĉar li volis timigi vin. Por ke vi fortimiĝu de tio, kion vi intencas fari kontraŭ Romo.

Atilo

Patro, Sankta Petro neniam havis glavon. En la ĝardeno Getsemana li dehakis la orelon de la soldato per prunteprenita glavo. Tiel longe li svingadis ĝin en sia timo, ĝis unu orelo pereis. Neniam plu li prenis glavon en la manon. Li marŝis kun bastono tiel same, kiel vi. Tion ĉiu scias. Aliflanke nun ni ligis sangokontrakton, ni jam ne estas malamikoj. Kial li minacus iun ajn? Mi prefere pensas pri tio, ke eble mia prapatro Nimrodo li estis, kiu volis diri ion. Ion gravan, kiu rilatas ankaŭ al la Glavo de Dio. Kion mi devus kompreni. Sed mi ne komprenas. (*saltleviĝas*) Egale! Ni parolu prefere pri nia afero!

9a sceno

Samloke. Enpaŝas Soardo.

Atilo

Vi venas kvazaŭ vokita, Soardo! Ekkonu papon Leono, episkopon de Romo.

Soardo

Ni jam renkontiĝis. Saluton al vi, episkopa moŝto!

Leono

Saluton, ankaŭ al vi, militestro Soardo. Ĉu vi jam satripozis post la longa vojo?

Soardo

Mi eĉ ne laciĝis.

Leono

Ĉu ankaŭ plu estas sekreto, kie vi pasis?

Soardo demande rigardas al Atilo.

Atilo

Rakontu al li kuraĝe! Nun papo Leono jam povas ekscii, kion ni scias.

Soardo

Kiel vi ordonas, mia reĝo. (*al Leono*) Mi, Soardo, la ĉefkapitano de la militistaro de la granda reĝo eniris kun la huna armeo sude en Apulion, kaj de tie pluen, tute ĝis Kalabrio, kie mi iom detruis la urbon Reggio kaj Catona, en kiu Cato naskiĝis kaj loĝis, poste mi pripredis ankaŭ Terra di Lavoro per miaj trupoj ĝis la monto Cassino, poste de tie triumfe mi returnis min al Raveno, kunprenante riĉan kaptajon, sed laŭ la ordono de mia reĝo severe evitante Romon. Dum mia tuta vojo mi trafis nek malamikojn, nek kurante fuĝantajn trupojn, nek trovis ferocajn popolaĉojn, plie jupulinojn, montrantajn fortan inklinon, kiuj ja iom ŝriketis, kiam ni ampinĉetis ilin, tamen ne kun kolero, sed kun tiel gaja koketado, kiun ni ĉe la vere aromaj italiaj vinoj tre ekŝatis, pro kio poste...

Atilo

Soardo! Parolu ne pri virinoj, sed por kio mi sendis vin.

Soardo

Mi komprenas, mi ne parolos pri virinoj... Kiel la granda reĝo estis ordoninta, mi trairis ĉiujn lokojn kaj angulojn de Italio, sude tute ĝis la insulo Sicilia, mi lasis mergiĝi miajn piedojn en ĉiujn marojn, por trovi

romiajn trupojn, sed kiel mi diris – kaj pri jupulinoj ĉi-foje aparte mi ne devojiĝos, kvankam mi havus ion-tion por rakonti... (*Atilo malaprobe skuas la kapon*), tamen mi ne diros prie eĉ nur vorton, ĉar mia tasko estis skolti, nu ne pri virinoj, sed kiajn fortojn Romo havas, se ĝi volus ĵeti sin kontraŭ ni, kaj do mi trovis, ke kvankam tio eble tre doloros al Via Sankteco, mi povas diri nenion alian, ol ke Romo ne havas eĉ tiom da soldatoj, kiom da pomoj restas dum neĝsezono sur la pomarboj sub la montoj de Transilvanio⁶, kie tiel hundotremigaj frostoj kutimas esti!

Atilo

Soardo certe ne estas la tipo de vortavaremo.

Leono

Mi rimarkis.

Atilo

Sed eminenta militestro kaj nekredeble bona observanto. Li iradas-venadas nelacigeble, babilas, papilias pri ĉiuj temoj, kaj la homoj volonte klaĉas kaj rakontas al li pri ĉio, kion li volas scii.

Soardo

Ĝuste tiel.

Atilo

Kaj li notas al si, resumas kaj raportas ĉion al mi. Tiel, dum ni kampadis ĉi tie, li evidentigis al mi tion, kion mi kredis suspekti, ke Italio estas sendefenda. Ne estis malfacile al episkopo Atanazio promesi al mi tutan Italion kaj Afrikon, direkti mian atenton al la damnita Bizanco, kies teron niaj trupoj jam kelkfoje trarajdis, ja neniu kapablas kontraŭstari al ni. La ĉarma Italio feliĉe floras en ĉi tiu belega aŭtuno. La pejzaĝoj de Etruskio, kiun mi, se vi ne oponas. nomas de nun Toskanio, estas mirinde belaj, kiel la vino, kiu produktiĝas sur ĝiaj montetoj, sed Romo postrestas ĉiurilate. La granda romia imperio disperdiĝis kiel nebulo en vento. Tie for, sur la ebenaĵo de Mauriacum ĝi montris sin

⁶ Transilvanio, dum mil jaroj parto de Hungario. La tie loĝantaj hungarlingvaj sikuloj konsideras sin posteuloj de la hunoj, kiuj sub la gvido de reĝido Csaba [ĉaba] setlis tie.

lastafoje, kaj poste por eterne estingiĝis. (*al Soardo*) Dankon, komandanto Soardo! Vi povas foriri. Sed pli malfrue mi bezonos vin. Ĝis tiam manĝu, trinku, ripozu iom, vi ja bezonas tion.

Soardo

Mi komprenas, mia reĝo (*foriras*).

Atilo

(*al Leono*) La naturo hororas antaŭ vakuo. Kaj se kulturo dekadencas, ĝialoken penetras io alia. De nordo sovaĝaj ursoj kaj lupoj migras suden, ĉar jam nenio fortimigas ilin. Ili venas en viajn urbojn kaj voras vin.

Leono

Vi estas ĉi tie. Vi povus defendi nin.

Atilo

Hodiaŭ matene vi venis petegi, por ke mi ne perdigu vian popolon. Kaj nun vi jam petas min pri defendo.

Leono

Kiel vi saĝe citis la grandan Arĥimedon, la naturo vere hororas antaŭ vakuo. Timo kaj zorgo alkondukis min. Vi disigis mian timon, sed la zorgoj pro mia urbo, mia popolo kaj la fideluloj restis. Kaj al kiu mi povus turni min por protekto, se ne al la sinjoro de la mondo?

Atilo

La aferoj rapide turniĝas ĉi tie.

Leono

Ni vivas rapidajn tempojn. Romo travivas sortoturnajn momentojn, kaj tiafoje la tempo galopas.

Atilo

Mi scias. Sed komprenu, sankta patro, Italio estas ne mia patrujo. Mia belega patrujo situas malproksime, kaj mi returnos min antaŭ la alveno de la vintro. Sed mi volas, ke vi kapablu defendi vin. Tial mi donas armilon en viajn manojn, armilon, kiu defendas vin kontraŭ ajno kaj ajniu.

Leono

(levas la brakojn antaŭ sin) Rigardu min! Mi estas maljunulo kaj ankaŭ miaj akompanantoj estas maljunaj. Ni jam ne povas batali. Ĉu ni militu per niaj bastonoj, sur kiuj ni apogas nin? Bataloj estas farendo de soldatoj. Kaj vi, skitoj estas bonaj soldatoj. Ni povas bone preĝi. Sed tio bedaŭrinde ne sufiĉas.

Atilo

Ĉu vi ne memoras, kion mi rakontis al vi pri Hargito kaj Karpato? Hargito havis nenion, tamen elaĉetis sian sangofraton Karpato el la mallibereco. Li donis la lumon de siaj okuloj por li. Ĉu vi memoras, kion vi diris, kiam mi rakontis prie?

Leono

Mi diris, ke tio estis ekzemplo de memofera amo.

Atilo

Ne. Vi diris: “ĉi tiu historio temas pri la forto de la memofera amo”. Vi ellasis la kernon, la forton. La forton de la amo. Tiun forton, kiu estas alispeca, ol kiun la koruptanimaj romiaj imperiestroj konas. Ĉi tiu pura, sunluma forto estas la plej sekreta armilo de la skitoj. Ni tiel amas unu la alian, kiel la vivanta naturo amas la sunon. Ni pretas por ĉiuj oferoj por la aliuloj. Sed ni alianciĝas tamen ne por la morto sed por la vivo. Kaj dum ĉi nia kapablo restos, ni estos nevenkeblaj. Ĉi tiun scion mi volas transdoni al vi episkopo Leono, por ke vi kunportu ĝin al via popolo. Ĉu vi memoras? Jesuo testamentis al siaj disĉiploj, ke ili tiel amu unu la aliajn, kiel li amis ilin.

Leono

Sian vivon li donis por ili.

Atilo

Nia respondo estas: per la forto de ĉi tiu mirinda amo oni povas rekrei la mondon. Ne eblas tiom pereigi urbon aŭ eĉ tutan landon, por ke per la forto de la amo oni ne povus rekonstrui ĝin.

Leono

Ĉu diras tion vi, reĝo? Sed vi ja murdas, rabas, forbruligas urbojn, la

tuta mondo teruriĝas de vi.

Atilo

Ni ne murdas, nek rabas, nek forbruligas pli ol viaj imperiestroj kaj militestroj. La restintoj de la gaŭloj kaj keltoj plorante rememoras Julion Cezaron. La loĝantoj de Kartago kaj aliaj formortintaj popoloj rakontas, se ili vivus, pri hororaj masakroj fare de romianoj, ke ili ekstermis iliajn florantajn kulturojn, restis el ili nur lastaj atestantoj. Sed mi parolas pri io alia. Amo kaj malamo, amo kaj murdado, amo kaj detruado estas kiel lumo kaj ombro. Neniu el ili povas ekzisti sen la alia, kaj se unu ie aperas, ĉeestas ankaŭ la alia. Sed la lumo de amo estas miloble pli forta ol la obskuro de malamo. Levu nokte brulantan torĉon kaj vi vidas la vojon. Malfermu ŝlositan keston ĉe taga lumo, kaj la malhelo en ĝi disiĝas. Ankaŭ amo estas tia kiel lumo. Ĝi donas forton. Ĉi tiun forton mi volus transdoni al vi. Ĉar ni devas foriri de ĉi tie. Vi scias, episkopo Leono, ni skitoj estas kiel la orienta vento. Ni inundas okcidenton, trapasas senmalhelpo ĉiujn terojn, sed fine ni hejmeniĝas. Sed ni restigos al vi la sekreton de la kapablo transvivi: estu forta en la animo, kaj tiam vi estos forta ankaŭ en la korpo! Povu ami viajn samgentanojn kaj vian propran dion, kaj tiam la lancoj de la malamiko forsaltas de vi! Mi ne diras, ke vi ne mortigu, ĉar kelkfoje oni bezonas mortigi, por povi vivi. Sed mi diras, estu ĉiam preta por indulgo. Se vi devas batali, liberlasu la drakojn de kolero kaj la tigrojn de furiozo, sed la kapon de la serpento de malamo distretu, ĉar malamo estas pli venena ol la veneno de la plej mortiga serpento. Rememoru la vortojn de la granda Cicero, laŭ kiu Romon faris granda ne ĝia loĝantaro, ĉar ankaŭ la ĝermanoj kaj hispanoj estis pli multaj, nek ĝia ruzo, ĉar la punikoj estis nesupereblaj en ĝi, nek ĝia batalemo, ĉar en ĝi la gaŭloj estis pli bonaj, sed ĝia pieco. Ja ĉiu romia civitano sciis, ke ĉiun ilian agon kaj ĉiun ilian minuton akompanas la nelacigebla atento de la dioj. Tio levis Romon sur la zeniton de la homa ekzistado. Sed kiam en sia bona sorto la romianoj forturnis sin de siaj dioj, ankaŭ tiuj forturnis sin de ili. Kaj la ceteron vi scias.

Li kaptas la manon de la papo.

Sed nun nova suno ekbrilis sur la ĉielo, la tago de Jesuo Kristo, kaj mi konvinkigis, ke vi povas fidele kaj sindediĉe sekvi lin. Vi sentas la neŝanceleblan atenton de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito, kaj jes ja, ankaŭ tiun de la Patrino en viaj agoj, ankaŭ en viaj pensoj. Tiel, kiel la romianoj en la tempo de Cicero. Tial per via helpo foje levigis el Romo nova imperio, kiu konkeros la mondon. Tiu estos la imperio de amo. Kaj ĝia flago, via papa flago tiel brilos per sia ora lumo kiel la suno.

Leono

Kial min vi elektis? Kial ne Atanzion?

Atilo

Mi atendis ĉi tiun demandon. Vi devas scii, episkopo de Romo, ke mi konsentas pri la instruo de Ario. La Plejalta Dio, la Kreinto de la mondo ne povas morti, ĉar Li staras super vivo kaj morto. Nek Li povas maljuniĝi, ĉar Li staras super la tempo. Li regas super la forpaso. Tiel do Jesuo ne povis esti identa kun Li, Jesuo ja naskiĝis de Sankta Maria, el infano li kreskis adulto, poste li mortis. Sed li reviviĝis kaj supreniris al la Patro, kiu levis lin al si. Mi vidas Jesuon duondio, kaj ne efektiva dio el la efektiva Dio, kiel vi konfesas. Tamen mi stariĝas al via flanko pro la kaŭzo, ke en la sekvantoj de Ario malamo kaj envio estas pli fortaj ol amo. Kaj sur la ŝtonoj de malamo oni ne povas konstrui la templon de amo. Atanzio petis min, ke mi igu mortigi vin, antaŭ ol vi povus ekparoli. Mi fariĝis scivola, kion vi diros al mi?

Leono

Mi diris nenion. Mi nur sidis kiel maljuna stultulo. Kaj nenio enkapiĝis al mi.

Atilo

Jes ja, vi diris ion. Vi diris, ke la fusto de mia glavo estas kurba.

Leono

Kaj ĉu tio konvinkis vin?

Atilo

(ekridas, aliras kaj kisas papon Leono sur la frunto) Ĉi tiun batalon

gajnis vi. Sola, apogante vin sur ĉi tiu vere kurba bastono vi atingis, ke de nun ĉio estu laŭ via instruo. La potenca skita armeo klinas sian kapon antaŭ vi, papo Leono. Kaj ankaŭ mi klinas mian kapon.

Li genuiĝas kaj kisas la manon de la papo.

Ĉar vi estas aminda homo, kaj ĉi tiu amo emanis el vi de la unua minuto. Vi estas bona paŝtisto de la konfidita grego. Al mi gravas ne nur tio, kion vi diras, sed kiel vi diras tion. El via buŝo la Vorto bele sonas. Eĉ tiam, se mi alie komprenas kelkajn aferojn.

Li venas antaŭen, kaj de tiam lia voĉo ŝanĝiĝas, fariĝas pli sublima, pli sonora.

Tial mi, Atilo, laŭ dia graco reĝo de la skitoj, filo de Bendeguzo, nepo de la granda Magoro, sango de la potenca Nimrodo, kiu naskiĝis en Edeso kaj plenkreskis en Sikambrio, kiu estas sinjoro de la hunoj, medoj, ĝermanoj kaj gotoj, keltoj, hungaroj, panonoj kaj danoj, teruro de la terĝlobo proklamas ĉi-voje mian volon. Mi disponas tiel, ke Leono la Saĝa, la tera vikario de Jesuo Kristo, posteulo de la apostolo Sankta Petro estu la deponanto de la sole savanta kredo. Ĉiuj lin sekvu, lin aŭskultu! Neniu cedu al aliaj tentoj!

Fore ekgongas sonorilo, iu alia aliĝas al ĝi, poste ankoraŭ unu.

Leono

Viaj vortoj skuas min.

Atilo

Kvankam la plimulto ankoraŭ ne estas dirita. Tio estos vere skua. Tial mi petas vin, sankta patro, nun retiriĝu por iom da ripozo, ĉar mi devas plenumi aferojn, en kiujn mi ne volus entiri vin. (*krias*) Gvardiano! (*Enpaŝas huna armito.*) Akompanu papon Leono en mian tendon kaj zorgu, ke li spertu mankon en nenio! (*al Leono*) Baldaŭ mi sciigos vin, patro, se alvenos via tempo. Dume forripozuzo la penojn de la vojaĝo!

Leono kaj la gvardiano eliras.

10a sceno

Samloke.

Atilo

Soardo!

Soardo

(enpaŝas) Vi vokis min, sinjoro.

Atilo

Soardo, vi estas mia unua komandanto. Ĉu mi povas fidi vin?

Soardo

Vi ja scias sinjoro, ke vi disponas pri miaj vivo kaj morto.

Atilo

Ĉu vi amas min, Soardo?

Soardo

Mia reĝa moŝto! Mi amas vin pli ol mian vivon.

Atilo

Ĉu vi faros ĉion, kion mi petas de vi?

Soardo

Petu, sinjoro, ke mi mortigu min, kaj mi feliĉe mortos laŭ via ordono.

Atilo

Mi petas vin, ke ekstermu ĉefepiskopon kaj liajn fidelulojn ĝis la lasta en Raveno. Domaĝu nek virinojn, nek kadukulojn! Kaj kiujn vi tamen lasas vivaj, tiujn forpelu malproksimen. En Italio la sekvantoj de episkopo Ario ne povas resti. Eĉ la memoron de Ario vi devas forviŝi.

Soardo

Mi komprenas, sinjoro. Kvankam ne tute mi komprenas. Hieraŭ ankaŭ ni estis ankoraŭ arianoj kaj batis la katolikojn.

Atilo

Tio estis hieraŭ. La mondo turniĝis. Nun la bonŝanco ridetas al la kato-likoj.

Soardo

Ĉu ne eblus indulgi ilin? Nur simple forpeli ilin, por ke ili iru for en bona hor'.

Atilo

Ne eblas.

Soardo

Pardonu min, via reĝa moŝto, ke mi demandas. Mi ja plenumos vian ordonon, kiel vi deziris, sen pripenso, per mia tuta forto kaj el mia tuta koro, tamen estus pli facile mortigi virojn, virinojn, maljunulojn kaj infanojn, se mi scius, kial mi faras tion.

Atilo

Infanojn ne mortigu! Infanoj estas donaco de Dio. Ilin lasu iri en sekuran rifuĝejon. Kial vi devas tamen mortigi? Tial, Soardo, ĉar en Italio kaj en tuta Eŭropo nova Suno de nova epoko leviĝis sur la ĉielon. La brila lumo de nova dio inundis la tutan mondon. Jesuo Kristo regas, kaj ne eblas, ke duspecaj Jesuoj ekzistu, ĉar tiam la duspecaj diokredoj disŝiros la mondon. Tiam la homoj murdos sin reciproke en la nomo de Jesuo. Tiam en la nomo de la sole savanta kredo oni ĵetos sin sur la herezulojn, por ke poste la transvivintoj en la nomo de la alia sole savanta kredo buĉu la adversulojn.

Soardo

Ĉu do nun ni devas mortigi, por ke poste ne estu pluaj mortigoj en la nomo de Dio?

Atilo

Vi komprenis min, Soardo.

Soardo

Mi komprenis vin, sinjoro, sed mi ne certas, ke se ni plenumos ĉi tiun kruelan taskon, ĉu ne restos drakodontoj ie-tie nerimarkitaj, kiuj se

semitaj, kreskigos novan nekomprenon... Ĉar tiam ĉio rekomenciĝos ekde eko.

Atilo

Eble estos tiel. Sed nun la respondeco de la decido troviĝas en mia mano, kaj ĝi dirigas per mi, ke estu unu dio en Eŭropo kaj unusola adoro.

Soardo

Vi deziras krei la imperion de amo per sango kaj morto. Mi plenumos vian ordonon, reĝa mosto, sed mi timas, ke la Sinjoro de la Ĉieloj kolektos tie supre la popolon de la skitoj, kaj punos nin pro tio.

Atilo

Se ni devos puniĝi, estu do tiel. Se la praa skita popolo, migranta sur la senfina landvojo de la tempo, devos eĉ por ĉiam malaperi, ĉar ĝi purigis per sango la vojon por la imperio de amo, tiam ni malaperu tute. Sed iel ajn okazos, ni malfermos novan epokon en la historio. Kaj ĉi tiu epoko daŭros jarmilojn. Preparu vin, Soardo! Morgaŭ ni iros al Raveno. Sed hodiaŭ vespere ni ankoraŭ havos festenon ĉi tie.

Kurteno

DUA AKTO

11a sceno

Samloke, la tendaro de la skitoj. Noktas. El la fono aŭdiĝas sonoj de la festeno. Muziko, kantoj, krioj. Lumo de torĉoj flagras. Krimhildo aperas. Venas antaŭen.

Krimhildo

Kial vi punas min, sorto? Kial vi turmentas min tiel senindulge? Mi perdis la viron, kiun mi vere amis. Tra dek tri jaroj mi funebris lin, kaj dum la dek tri jaroj la doloro eĉ iom ne mildiĝis. Ho, kiomfoje mi petis vin, forprenu mian vivon! Kiomfoje mi petegis, ke kunportu min en la submondon, post mian Sigfridon! Sed vi ne aŭskultis min. Mi sciis ĉiam, ke la Providenco kreis min por mia Sigfrido. Ho, jes, tiel mi sciis ĝis la hodiaŭa tago, kiam mi ekvidis viron, kaj tremo kaptis miajn korpon kaj animon. Kio estis tio? Kio okazis al mi. Kial mi ekvidis lin?

Ŝi rimarkas la rokon, sur kiu Atilo sidis, reveninte de la ĉasado; ankaŭ ŝi sidiĝas.

Ĉi tie, sur ĉi tiu roko li sidis. Laca, malpura, en ŝirita vesto. Kaj mi tamen vidis lin tre bela. La memoro de mia Sigfrido disvaporigis kiel sonĝo, kaj mi jam vidas nur lin, dum li sidas sur ĉi tiu roko.

Ŝi stariĝas, ŝia voĉo ekfrapas.

Damnita sorto! Vi ludis kun mi malican ludon! Mi revidis lin ĉefloke de la festeno. Ho ve al mi, mi enamiĝis al reĝo, kaj la majesta reĝo eĉ rigardon ne ĵetis al mi. Li eĉ ne rimarkis min inter la multaj amuziĝantoj. Mi estas malsaĝa, kion mi imagas pri mi? Kial li bezonus vidvan principinon el la sombra Burgundio, kiam li povas ricevi centojn laŭ sola voko el puceloj de la submetiĝintaj popoloj? Ho, fato, ho malicaj demonoj, kial mi ekvidis tiun ĉasiston? Kaj vi, ĉasisto! Kial vi ne mortfaligis la pelatan cervon per viaj sagoj? Kial mian koron vi trapafis? Kien mi iru, kien mi fuĝu? Ho ve, Krimhildo, Hildo, Ildo, vi kompatinda malsaĝulino, kial vi ne povis gardi vian koron?

Dum ŝi parolas, Atilo aperas, malrapide kaj singarde proksimiĝante al Krimhildo.

Atilo

Jen, do ĉi tie vi estas, belega princino.

Krimhildo ektime retretas, sed Atilo kaptas ŝian manon.

Ne! Ne forkuru! Ne fuĝu de mi! Ankoraŭ restu kun mi kelkajn minutojn! Lasu al mi kredi, ke vi estas realo kaj ne nur bela songo, mistera aperaĵo, la plej bela feino el la reviviĝintaj legendoj de mia prauloj. Eksciu, dum la tuta vespero mi deziregis alparoli vin.

Krimhildo

Sed vi eĉ ne ĵetis al mi rigardon.

Atilo

Dum festeno ĉiu rigardas la reĝon. Al kiu li dediĉas atenton, kiom longe lia rigardo ripozas sur iu. Kies rideton li recipokas, al kiu li donacas kelkajn vortojn. La okuloj de la reĝo ne povas rigardi tien, kien lia animo deziras, ĉar tiam li malkaŝus sian malforton. Sed okulangule mi observis vin. Kaj mi atendis la minuton, kiam vi elpaŝos el la tendo, kaj mi postrapidis vin. Nun la etoso interne atingis sian kulminon, kaj tiel ĝi restos ĝis mateno. Nun la reĝo ne plu mankas tie, ĉar gajo kaj la vino fariĝis la sola sinjoro. Kaj mi postrapidis vin, belega sinjorino, por vidi vin, por povi tuŝi vian manon. Eksciu, ke hodiaŭ posttagmeze, kiam mi revenis de la ĉasado, per la radioj de viaj okuloj vi vundis mian koron.

Krimhildo

Reĝa moŝto, vi ja lertas amindumi. Ĉe kiom da virinoj vi ekzercis la kapablon diri tiel belajn vortojn?

Atilo

La vortojn de amo ne eblas akiri per ekzerciĝo. Ĉar gravas ne tio, kion vi diras, sed kio emanis el viaj vortoj. Amon ne eblas mensogi, Krimhildo. Kaj mi enamiĝis al vi. Tuj. Ĉe la unua rigardo.

Krimhildo

(suspiras) Ĉielo mizerikorda! Ĉu ĉe la unua alrigardo? Ĉu mi povas kredi?

Atilo

Ja certe.

Krimhildo

Nu, mi same. Dum vi sidiĝis sur tiu roko, la amo tuj subigis min kiel dekkelk-jarulinon. Mia frato ankaŭ skoldis min pro tio.

Atilo

Kiel mi alparolu vin? Kiel nomis vin viaj patro kaj patrino?

Krimhildo

Por ili mi estis Hildo, kaj se ili volis pli karesi min, do Ildo.

Atilo

Do mi same nomos vin Ildo, eĉ Ildiko. Kaj Stelo kaj Sunradio kaj Ora Brilo kaj Sonoranta Rideto, se vi permesas, ke mi amu vin.

Krimhildo

(ridas) Mi ja amas vin!

Atilo

(manprene rekondukas ŝin al la tendaro) Venu! Mi donos al vi la tutan mondon! Rigardu, kiel bela estas la mondo en la frumatena duonlumo! La sunbrilo malrapide trabrilas la arbojn kaj arbustojn, ĵetas kaŝrigardon tra la tendaj aperturoj, tiklas la nazotruojn de la dormantoj, por ellogi terojn.

Krimhildo ekridas.

Ĉu vi kutimas terni?

Krimhildo

Malofte.

Atilo

Mi ofte. Aparte se mi elpaŝas el ombro al sunlumo. Mia nazo estas lunsentema. Ĉu mi montru?

Li rigardas en la krepuskantan lumon, kaj post ioma grimacado li eligas laŭtan ternon, poste alian.

Krimhildo

(*ridas*) Vi trompis! Tiu ne estis vera terno, nur imitata, jen kiel! (*imitas ternon.*)

Atilo

Mi ne trompis, tio estis vera terno.

Krimhildo

(*ridas*) Jes ja! Vi trompis.

Atilo

(*brakumas kaj kisas ŝin*) Vi pravas. La terno estis falsa. Sed la kiso vera (*ree kisas ŝin*).

Krimhildo

Kaj kiel dolĉa!

Atilo

Mi volas, ke vi iĝu mia edzino.

Krimhildo

Ĉu vi volas?

Atilo

Mi deziregas.

Krimhildo

Ĉu vi ĉiufoje ankaŭ atingas, kion vi deziras?

Atilo

Ĉiufoje.

Krimhildo

Ĉu ankaŭ nun?

Atilo

Mi esperas.

Krimhildo

Ĉu unu kiso sufiĉis por la decido?

Atilo

Estis ne unu kiso. Ja du.

Krimhildo

Kaj kioma via edzino mi iĝus laŭrange, majesta sinjoro?

Atilo

La unua.

Krimhildo

Nu jes. Hodiaŭ. Kaj morgaŭ?

Atilo

Kaj morgaŭ la unua kaj la sola.

Krimhildo

Vi ja eĉ ne konas min.

Atilo

De cent mil jaroj mi konas vin. Vi vivis en la suspiroj de ĉiu mia praulo, vi flugis sur la mirakla ĉevalo en niaj legendoj, al vi la batalistoj kantis tristajn amkantojn ĉe la bivakfajroj, via voĉo sonoris en la kantoj de niaj patrinoj kaj filinoj, vi brilas surĉiele en la plej belaj konstelacioj, por vi rajdas la ĉielaj migrantoj sur la Vojo de la Batalistoj, vi estas la suno, la luno kaj steloj, vi estas printempa vento, vi estas ĉielarko postpluva, vi estas dolĉaodoro, emananta el la pluvhumida tero, vi estas vespera ripozo, kaj aŭrora vekigo... Ĉu vi do vidas, kiel malmultaj estas la cent mil jaroj, de kiam mi konas vin? La tempo urĝas, ĉar oni vivas ajne longe, retrospekte ĉio estas jam nura momento. Mi trovis vin, Ildiko kaj ne volas perdi vin. Belega burgunda princino, diru jeson! Atilo, la reĝo de la skitoj petas vian manon. Estu mia edzino! Estu la reĝino de Skitio kaj de la tuta mondo apud mi!

Krimhildo

Viaj vortoj skuas min. Neniam viro parolis al mi tiel bele. Vi estas mirinda homo, majesta sinjoro. Mia koro tremas. Mia tuta korpo tremas. Mi deziregas vin kaj volas senti vian brakumon kaj timas tamen, ĉar kvazaŭ mi songus... Kaj estus terure vekigi kun amara seniluziigo. Tio

estus la tragedio mem.

Atilo

Ne estas tragedioj. Nur realigitaj sonĝoj. Kaj homoj, kiuj fortimiĝas de sonĝoj, anime neniam dormiĝas, tial ilia animo neniam povas vekigi. Sed ni estas homoj, kiuj kuraĝas sonĝi kaj ne timas vekigi. Ni scias, ke ni devas vivi la vivon profunde, kun varmega pasio... Ĉu vi ŝatas la odoron de rozo?

Krimhildo

Mi ŝatas. Rozo estas mia ŝatata floro.

Atilo

Mi pensis. Kion vi pli dezirus? Ĉu ŝarĝoĉaregon da rozoj, pakitaj unuj sur aliaj, plie jam sen odoro, pliparte jam velkintaj, aŭ unu pecon da pompa rozo, kies odoro plenigas vian animon kaj el kiu feliĉo emanis al vi.

Krimhildo

(*ridas*) Reĝa moŝto! Ĉu estas virino, kiu kapablas kontraŭstari vian sieĝon?

Atilo

Ne. (*ridas*) Kaj ankaŭ ne estu! Sed mi volas konkeri la koron nur de unu virino.

Krimhildo

La pordo de tiu koro jam malfermiĝis al vi, kaj atendas senpacience, ke ĝi estu tute la via. Mi edziniĝos al vi, Atilo, reĝo de la skitoj, kaj mi promesas esti por vi bona edzino. Dio min tiel helpu!

Atilo

Kaj mi nun recitos al vi la sekretan preĝon de la skita popolo. Venu, sidiĝu ĉi tie sur la roko!

Krimhildo

(*sidiĝas*) Ĝuste ĉi tie vi sidis, kiam mi unuafoje ekvidis vin...

Atilo

(*metas sian fingron sur la buŝon de Krimhildo*) Ps! Nur aŭskultu la preĝon!

La tekston de la kanto li recitas parole, ne kantas ĝin.

*La ĉevalon ligis mi al arbo poma,
Min mem mi alligis al viol' odora.
Ĉe lunlum' ĉevalon mian mi malligos,
Sed de vi violo morto min disigos.*

Krimhildo

Ho, kiel bela!

Atilo

Ĝi havas ankaŭ melodion, sed mi ne povas kanti. Mi ne havas bonan aŭdsenson. Vi terurigu, se vi aŭdus min.

Krimhildo

Estus tre bone aŭdi la kanton. Mi sentas, ke la melodio estas pli bela eĉ ol la teksto.

Atilo

Efektive tre bela.

12a sceno

Samloke. Aperas Soardo en la fono. Post ioma hezito li venas antaŭen.

Soardo

Pardonu min, reĝa moŝto! Mi serĉis vin ĉie. La suno jam leviĝis, kaj se ni volas ekvoji al Raveno, konsilindas agi kaj paki.

Atilo

Diru, Soardo! Vi ŝatas kanti, ĉu?

Soardo

Mi ne neas.

Atilo

Se mi bone scias, vi kantas bele.

Soardo

Multaj laŭdas mian voĉon.

Atilo

Mi prezentas al vi mian fianĉinon Krimhildo, principinon de Burgundio. Mi edzinigos ŝin.

Soardo

La beno de Dio estu sur vi ambaŭ, reĝa moŝto. Mi bonvenigas vin, princina moŝto, bela floro de la burggrundoj.

Atilo

Ne burggrundo, sed burgundo.

Soardo

Ne burggrundo sed burgundo. Mi notas al mi, reĝa moŝto. Ne burggrundo, sed burgundo (*flanken*) Burggrundo, burgundo... ja kia diferenco?

Krimhildo

Mi same salutas vin, komandanto! Mi ĝojas, ke mi ree vidas vin. Kiel vi vidas, la burgundia floro lavis sin.

Soardo

Pureco estas duona sano, sinjorino. (*al Atilo*) Reĝa moŝto, kion mi devus kanti?

Atilo

Kantu al ni *La ĉevalon ligis mi al arbo poma*, por ke Krimhildo povu ĝin ekkoni.

Soardo

Volonte mi kantas ĝin. Sed ĝi estas amkanto, sola ne estas bone kanti ĝin. Reĝa moŝto, mi opinias, ni povus konsistigi bonan ĥoron, se vi kunkantus, kaj la princino povus zumi la melodion. Ĉu ni provu?

Atilo

Ni provu!

Soardo

Muzikistoj! Ĉi tien!

Envenas kelkaj muzikistoj, kiuj akompanas la kanton. Soardo gvidas la kantadon, sed ankaŭ Atilo kunmurmuras; Krimhildo zumante aliĝas.

Malnova kanto ĝi estas, princino. De tempoj nememoreblaj ĝi estas kantata de nia popolo. Oni rakontas, ke jam ankaŭ princo Hunoro amindumis per ĝi al sia amatino. Nu, kiel ajn tio okazis, unu afero certas, jam multaj enamiĝintaj skitoj kantis ĝin... Ĝi komenciĝas jen tiel...

Li mangestas, la muzikistoj ekludas.

*La ĉevalon ligis mi al arbo poma,
Min mem mi alligis al viol' odora.
Ĉe lunlum' ĉevalon mian mi malligos,
Sed de vi violo morto min disigos.*

Ili ripetas la du lastajn versojn.

*Envenu birdet', envenu, mia koro!
Kaĝon mi farigis kun pordet' el oro
Kaĝon el arĝento, kun pordet' el oro
Trogon el marmoro por vi, ho, idolo.*

Post la ripeto de la du versoj li turnas sin al Krimhildo.

La nun sekvantan parton virino kutimas kanti.

*Mi ne dormas, mi ne dormas en la kaĝo
Mi ja iras, mi ja iras en arbaro,
En arbaro verda, al mi grajnojn beki
Al mi grajnojn beki, dolĉan roson leki.*

Krimhildo

Belega kanto! Kaj kiel trista. Ĉu skitaj geamantoj neniam povas esti felikaj?

Soardo

Malgraŭ ĉio la birdetoj tamen eniras la kaĝon... (La muzikistoj finas.)

Krimhildo

Mi konjektis.

Soardo

Reĝa moŝto, nun ke ni satkantis, ĉu ni ne devus ekvoji al Raveno? La suno jam iras alte, kaj ankoraŭ eĉ unu arianon ni ne forhakis.

Li mansignas, la muzikistoj eliras.

Atilo

Intertempe la plano ŝanĝiĝis, Soardo. Ni forhakos neniun. Vi pravas. La imperio de amo ne kreeblas per sango kaj morto. La ĉielo ne pardonus nin. Ni iros al Raveno, sed ni jam ne bezonas rapidi. Ni iros ne mortigi, nek perdiĝi, sed fari juston. Iru, mia bona militestro, informu la tru-pojn pri mia decido. Raveno ne estas malproksime, sufiĉos ekvoji pli malfrue.

Soardo

Hm, hm, se mi antaŭscius tion, mi estus somnolinta post la festeno... Sed ankoraŭ mi ja povas fari... Reĝa moŝto! (*klinas sin kaj foriras*)

13a sceno

Samloke.

Krimhildo

Kurioza homo vi estas, reĝo Atilo. Vi havas la potencon forviŝi popolojn, sed nun tamen ne venĝo movas vin sed indulgo. Kiom alia vi estas, ol kion oni rakontas pri vi!

Atilo

Kion oni rakontas?

Krimhildo

Prefere mi ne dirus.

Atilo

Eldiru sentime! Mi havas konjektojn. Oni rakontas, ke mi trinkas santon de infanoj, ĉu?

Krimhildo

Jes.

Atilo

Ĉu ankaŭ, ke mi estas senindulga?

Krimhildo

Jes.

Atilo

Kaj kion oni ankoraŭ parolas?

Krimhildo

Prefere mi ne daŭrigus.

Atilo

Jes ja! Eldiru! Ni estu trans tio. Kion plian oni ankoraŭ rakontas pri mi?

Krimhildo

Estas tre malfacile... Mi timas eldiri...

Atilo

(kaptas ŝian manon) Rigardu al mi en la okulojn! Tiel estos pli facile.

Krimhildo

Majesta sinjoro! Oni rakontas, ke vi murdis vian fraton.

Atilo

Kaj ĉu vi kredas tion?

Krimhildo

Mi kredis... sed nun mi jam ne kredas.

Atilo

Kvankam tio estas vera. Mi mortigis mian fraton Buda, kiun mi amis pli ol kiun ajn. Brulanta vundo estas en mia animo, Krimhildo, neniam resaniĝonta vundo bruligas mian animon.

Krimhildo

Ne nomu min Krimhildo. Mi volus, ke de nun mi estu por vi Ildiko. Via enamiĝinta kaj fidela Ildiko, kiu donus ĉion sian, por resanigi vian ani-

mon. Kion mi faru, mia reĝo, ke iĝu al vi pli facile?

Atilo

Kion vi faru? Aŭskultu min. La sinjoro de la mondo, la terura skurĝo de Dio konfesos al vi sian kulpon. Kaj se vi ĝisaŭskultos min, kaj povos min ami, tiam mi kunprenos vin hejmen, en la urbon de Buda, kaj tie, en tiu sankta urbo mi edzinigos vin.

Krimhildo

Mi aŭskultas vin, amato mia.

Atilo

Buda estis mia pli aĝa frato. Ne tiel denskorpa fraŭlo kiel mi, sed viro de svelta staturo, bela vizaĝo, kiun adoris virinoj. Li havis malhelajn harojn, sed brile bluajn okulojn. Mi estis pli forta, li pli lerta. Li estis elstara batalisto, neniu manipulis tiel lerte la pafarkon kiel li. Ĉu vi scias, kial oni nomas nin, hunojn skitoj? Ĉar la vorto signifas arkostreĉiston. La tuta mondo teruriĝas de niaj pafarkoj, kaj bone ĝi faras, ĉi tiuj pafiloj estas ja timindaj armiloj en la manoj de niaj batalistoj: *A sagittis hunorum libera nos Domine!* De la sagoj de l' hunoj savu nin, Sinjoro!

Kaj bone ĝi faras. Ekzercita batalisto trapafas la plej fortikan kirason el distanco de cent metroj, nome naŭdek naŭ fojojn precize super la koro de la malamiko. En nia infanaĝo ni ludis en la lulilo jam per arko. Tial ni kapablas tiel bone pafi kiel neniu alia. Buda estis tia arkisto, kiu povis faligi alte flugantan kolombon per unusola pafo, kaj ĉasante en arbaro tiel precize li trafis fuĝantan cervon, ke la sago tiel facile penetris tra ĝia korpo, ke post kelkaj paŝoj ĝi kolapsis sen suspiro, sen bleketo. Li aĝis du jarojn pli ol mi. Kune ni plenkreskis en la mirinda Sikambrio, ne tre for de la granda Isterio. Nia patro edukis nin ambaŭ regantoj. Li volis, ke post lia morto Buda surtroniĝu, kaj mi estu lia "rezervo".

Ni tre amis unu la alian. En nia ĉevalida aĝo ni multe interbatiĝis, sed tio estis plie ludo, ni instruis nin reciproke lukti. Kaj se iu atakis unu el ni, la alia tuj alkuris kaj rapidis helpi sian fraton. Post la morto de nia patro Buda decidis tiel, ke ni regu prefere kune, tiel do oni inaŭguris

nin ambaŭ reĝo. Ni dividis la imperion. Miaj fariĝis la senfinaj orientaj ebenajoj, lia la okcidenta mondo kun montoj, montetoj, sed ĉar al ni mankis la societo de la alia, post nelonge ni jam regis samloke. Kune ni komencis ankaŭ kampanjon kontraŭ la orgojla Bizanco.

Kaj tie, inter la montoj de Balkano atingis lin la mortiga pafo. Venenita sago trafis lin. La pafo ne ŝajnis danĝera, Buda mem forigis la sagon el sia brako, rompante ĝian pinton, kaj simple eltiris ĝin. Sed ĉirkaŭ vespero lia brako ŝvelis, iĝis ruĝa, kaj li sentis tiel ardan doloron, ke li ne povis resti sur la ĉevalo. Sciu, Ildiko, ni eltenas dolorojn, ĉar oni kutimigas nin al tio de la infanaĝo, sed ĉi tiu terura veneno kaŭzis tiel inferan turmenton, ke Buda kriis pro la doloro, liaj larmoj ekfluis. El la vundo gutis verda sekreciojaĵo. La kuracistoj, kiuj venis kun ni, diris, ke oni devas amputi lian brakon, ĉar se la veneno disetendiĝas en lia korpo, li mortos. Sed Buda ne permesis. Li ekkriis: kia skito estas, kies brako mankas? Unubraka arkostreĉisto ne ekzistas, por arko bezonatas du fortaj brakoj!

Oni tranĉmalfermis lian brakon tute ĝis la ŝultro, por purigi la vundon, kaj dum kelkaj tagoj ŝajnis tiel, ke la operacio sukcesis. La doloro mildiĝis. Sed iun tagon ĝi ree pliintensiĝis, kaj nun jam lia tuta korpo ardegis. Mia frato estis bonega viro, kunpremante la dentojn li toleris la suferon, sed vane, ĉar fine la doloro subigis lin. Lia tuta korpo skuigis, vane ni komprenis ĝin per humidaj lintoloj, ĝi restis fajrovarmega...

Kaj poste li silentiĝis. Lia haŭto fariĝis de tago al tago pli malvarma kaj pli griza. Li jam ne movis sin, nur kuŝis mute, kvazaŭ jam mortinta, tamen liaj okuloj vigilis, liaj lipoj moviĝis, kvazaŭ li parolus. Kiam mi klinis min proksimen, apenaŭ kompreneble mi aŭdis, ke li diras: "Atilo! Mortigu min! Mortigu min! Mortigu min! Mortigu min!" Jen tion li ripetis senĉese.

Mi sciigis al la kuracistoj, kion mia frato petas kaj demandis ilin, ĉu li estas savebla. Ili respondis, ke mankas ajna eblo. La veneno invadis lian tutan korpon, dismordis lian internon, nekomprenebla miraklo estas, ke li ankoraŭ vivas. Ili diris, ke konsilindus savi lin de la turmento, ĉar la reĝo ne meritas ĉi tiun teruran suferon. Tiam mi forpelis la

kuracistojn, sidiĝis apud li kaj ploris. Mi tenis lian malvarman manon kaj miaj larmoj faladis. “Kion mi faru, Buda? Kiel mi povus vin savi? Komprenu, mi bezonas vin! Ĝis nun ni faris ĉion kune. Mi ne povas elturniĝi sen vi. Buda! Ĉu vi aŭdas min? Revenu!” (*silentiĝas*) Sed mia frato ne respondis. Nur liaj lipoj moviĝis nehaltigeble: “Atilo! Mortigu min! Mortigu min! Mortigu min!”

Mi vokis la kuracistojn. Mi ordonis al ili, ke ili liberigu Buda de la suferoj. Ili respondis, ke ili ne povas, ĉar tio estus reĝomurdo, kaj tial la skitoj ne nur ilin buĉus, sed ĉiujn iliajn familianojn ĝis la sepa generacio. Nur mi povas mortigi lin, ili diris, ĉar mortigi reĝon senpune povas nur reĝo, kiu staras super la leĝoj. (*ekkrias*) “Sed kiel mi mortigu mian fraton? Kiel mi kapablu? Ĉu mi puŝu ponardon en lian koron? Ĉu vi freneziĝis? Ĉu tion vi volas?” Ili respondis, ke estas pli domaĝa maniero. Mi malfermu liajn vejnojn ĉe la pojno, tiam lia sango malrapide elfluos, kaj la vivo milde foriĝos el li. (*eksilentas*)

Mi faris tion...

Dio mia! Kiel mi amis lin! Mi igis forbruligi tiun damnitan arbaron, ni pereigis ĉiujn, kiuj baris al ni la vojon, mi blekis de la doloro, miaj homoj timis min, ĉar ili kredis, ke mi freneziĝis pro la funebro, kaj mi ja ne estis tro for de tio.

Poste ankaŭ tio pasis.

Fine ni ekvojis kaj revenis al Sikambrio. Mia frato estis katafalkita sur la ĉefplaco de la urbo. Tie la popolo adiaŭis sian amatan reĝon, kaj tie adiaŭis lin ankaŭ lia frato Atilo, kiu mortigis lin. Mi igis staki brulŝtiparon kaj cindrigis lian korpon. Lian cindron la pastro ŝutis en Isteron.

Kaj tiutage mi alprenis reĝan leĝon. De nun la urbo Sikambrio portu la nomon de Buda! Kaj mi deklaris leĝon ankaŭ pri tio, ke la nomon de Atilo konservu nek vilaĝo, nek urbo, nek rivero, absolute nenio. Neni-am. Nenio.

Jen mia historio, Ildiko. Se ankaŭ nun vi ankoraŭ volas, mi kunprenos vin en la urbon Buda kaj tie mi festos kun vi nian nupton en la palaco, kies ĉiu ĉambro kaj ĉiu fenestro konservas la memoron de la du iam

vivintaj feliĉaj, junaj princoj.

Krimhildo

Mi iros kun vi, reĝo Atilo. Kaj sciu, nun mi pli forte amas vin, ol kiam mi ekvidis vin.

Atilo

Ni do ekvoju! (*stariĝas*) Unue al Raveno, kaj kiam ni restarigis la ordon, tiam plu al Buda! (*ambaŭ for*)

Kurteno

14a sceno

Raveno, placo antaŭ la preĝejo Sankta Apolinario. Ĉefepiskopo Atanzio ŝteliras el la pordo de la preĝejo; singarde li ĉirkaŭrigardas. Post nelonge Edekono aperas.



Atanzio

Kiaj novaĵoj?

Edekono

Malbonaj. Sed povus esti eĉ pli malbonaj. La reĝo stariĝis al la flanko de papo Leono kaj decidis forpeli vin el Raveno.

Atanzio

Malbonaj novaĵoj. Kial vi diras, ke ili povus esti eĉ pli malbonaj.

Edekono

Ĉar unue li volis, ke la skitoj buĉu ĉiujn arianojn, sed sub la efiko de sia nova amatino li rekonsideris kaj nur ekzilos vin. Kaj viajn preĝejojn li donos al la katolikoj.

Atanazio

Terure. Tio egalas ja morton. Ario ĉesos ripozi en sia ĉerko. Kaj li ne trovos pacon, ĝis ni venĝos nin pro ĉi tie bato. Kiu estas tiu virino?

Edekono

La princino de Burgundio. Ŝi alvenis kun sia frato, por peti protekton de la reĝo, ĉar hejmlande ŝi implikiĝis en murdan malkonkordon.

Atanazio

Ĉu bela virino?

Edekono

Afero de gusto. Mi preferas la pli rondajn.

Atanazio

Ĉu koruptebla?

Edekono

Apenaŭ, mi kredas. Ŝi enamiĝis ĝisorele al la reĝo.

Atanazio

Ĉiu virino estas tentebla. Oni bezonas nur koni la ŝlosilon.

Edekono

Se vi tiom kompetentas pri virinoj, kial vi demandas min? Sed mi diras ion al vi, Atanazio, falinta ĉefepiskopo de Raveno. Kiom ajn la reĝo ŝatas ĉi tiun virinon, apenaŭ ŝi povus influi liajn decidojn. Kaj mi ne certas eĉ pri tio, ĉu alveninte li ne rekonsideros ĉion kaj ne palisumos kelkcent arianojn, nur por iom amuziĝi. Vi ne konas la skitojn, kaj malpli la reĝon de la skitoj. Vi faros pli saĝe, se laŭeble plej baldaŭ vi forfuĝos.

Atanazio

Mi scias, ke mi devas fuĝi, kaj vi povas certi, Edekono, ke mi ne longe restos ĉi tie. Mia situacio estas al mi klara, sed la aferon de la venĝo mi ankoraŭ devas aranĝi. Se mi ne povos uzi la virinon por tio, mi bezonos elekti alian solvon. Helpos al mi vi.

Edekono

Ne! Ion tian vi ne povas peti de mi.

Atanazio

Jes ja, mi povas. Ĉu vi volas, ke via filo multe prosperu? Tiam faru al mi etan komplezon, kaj Odoakero fariĝos romia patricio.

Edekono

Kio estus tiu komplezo?

Atanazio

Ho, vera bagatelo (*elprenas kalikon el sia vesto*). Ĉi tiun belan orkalikon vi devus donaci dum la nupta festeno al la reĝo. Sed atentu! Ne pli frue, ja neniel. Dum la nupta festeno en Sikambrio vi dece transdonos ĝin al li en akompano de la sekvaj vortoj: “Majesta sinjoro! Permesu al mi transdoni al vi ĉi tiun belan orkalikon. Papo Leono la Granda sendas ĝin signe de sia danko kaj li petas, ke el ĝi trinku la vinon en la plej bela tago de via vivo!” Tiom. Kaj poste vi bele transdonos la kalikon al la reĝo.

Edekono

Kiel venis al vi la pokalo de papo Leono?

Atanazio

Ne pokalo. Kaliko. Ni diru, ke Leono donacis ĝin al mi, kiam antaŭ ne longe ni renkontiĝis. Li sincere bedaŭris, ke mi devas forlasi Ravenon, kaj per ĝi li volis konsoli min. Sed mi ne taksas alte terajn trezorojn. La ekzilon mi volas pasigi malriĉa en malproksima monaĥejo. Tiel do ĉi tiun belan kalikon mi destinas prefere al la triumfa reĝo Atilo.

Edekono

Vi multe ŝanĝiĝis, Atanazio. Pli frue vi adoris oraĵojn.

Atanazio

La tempo ŝanĝiĝas. Prenu kaj zorge konservu ĝin. Kaj ne forgesu, kion mi petis de vi!

Edekono

Ĉu certe tion mesaĝis papo Leono?

Atanazio

Edekono! Ne estu stulta! Kompreneble, li mesaĝis nenion. Ĉio ĉi estas nur mensogo. Atentu min! La kaliko estas venenita. Se la reĝo trinkos el ĝi dum la nupta festeno, li ne ĝisvivos la sekvan tagon. Sed ne zorgu, la kaliko entenas tian venenan substancon, kiu laboras malrapide. Ĝia efiko komenciĝos nur post longaj horoj, kaj tiam vi jam estos trans montoj kaj maroj.

Edekono

Vi petas de mi teruraĵon. Reprenu la kalikon, mi ne entreprenas ion tian.

Atanazio

Edekono! Via filo jam survojas al Romo. Li venos en konvenajn manojn. Liaj severaj instrumajstroj zorge atentos lin. Ĉu vi komprenas min? Vi ne volas, ĉu, ke io misa okazu al li?

Edekono

Estu malbenita, Atanazio! Estu malbenita la tago, kiam ni renkontiĝis!

Atanazio

En la tago, kiam la novaĵo pri la morto de reĝo Atilo alvenos en Romo, Odoakero fariĝos romia patricio. Sed se venus en Romon la novaĵo, ke la reĝo feliĉe vivas plu, nu tiam la kompatindan Odoakeron povos trafi fatala malfeliĉo. Ĉu vi komprenis min?

Edekono

(elblovas kolere) Jes.

Atanazio

Do iru! Kaj konservu zorge la kalikon! Neniu ja trinku el ĝi antaŭtempe!

Malice li ekridetas. Dum Edekono foriras, li ankoraŭ postkrias lin.

Se vi estos lerta, via filo iĝos imperiestro. *(Edekono for)*

15a sceno

*Samloke. Aperas papo Leono kaj du liaj akompanantoj,
Trigecio kaj Avieno.*

Atanazio

(flanken) Ĝuste nur vi mankis. (laŭtvoĉe) Saluton al la romianoj!

Leono

Saluton ankaŭ al vi, Atanazio!

Atanazio

Jarcenta lukto jen venis al sia fino. La venkintoj enmarŝas Ravenon kaj transprenas la regadon super la urbo. Ili detruos ĉiujn preĝejojn. Ĉu ankaŭ ĉi tiun?

Leono

Eĉ unu ni ne detruos. La preĝejoj anoncas kaj anoncos la gloron de la Sinjoro, ĝis la urbo Raveno staros.

Atanazio

Nur ili iom alimaniere anoncos ĝin. La religian disputon aranĝos fine la sagoj kaj glavoj de la skitoj. Malofta sed ne nekutima procedo en la teologio. Mi trompiĝis pri vi, Leono. Diru, kiel akordas sangoverŝado kun la amo al Dio?

Leono

Tion ŝatus demandi de vi viaj katolikaj fratoj, buĉitaj en aŭ forpelitaj el Raveno. Sed vi ne donis al ili eblon por demandi.

Trigecio

Sango makulas vian manon, ĉefepiskopo. Kiel akordas sangoverŝado kun la amo al Dio? Pri tio demandu vin mem!

Avieno

Ni venis ne por batalo, nur defendi nin mem.

Atanazio

Mi gratulas. Brile vi sukcesis. Per kio vi subaĉetis la reĝon? Nun vi jam povas malkaŝi. Jam ĉio decidiĝis. Mi demandas nur pro profesiaj kialoj.

Leono

Ni bezonis subaĉeti neniun. Ni konfidis nin al Dio. Kaj la dia amo tuŝis la koron de reĝo Atilo.

Atanazio

(ironie) La dia amo... Ĉi tiuj barbaraj hunoj kompetentas nur pri murdado. Ili galopadas sur siaj viglaj ĉevaloj kaj preterkure trafas per siaj sagoj eĉ zizelon en ties truo. De ilia infanaĝo ili estas ekzercataj pri batalo kaj mortigado. Ili trasidas surdorse de siaj ĉevaloj eĉ tutajn tagojn, kvazaŭ ili estus enradikiĝintaj. La grekoj kredis ilin centaŭroj, kiam sub Trojo ili galopadis duonnudaj sur la marbordo. Centaŭroj! Hahaha! Demandu la orfojn de la italiaj kamparanoj kun trapafitaj gorĝoj, kiom da dia amo portas la plumitaj sagoj de la hunoj! Mi povis trakti la hunojn, kaj se vi ne malhelpus min, mi farus granda tutan Italion. Mi revivigus la agoniantan Romon. Jes, per la sagoj kaj eĝoj de la kurbaj glavoj de la hunoj. Per fajro kaj fero mi trudus la mondon al la omaĝo al la nova dio. Vi diras, ke la tuŝo de la dia amo sufiĉas por tio?

Ĉu vi do ne konas la historion, Leono? Ĉu vi ne lernis dum via longa vivo, ke potencon oni povas akiri nur per sango, perfido kaj perforto, kaj konservi ĝin eblas eĉ per pli da perforto? Ke ne ekzistas meritoj, nur interesoj? Ke nek amiko, nek parenco, nek frato, nek patro, nek infano helpas vin, se vi troviĝas en vera malfeliĉo, nur bone pagata soldularo?

Ĉirkaŭrigardu, Leono! Romio estas invadita de barbaroj. Hodiaŭ vi jam apenaŭ vidas naskitajn romianojn en la armeo, ĉar noblaj junuloj eĉ iom ne inklinas morti por la imperio, ili prefere dediĉas sin al siaj pasioj, kaj la batalon cedas al ambiciaj barbaroj, en kies okuloj la romia civitaneco, kaj ni ne forgesu, la romia bonstato ankoraŭ konsideriĝas altiraj. Sed kiel longe? Mi jam vidas la falon de Romo, kaj ne bedaŭras, ke ĝi devos malaperi el la mondo. Ĝi estas tro riĉa, tro oportunema, tro egoisma, tro malsaneca kaj tro malforta, por povi defendi sin de la enfluantaj popoloj de la almozaj kolonioj. Mi volis kontraŭstarigi al la

forto eĉ pli grandan forton, kaj fari la kristanan mondon tiel potenca, ke ĝi povu regi super la barbara mondo.

Ĉirkaŭrigardu, Leono! Nekonataj kaj primitivaj hordoj migradas tra la arbaroj de Eŭropo. Nenie viditaj, nenie aŭditaj popoloj aperas ne-atendite, kaj parolas en tiel teruraj lingvoj, ke niaj oreloj ekdoloras. Sed batali ili kapablas. Hodiaŭ ili estas la plej fortaj, kaj la tuta mondo kuŝas antaŭ iliaj piedoj, ĉar neniu povas kontraŭstari iliajn armilojn kaj batalistojn. Kaj la hunoj estas veraj sovaĝbestoj: tigroj, leonoj, arbaraj lupoj. Ĉu vi kredas, ke vi povas malsovaĝigi ilin per viaj belaj paroloj, preĝoj? Ba, Leono! Ili nur ludas kun vi. Atilo estas la plej ruza konkernanto de la mondo. Ion li ekvidis en vi, por kio li volas uzi vin, vian pi-econ li tenas kiel ŝildon kontraŭ mi, ĉar ankaŭ li tiel pensas, ke al forto oni devas kontraŭstarigi forton. Nun li bezonas la ŝajnon, ke jen, antaŭ la plej piaj kristanaj ŝafoj li purigas la vojon per la ekstermo de la batalemaj kristanaj lupoj. Sed alvenos la tago, kiam vi pentos, ke vi alianciĝis kun la hunoj, sed tiam estos jam malfrue. Memoru miajn vortojn, Leono!

16a sceno

Enpaŝas Prospero Tiro, la sekretario de papo Leono. Junulo ĉirkaŭ tridek-jara. Tipa librovermo, ĝeniĝema, iom hezita, iom tro peza. El dratoj fleksita, bendeca aparato estas sur lia kapo, kiu apogiĝas sur lia verto kaj oreloj, sed ankaŭ ĉirkaŭ lia frunto kaj kapo estas trakondukitaj du bendoj, por fiksi ĝin pli stabile. La aparato tenas antaŭ liaj okuloj duonpolmon da ŝlifita vitropeco kun neregula formo. Li portas rulitajn pergamenojn subaksele.

Tiro

Mi alportis la protokolojn, sankta patro.

Leono

Dankon, Prospero.

Atanazio

Prospero Tiro, kion vi havas sur la kapo?

Tiro

Oculus ocularum.

Atanzio

Kioooon?

Tiro

Mi dirus: aparato, helpanta la vidadon. *Oculus ocularum*, okulo de la okuloj. Papaj okuloj, se mi rajtas tiel vortumi. (*al Leono*) *Mille pardons*, sankta patro!

Atanzio

Tia aparato ankoraŭ ne estas inventita.

Tiro

Mi mem kreis ĝin, hazarde.

Atanzio

Kia anakronismo.

Tiro

Mi petas pardonon. Mi nur volis pli bone vidi. Kaj kiam mi rimarkis, ke peco de rompita vitroglaso pligrandigas, mi venis al la ideo, fiksi tian glason per ia lerto antaŭ la okuloj, por ke, kiam mi legas...

Atanzio

(*al Leono*) Via sekretario estas kurioza ulo.

Leono

Ni ĉiuj estas infanoj de Dio. Prospero estas klera, diligenta kaj devokonscia junulo, mi ĝojas, ke li estas mia kunlaboranto. Sed kio koncernas viajn vortojn, Atanzio, ili profunde malĝojigis min, ĉar vi multe foriĝis de la heredaĵo de Jesuo. Memoru, li testamentis al ni, ke ni amu nin tiel, kiel li amis nin.

En la fono aperas Soardo.

Atanzio

Ne instru min! Vi kompatinda erarvaganto. Nun vi atendas, ĉu, ke mi mem malaperigu min kiel forpelita hundo, por ke vi ne devu eĉ nur

tuŝi min per viaj puraj, neĝblankaj gantoj! Mi travidas vin, vi maljuna fintulo! Vi uzurpas la tronon de Sankta Petro... Sed ĝi ŝuldiĝas al mi! Al mi! Mi estas la vera heredanto de Sankta Petro! Vi ĉiuj estas erarvagantaj herezuloj! Vi ĉiuj finos sur brulŝtiparo. Mi scias, kiel oni devas interpreti la vortojn de Dio (*frapas al si la bruston*). Mi estas la vojo! Mi estas la vero! Mi estas la vivo! Mi! Mi! Mi!

Leono

Apage satanas! Foriru, Satano! Ĉu vi freneziĝis, Atanazio?! Ne prenu la vortojn de la Sinjoro sur vian langon!

Atanazio

Ĉu vi nomas min Satano? Ĉu vi jam ankaŭ la sanktecon forprenus de mi? (*ekkrias*) Mortu, Leono!

Dum li ekiras al Leono, Soardo, sekvinta la disputon kun atento, komprenas la intencon de Atanazio, kaj rapide alpaŝas strikte Leonon, kaj kiam Atanazio elkaptas ponardon el sub sia robo, por mortpiki Leonon, Soardo minuton pli frue malingas sian glavon, kaj tenas ĝin antaŭ si, sekve de kio Atanazio, pelata de la propra murda impeto, kuras kontraŭ la glavon de Soardo.

La ponardo falas el lia mano. Li kolapsas teren.

Damnita glavo... Ĝi estis pli rapida ol mi (*levas la kapon*). Sed ankoraŭ la afero ne finiĝis... Odoakero! Ne forgesu la faton de Odoakero... Odoakero...

Li sterniĝas senviva.

Leono

(*faras krucosignon*) Sinjoro, mizerikordu!

Soardo

Ne multo mankis, s-ro episkopo, ke li puŝis en vin sian ponardon.

Leono

Vi savis mian vivon. Mi dankas vin, komandanto Soardo. Mi ŝuldas al vi eternan dankon pro tio.

Soardo

Patro, tio estas mia profesio (*iras tien-reen, svingante sian glavon*).

Ho, tiu estis pompa movo. Ĉu vi atentis, papa moŝto, ke samtempe kun ĉi tiu murdisto mi malingis la glavon, eĉ, se pli bone ni ekzamenas, unu takton pli frue, por uzi lian impeton, por trapiki lin? Li eltiris sian ponardon, kaj li jam estis pikonta, kiam, ho halt, jam tie atendis la pinto de mia glavo... Sed li jam ne povis halti, ĉar la elano plupuŝis lin. Lia menso jam faris la fatalan puŝon, kiu tiel iĝis por li finofara, li ja ne plu povis halti... (*faras pikon en la aero*)

Puf!Mi ne fanfaronas, sankta patro, sed laŭ mi ĝi estis tute pompa skerma movo. Mia klingo staris rekte, ĝia pinto montris ĝuste al lia ventro, kaj li kontraŭkuris ĝin. Kaj ĉio ĉi okazis dum ono de sekundo (*faras pikon en la aero*). Mi, kompreneble, pruntis iom da forto al la glavo, iom mi ŝovis antaŭen la klingon, por ke la puŝo estu mortiga, ĉar en tia kazo, s-ro papo, oni devas unufoje por ĉiam venki la malamikon. Tiafoje jam ne estas indulgo. Aŭ li, aŭ mi.

Leono

Per siaj lastaj vortoj li parolis pri homo, nomata Odoakero. Kiu troviĝas en danĝero.

En la fono aperas Edekono.

Soardo

Edekono! Venu ĉi tien! Ĉu ne via filo nomiĝas Odoakero?

Edekono

(*terurite proksimiĝas*) Jes ja. Kio okazis al mia filo?

Soardo

Mi esperas, nenio. Atanzio, la falinta ĉefepiskopo de ĉi tiu urbo ĵus elspiris sian malican animon. Per siaj lastaj vortoj li menciis vian filon.

Leono

Li diris, ni ne forgesu la faton de Odoakero.

Edekono

Ho, tiu damnita fato!

Soardo

Ĉu io malbona?

Edekono

(konfuzite) Ĉu io malbona? Ĉu okazis io malbona? Nun, ke ĉefepiskopo Atanzio mortis, propre estas nenio malbona, tamen la vojoj de la fato estas nesondeblaj, tial facile povos okazi, ke kiam plej malmulte ni kalkulas je ĝi, la fato frapos ree, neatendite. Ho ve, kion mi faru?! Ho ve, damnita fato! Al kio vi trudas min?

Soardo

Apenaŭ mi komprenas, kion vi diras. Eble estus plej bone revidi vian filon, eble li bezonos vin.

Edekono

Jes, jes... vi pravas, grandsinjoro. *(klinas sin)* Kun via permeso mi foriras. *(for)*

Avieno

(ĝis nun silentis en la fono, sed nun paŝas antaŭen) Konfuzita homo. Mi memoras, antaŭ pli longe ni plurfoje renkontiĝis, sed pri kio ajn ni parolis, estis okulfrape, ke li neniam rigardas en miajn okulojn. Li disrigardas ĉien, sed neniam rekte, okul-al-okule.

Trigecio

Mi scias tiel, ke li tre aspiris ricevi romian civitanecon, eĉ li ambiciis pli, sed foje li subite malaperis. Mi ne scias propre, ĉu li estas skito aŭ romiano.

Soardo

(ridas) Tion ankaŭ ni volus scii.

Aperas reĝo Atilo. Li ekvidas la korpon de la tere kuŝanta Atanzio.

Atilo

Kio okazis?

Soardo

La ĉefepiskopo pikiĝis sur glavon.

Leono

Militestro Soardo savis mian vivon.

Atilo

Kaj ĉefepiskopo Atanzio mortis proe. Mi petis vin, Soardo, ne plu verŝi sangon. Per forto sed kun indulgo ni restarigu la ordon en Raveno. Apenaŭ ni alvenis, kaj la unua viktimo jam kuŝas ĉi tie.

Soardo

Punu min, mia reĝo, sed mi havis neniun elekton. Se mi ne faros tion, nun papo Leono kuŝus ĉi tie mortinta. Tamen estas pli bone, ke la afero tiel okazis, ĉar el ĉefepiskopo Atanzio fajreris malico. "La insidulo mortis, la diskordo abortis"⁷.

Avieno

Trafe dirite!

Trigecio

Vivu reĝo Atilo!

Atilo

Poeto perdiĝis en vi, Soardo.

Soardo

Majesta sinjoro, mi faris nur mian devon.

Atilo

Mi vidas.

Leono

Majesta reĝo! Alveninte en Raveno, antaŭ ĉio mi volus transdoni al vi, en la nomo de la senato kaj la popolo de Romo, donacojn, kiuj laŭ nia plej bona scio ŝuldiĝas al vi. Mi petas vin permesi, ke kun miaj kunuloj inde mi transdonu ilin.

⁷ Propre vortoj el la opero *Banuso Bánk* de Ferenc Erkel.

Atilo

Ĉi tie, en ĉi tiu preĝejo mi ĝuste preparis min teni konsilion, kaj ĝi ja estus bona okazo por transdoni la donacojn, tamen la morto de ĉefepiskopo Atanazio kreis novan situacion. Epoko finiĝis nun kaj ĉi tie, antaŭ la pordo de ĉi tiu preĝejo. Tial mi disponis tiel, ke unue ĉi tie, ekstere ni faru ordon, ĉar interne ni havos sortodecidan konsiliĝon, por kiu ni bezonas prepari nin. La mortinto estu sepultita inde je lia rango, ĉar ajnajn intencojn li havis, li tamen estis la ĉefepiskopo de Raveno. Kaj ĉi tiu placo devas esti purigita per preĝoj, fastado kaj sanktaj oferoj dis la memoro de la peko, ĉar okazos sankta konsilio, kiun ni tenos en la preĝejo, do nenio malpurigu la spiriton de la loko.

Li rigardas al Soardo, kiu rektigas sin.

Mi preskribas tri tagojn da rigora fastado por komandanto Soardo. Dum ĉi tiu tempo li ne manĝu viandaĵojn, nek prenu al si ebriigajn trinkaĵojn, same ne proksimiĝu kun deziro al virinoj.

Soardo

Mi komprenis, mia majesta reĝa moŝto. Estos malfacile, sed mi tenos min al tio. Ĉu iom da malpeza kolombosupeto mi eble povus konsumi?

Atilo

Ne.

Soardo

(suspiras) Do, reĝa moŝto, mi paŝtos min kiel ŝafoj.

Atilo

Kaj vi ĉiuj preparu vin korpe kaj spirite por la konsiliĝo! La trian tagon ni renkontiĝos en la preĝejo.

Kurteno

17a sceno



La interna spaco de la preĝejo Sankta Apolinario en Raveno. Meze, antaŭ la altaro staras trono sur podio. La reĝo sidas sur la trono. Tuj apude, ĉe lia maldekstro staras svelta junulo, reĝido Ĉaba. Dekstre staras Krimhildo. Ne malproksime de ŝi sidas papo Leono sur seĝo.

Fone hunaj gvardianoj. Antaŭ la reĝo flaĝoletisto ludas praajn melodiojn, Atilo atente aŭskultas la muzikon.

Dekstre malfone konversacias Soardo, Avieno kaj Trigecio.

Avieno

Kiu estas tiu svelta junulo maldekstre de la reĝo?

Soardo

Li estas reĝido Ĉaba. Hieraŭ vespere li alvenis el la fora Panonio.

Dum Atilo aŭskultas la muzikon, senvole li karesas la brakon de sia filo.

Trigecio

Kiel mi vidas, li amas lin.

Soardo

Li estas la plej kara por li.

Avieno

Ĉu la reĝo havas multajn infanojn?

Soardo

Multajn infanojn de multaj virinoj. Sed Ĉaba elstaras inter ili, ĉar lin naskis la plej kara edzino de la reĝo, Reka. Sed apenaŭ la infano pli-kreskis, reĝedzino Reka mortis. Inter teruraj cirkonstancoj.

Trigecio

Ho, kiel trista historio!

Soardo

Eĉ pli, se vi aŭdus ĝin.

Avieno

Mi volonte aŭskultos ĝin.

Trigecio

Mi ne ŝatas tristajn historiojn, sed se vi jam komencis, ne ĉesu, kaptano Soardo!

Soardo

Do aŭskultu! En mia patrujo Transilvanio, en la fama arbaro Rika, sur la bordo de la rivero Rika, sub giganta roko polviĝas reĝedzino Reka, forpasinta edzino de nia reĝo Atilo. Kaj krome du liaj filoj. Vi bezonas scii, ke la potenca reĝo de la hunoj, kiam li revenadis el militoj, li kutime retiris sin ĝuste tien, en la arbaron Rika. Tie li plej volonte loĝis. Samloke levigis la montosupro Hegyes. Sur ties plataĵo troviĝas la palaco de Atilo, en ĝi li loĝis kun sia edzino Reka kaj siaj tri belaj, belstaturaj filoj.

Foje reĝedzino Reka jungiĝis kvar ardajn ĉevalojn al sia orita, velure remburita kaleŝo kaj veturigis sin tra la arbaro Rika kun tiel kaporiska rapido, ke la vento nur muĝe postsekvis ŝin. Kiam la ĉevaloj kuris ĝuste sur la plataĵo Bikás, sovaĝa urso kuregis kun terura blekado kontraŭ la kaleŝo. La ĉevaloj teruriĝis, kaj tiel freneze ili ekgalopegis tra veproĵ kaj

arbustoj, ke la kaleŝo fine renversiĝis, kaj reĝedzino Reka falegis kune siaj tri belaj filoj en la ravinon de la rivero Rika, kaj ŝi mortis per la plej terura morto.

Trigecio

Ĝi estas vere trista historio. Kaj kio okazis al liaj filoj? Ĉu ankaŭ tiuj mortis?

Soardo

Mi do daŭrigas. Oni alportis la sciigon al Atilo, kaj alportis la kadavrojn de reĝedzino Reka kaj liaj du filoj, ĉar la tria, la plej malgranda, do reĝido Ĉaba saviĝis kvazaŭ per miraklo.

Avieno

Kiel tio eblas?

Soardo

Li restis pendanta sur arbobranĉo. Kvankam li estis tiam nur trijara, tamen tiel lerte li kroĉiĝis, ke li restis viva. Sed de tiu tempo li ne ekparolis. Pro la terura travivaĵo lia voĉo por eterne mutiĝis.

Trigecio

Vere dolora historio!

Soardo

Sed ĝi ankoraŭ ne finiĝis. Funebro kovris la kortegon de reĝo Atilo: mortis la reĝedzino, kiun la popoloj tiel forte amis. La reĝedzino kaj liaj filoj kuŝis tri tagojn sur la katafalko. Dume oni disportis la malĝojan sciigon ĉien, kie hunoj loĝas. Kaj la hunoj ekvojis de ĉie, kie ili loĝis: viroj, virinoj, infanoj, por ankoraŭfoje vidi ilin sur la katafalko. La kvaran tagon reĝedzino Reka kaj ŝiaj du, beltaliaj filoj estis sepultitaj. (*ĉirkaŭrigardas*) Sed kiel?

La du romianoj klinas sin pli proksimen, Soardo daŭrigas kun mistera mieno.

Dum la tago de la sepulto ĉiuj popoloj devis disiĝi for el la arbaro Rika, por ke neniu vidu kaj sciu, kie ili estos enterigitaj. Ĉiuj tri estis metitaj en grandega triobla ĉerko. La unua estis el brile pura oro, la meza el

neĝblanka arĝento kaj la ekstera el nigra fero. Tiam dek du enorme fortikaj sklavoĵ levis la trioblan ĉerkegon, portis ĝin sur la bordon de Rika, kaj tie ĝi estis enterigita sub tiu enorme granda rokopeco, kiu daŭre plu staras tie. Ankaŭ vi povas rigardi ĝin, se vi preterpasos.

Avieno

Dio mizerikorda!

Soardo

Tiel estis. Oni fosis profundegan kavon kaj soblasis la trioblan ĉerkon. Poste oni replenis la kavon kaj rulis sur ĝin tiun potence pezan ŝtonegon, por ke eĉ spuro ne restu videbla.

Avieno

Kompatinda reĝo Atilo!

Trigecio

Ĉu ankaŭ li ĉeestis?

Soardo

Jes, kompreneble. Li staris sur la plataĵo de Hegyes. Sola. Kaj ĉe lia vido la dek du fortegaj sklavoĵ fine faligis sin sur siajn glavoĵn, por konservi la sekreton por eterne. Reĝedzino Reka kaj ŝiaj du filoj povas trankvile dormi, ilian tombon neniu tuŝis. Kiam homoj trafis tien, la sovaĝbestoj de la arbaro jam voris la kadavroĵn de la dek du sklavoĵ, nek spuroĵ, nek cindroĵ restis post ili. Tiu giganta ŝtono ankaŭ nun troviĝas samloke, ie sur la bordo de Rika inter multaj similaj rokopecoj, sub ĝi pace dormas reĝedzino Reka kaj ŝiaj du filoj; ilian silentan ripozon neniu perturbas. La afero do okazis tiel. Al Atilo restis de ŝi nur ĉi unu filo, kiun li pli ŝatas ol kiun ajn. Ankaŭ tial, ĉar li estas la portreto de la forpasinta frato Buda de la reĝo. Tiu estis samtiel svelta, bluokula junulo kiel Ĉaba.

Trigecio

Ili estas ja parencoĵ.

Soardo

Nur bedaŭrinde li ne parolas.

Avieno

Kaj ĉu la reĝo neniam plu edziĝis?

Soardo

Neniam. Sed nun mi vidas tiel, ke li tre ambicias reedziĝi.

Avieno

Bela estas ĉi tiu burgundia junulino. Sed ĉu ankaŭ bona?

Trigecio

Evidentiĝos post la nupto.

Soardo

Kiel vi diras, s-ro Trigecio! Ni hunoj opinias, ke knabinoj estas feinoj kaj anĝeloj ĝis la edziniĝo, sed post la nupto la drako vekigis en ili kaj komencas spiri flamojn. Kelkaj povas blovi tiel grandajn flamojn, ke eĉ la ĉielo ektermas proe.

Avieno

Ĉu vi eble timas virinojn, komandanto Soardo?

Soardo

Mi ne timas eĉ la sepkapan drakon, tamen ne malutilas prudento. Pri la huniaj virinoj oni ne povas orientiĝi. Ĉu vi vidas tiujn orajn drakokapojn kun vaste malfermitaj buŝoj post la dorso de la reĝo?

Trigecio

Kvin drakaj standardoj staras tie, ĝuste tiel kiel en la tendaro estis.

Soardo

Ne hazarde. Tiuj iam estis ĉiuj nekompareble bru-buŝaj virinoj.

Avieno

Ĉu vi ŝercas?

Soardo

Ne ja, tio veras. Kiam unu el ili, danke al la Providenco (*rigardas al la ĉielo*) fine transloĝiĝis en la transmondon, kaj la Dio de la Tuto ekvidis ŝian muzelon en la ĉiela pordego, li tiom terurigis, ke li tuj repelis ŝin. Forbalau vin tuj! Vi ne perturbos la ĉielregnon per viaj langoklakaĉoj!

Kaj samtempe li ŝanĝis la maljunulinaĉon en drakokapon kun malfermegita buŝo. Kiu pum, refalis sur la teron, kaj huna militisto trovis ĝin kaj faris el ĝi flagornamon. Kaj tiel laŭvice el ĉiuj kvin.

Trigecio

Kia historio! Estas malfacile kredi ĝin.

Soardo

Ĉu malfacile? Se ĉi tiuj kvin drakokapaj flagoj tiutempe estus reŝanĝitaj en maljunulinojn, kaj estus stariĝintaj sur la kampo de Mauriacum, kie ni batalis kun vi, kaj malfermegintaj siajn grandajn babililojn, eligante kriaĉojn el siaj buŝaĉoj, la romianoj estus ĉiuj forkurintaj kiel leporoj. Eĉ nun ili kurus. Kaj oni ne bezonus murdadi ĝis malfrua nokto. Ankaŭ mi ne estus mortinta sur tiu batalkampo.

Avieno

Ĉu vi eble volas kredigi al ni, ke vi mortis? Kiel do vi povas esti ĉi tie?

Soardo

Nur tiel, ke mi estas mia ĝemelfrato. Kiu feliĉe restis hejme, kaj post kiam mi mortis, li anstataŭas min.

Trigecio

(*ekridas*) Vi azenigis nin, komandanto Soardo, sed ni ja meritis, ĉar ni sorbis viajn vortojn kiel infanoj fabelojn.

Soardo

Ĉu ne veras eble ĉiuj fabeloj? Ĉu vi ne kredas eble veraj la arbon, maturigantan orajn pomojn, Helenon la Feinon, la vidantan vinberon, la sepkapan drakon kaj la ĝisĉielan arbon, sur kies branĉoj oni povas veni en la supran mondon? Ĉu vi eble ne aŭdis pri reĝo Etana, kiu sur la dorso de grifo, per la ofero de sia propra femurkarno suprenflugis tien?

Avieno

Sed ĉio ĉi tio estas ja fabeloj!

Soardo

Kaj kie estas la limo inter fabelo kaj realo? Ĝis kie atingas la stelplena

ĉielo. Kaj kio troviĝas trans ĝi?

Trigecio

Kiu scias tion?

Soardo

Kio estas supre, estas malsupre, kaj kio estas malsupre, estas ankaŭ supre.

Avieno

Kion tio signifas?

Soardo

Mi ne scias, sed la reĝo kutimas ofte diri. Kaj li ĉiam scias, kion li diras.

Atilo

Soardo!

Soardo

Nu, vidu! Li jam vokas min. Jen mi, reĝa moŝto!

Atilo

Se vi ĉion elbabilis, kion vi tenas en la kapo, mi bezonus vin.

Soardo

Ankoraŭ restis kelkaj historioj, majesta sinjoro, sed tiujn mi retenos por aliaj okazoj.

Atilo

Stariĝu apud mi, ĉar nun okazos gravaj aferoj. Kaj mi petas vin, iom retenu vian langon.

Soardo

Mi provos, majesta moŝto, kvankam ne estos facile.

Atilo

Pri tio mi ne dubas.

18a sceno

Samloke. Atilo mangestas, gongo eksonoras. Enmarŝas hunaj militistoj kaj eminentuloj, la pastroj de la preĝejo kaj la popolo.

Atilo

(al papo Leono) Nu, sankta patro, alvenis la tempo de donacado. Permesu, ke unue mi pridonacu vin.

Li manordonas, kaj du hunaj soldatoj alportas kvarone falditan, iom flaviĝintan tolon, kiu estas fakte la "tuko de Torino".

Ili haltas antaŭ la papo.

Ĉu vi rekonas ĝin?

Leono

Se mi povus preni ĝin en la manojn...

Atilo

Donu ĝin al lia sankteco! Nun ĝi jam estas la lia.

La soldatoj donas la falditan tolpakon en la manojn de papo Leono, kiu stariĝas de sia seĝo, transprenas, ekzamenas ĝin.

Leono

Mi rigardas, vidas, tenas ĝin en miaj manoj... kaj mi sentas, ke ĉiuj miaj membroj tremas. Ĉu ĝi estus tio, pri kio mi pensas?

Atilo

Vi tenas la mortotukon de Jesuo en la manoj. En mia naskurbo Edeso oni gardis ĝin tra jarcentoj en intertempe forgesita kaŝejo, sed post la terura detruado de potenca superakvo, kiam oni restarigis la urbomurojn, ĝi feliĉe troviĝis en kaŝita kamero. La reĝo de Edeso konfidis ĝian gardadon al mia patro, ĉar li pli bone fidis la hunan gvardion de mia patro ol siajn proprajn homojn. De mia patro ĝi herediĝis al mia frato, kaj de li fine ĝi venis al mi, kaj mi nun jam konfidas ĝin al vi. Ĉu vi vidas la vizaĝon de la Savanto supre sur la tolo?

Leono

Mi vidas... Dio mia, Sinjoro mia!

Atilo

La *Mandyllion* venis en bonajn manojn. Ĝi ne povus esti donita en pli bravajn manojn ol la viaj, papo Leono. Vi estas inda posteulo de Sankta Petro, la unua episkopo de Romo. La beno de Dio estu sur vi kaj sur via laborado.

Leono

Mi faris voton pri malriĉeco, kaj nun fariĝis mia la plej valora donaco de la mondo. Mi zorgos pri ĝia gardado. Mi opinias, ke nek Raveno, nek Romo estos por ĝi sufiĉe sekura. Persone mi portos ĝin en la plej grandan urbon de la mondo, en Konstantinopolon.

Atilo

Mi ne ŝatas tiun urbon. Ĝi vekas en mi malicajn kaj dolorajn memorojn, Ĉi tiuj memoroj ŝiras en mi tiajn vundojn, kiuj eble neniam resaniĝos. Sed portu ĝin tien, se vi opinias tion bona. La iama Bizanco kreskis giganta urbo, kaj bone ĝi gardas siajn trezorojn. Mi donos al vi fortan gardon por la vojaĝo. Cent elektitaj arkistoj miaj eskortos vin sur via vojo, ĉar vi portos tian trezoron, kiu forte ŝirmendas, ĝis ĝi venos en sekurecon.

Leono

Dankon.

Li transdonas la tolon al la du hunaj gvardianoj, kiuj elportas ĝin.

Reĝa moŝto, decas, ke mi inde reciproku vian geston. Permesu al mi, ke mi, kiel pli frue mi jam menciis, transdonu al vi la donacon de la romaj kristanoj. Sed unue mi volas, ke vi ekkonu ĝian historion. Prospero Tiro!

Prospero Tiro enpaŝas kun granda pako da papirusaj ruloj kaj pergamenoj, kun la plumpaj okulvitroj sur lia kapo.

Bonvolu prezenti la dokumenton!

Tiro mallertas, lasas fali kelkajn rulojn, kaj dum li klinas sin por levi ilin, ĉiuj falas sur la plankon, li serĉadas inter ili, fine levas unu, malvolvas kaj komencas legi ĝin.

Fides quam unus promittit alii vult quod illus quod unus promittit alii servetur, naturalis namque ratio requirit ut omnes homines huius mundi dicant sibi veritatem... (levas la kapon) La fido, kiun unu promesas al alia, postulas, ke tio, kion unu promesas al alia, estu plenumita; ĉar la natura racio postulas, ke ĉiuj homoj de ĉi tiu mondo diru al aliaj la veron.... Pardonon, tio estas io alia.

Li forĵetas ĝin, fosserĉas, levas alian, malrulas, legas ĝin.

Aha! Via saĝo scias, kia gloro estas, se oni gloras iun pro lia nomo, sed kiom pli gloro estas pravi la grandecon de nia nomo per grandanima donacado. Vere, la dia providenco zorgis, ke vi ne prenu vane la nomon de Dio, kaj ĝi aranĝis tiel, ke de la vorto de pieco vi akceptu vian nomon kiel ion kultivendan kun devote pia bonvolemo. Pro ĉi tiu kaŭzo... Be, same ne estas la ĝusta.

Leono

Prospero...

Tiro

(nervoze fingrumas inter la dokumentoj) Mi serĉas, mi serĉas, sed ne nie mi ĝin trovas... *(elkaptas unu, malfermas, legas ĝin)* Sursum corda... *(forĵetas ĝin, kaptas alian, trian, ĉiam pli nervoziĝas)*

Leono

Prospero!

Tiro

Mi certe scias, ke ĝi estas ĉi tie... *(malvolvas ankoraŭ unu, lia vizaĝo sereniĝas)* Jen ĝi, trovita! Ĉu mi legu ĝin?

Leono

Se mi povas peti.

Tiro

Baltazaro tiam ekparolis jene: „Via infano naskiĝis el la volo de la Plejaltulo tiel, ke vi ne tuŝis viron. Li estas filo de la ĉielregno, samtempe frukto de via utero.” ”Ĉu vi scias tion?” ekmiris Maria. „Pri tio mi parolis al neniuj. Antaŭ la naskiĝo de mia filo vere mi ne konis viron, kaj ankaŭ nun mi ne havas edzon. Jozefo zorgas pri mi kaj pri Jesuo. Kion vi intencas fari?”

Baltazaro tiam rakontis, ke laŭ ilia kredo en la persono de Jesuo la animo de la prareĝo Nimrodo revenis sur la teron, kaj la misio de Jesuo estas, ke, kiel filo de Dio, li estu la gvidanto kaj savanto de la homoj. Melĥioro tiam elprenis el sia sako ilian sekretan trezoron, la kronon kaj transdonis ĝin al Baltazaro. “Ĝi estas la krono de Nimrodo”, diris Baltazaro devote kaj tenis la objekton antaŭ Maria.

Tiu kaj Jozefo klinis sin antaŭen, primiris la brilan orkronon, sur kies larĝaj, duonarkaj krucbendoj brilis grandegaj juveloj. Meze, kie la bendoj renkontiĝis, altiĝis ora kruco, finiĝanta per globetoj. La kapbendon, ornamitan same per juveloj, borderis vicoj de negblankaj perloj, kaj same perloborderoj ornamis la krucbendojn.

“Belega! Mi ankoraŭ neniam vidis tian belaĵon”, suspiris Maria. “Ĝi devas esti certe la krono de Nimrodo, ĉu?” demandis Jozefo emociite. “Jes”, respondis Baltazaro. “Nia ordeno gardas ĝin de la komencoj. Siatempe, antaŭ sia morto la granda Nimrodo konfidis ĝin al nia ordeno kun la admono, ke se alvenos la tempo, per ĉi tiu sankta krono ni investu la novan grandreĝon. Tiel postlasis ĝin al ni la unua reganto de la mondo, kaj ni de tiam fidele gardas la heredaĵon.”

Jozefo tiam demandis: “Kiom da jaroj vi gardas ĉi tiun sanktan kronon?” Baltazaro tiel respondis: “Ducent generacioj forpasis de tiam.” Tio signifas kvin mil jarojn laŭ Baltazaro. Jozefo tiam demandis: “Kaj kiomfoje vi devis investi sanktajn reĝojn post Nimrodo?” Baltazaro jene respondis: “Trifoje. Unuafoje dek generaciojn pli frue Gilgameŝon, reĝon de Uruk. Poste sepdek sep generacioj antaŭe la grandan Herakleson, kiun vi konas kiel Melkicedekon.” Tiam Jozefo

demandis: “Kaj la tria?” Baltazaro rigardis al la eta Jesuo. “Li estas tiu.”

Li rigardas al papo Leono.

Ĉu pri tio pensis via sankteco?

Leono

Pri tio. Dankon, Prospero, tiom sufiĉas. (*turnas sin al siaj du akompanantoj*). Bonaj sinjoroj, mi petas vin, alportu la keston!

Avieno kaj Trigeccio portas antaŭen la keston kaj demetas ĝin antaŭ papo Leono, kiu alpaŝas kaj levas ĝian kovrilon.

Majesta reĝo! En ĉi tiu kesto loĝas la sankta krono de via prapatro Nimrodo. En la nomo de la popolo kaj la senato de Romo mi volus proponi ĝin al vi. (*al siaj kunuloj*) Bonvolu levi ĝin!

Dum ili suprenfaldas la tekstilaĵon, kovrantan la kronon, lumo heligas la keston. La du romianoj singarde ellevas la kronon, similtantan al la hodiaŭa Sankta Krono⁸ kun la diferenco, ke ne estas ikonoj sur ĝi, anstataŭe sur la krucbendoj videblas po du gemoj. Ĝuste tiel kiel sur la samtempaj mozaikoj de la katedralo Sankta Apolinario Nova videblas ĉirkaŭ la kapo de Jesuo.

Papo Leono transprenas la Sanktan Kronon kaj iras kun ĝi antaŭ Atilon, kie li klinas sin antaŭ la trono kaj etendas la kronon al Atilo.

Majesta reĝo, ĝi apartenas al vi. Akceptu de mi la Sanktan Kronon de Nimrodo, Melkicedeko kaj Jesuo! Ĉu vi memoras, antaŭ nelonge mi petis vin, venki vin mem, kiu ja ĉiujn aliajn venkis. Vian skurĝon sentis maliculoj, nun sentu vian indulgon la petegantoj! Kaj vi aŭskultis min. La sinjoro de la mondo malfermis sian koron antaŭ la amo. Vi estas inda je la plej sankta donaco, vi estas inda paŝi en la heredaĵon de la plej grandaj reĝoj. Permesu, ke mi investu ankaŭ vin per ĉi tiu Sankta Krono, tuŝante ĝin sur via fiera frunto, sankta reĝo!

Atilo

Atendu!

⁸ Sankta Krono de la hungaroj: investa krono, donacita laŭ la tradicio de papo Silvestro la 2a en 1000 al la unua hungara reĝo Sankta Stefano.

Li stariĝas, prenas la kronon el la manoj de Leono kaj venas antaŭen, rigardas ĝin, plezuriĝas pri ĝi.

Post Nimrodo, Melkicedeko kaj Jesuo ankaŭ mi paŝos en la vicon de la sanktaj reĝoj... Kiaj kapturnaj perspektivoj! Ĉu povas esti pli majesta misio ol leviĝi inter la plej grandajn? Mi konkeris la tutan mondon. Reĝoj kaj popoloj terurite falsterniĝas antaŭ miaj piedoj kaj petegas por indulgo. Mi atingis ĉion, kion homo povas atingi, ne vivis antaŭ mi reganto, kiu estus pli potenca ol mi. Ne estis pli granda sinjoro de la mondo ol Atilo, kaj ankaŭ neniam estos, ĉar la homloĝata mondo nur unufoje genuiĝas humiligite antaŭ la plej granda.

Mi, Atilo, triumfa batalisto de Dio, jen mi estas! Kaj jen, mi tenas en miaj manoj la sanktan kronon de la mondo! Ĉi tie kaj nun mi altiĝos sankta reĝo. Laŭ la volo de Dio Atilo, ido de la potenca Nimrodo, kiu originas el la sango de la granda Magoro, filo de Bendeguzo, reĝo el la popolo de la hunoj kaj hungaroj atingis la plej altan pinton. Mi, Atilo, regas.

La hunoj eligas potence sonantajn huraojn, sed post tempo Atilo forgestas. Li turnas sin malantaŭen al papo Leono.

Kaj se ne vin mi elektas por la kronado?

Leono

Mi interkonsentis kun du miaj akompanantoj, ke se vi tamen ne aŭskultos mian peton, ili ĵetu la Sanktan Kronon en nepublika loko, kie neniu okulatestas, en riveron, kaj ili mem faligu sin sur siajn glavojn, por ne povi pludoni la sekreton. Kaj tiam la Sankta Krono de Nimrodo kaj Jesuo dormus tra jarcentoj aŭ pli longe sian dormon sub la ondoj de Sieve. Sed vi aŭskultis kaj komprenis min. Mi kredis tion. Mi ne nur kredis, mi sciis, ke la dia Providenco laŭnecese kondukis min al vi. Mi kredis kaj sciis, ke la Sankta Krono malfermos novan epokon en la mondo.

Atilo

(redonas la kronon al Avieno kaj Trigecio) Bonaj sinjoroj! Gardu ankoraŭ iom ĉi tiun Sanktan Kronon, se jam ankaŭ ĝis nun vi fidele gardis

ĝin! Mi devas prepari min por la renkontiĝo. Tenante ĉi tiun valoregan objekton en miaj manoj, ŝarĝo de jarmiloj peziĝis sur mia animo, kaj vi pravas, sankta patro, mi sentis, ke ankaŭ la sorto de venontaj jarcentoj nun decidiĝos. *(al Ĉaba)* Filo, venu pli proksimen! *(al Krimhildo)* Ildiko, ankaŭ vi venu ĉi tien! Mi volas, ke vi estu apud mi en ĉi tiu sublima horo. Alvenis la momento, kiam la sinjoro de la mondo devas elekti inter grandeco kaj sankteco.

Leono

Vi atingis la pinton, reĝo Atilo. Vi atingis tiun neimageblan alton, kie jam klare vidiĝas la kaŝitaj sekretoj de Dio, kie la grandeco kaj sankteco malkovras al vi sian veran vizaĝon. Bone vi vidas, nun vi devas elekti inter grandeco kaj sankteco. Viaj prauloj ĉiufoje bone elektis, ili iris senescepte la vojon de la sankteco, sekve de kio ili leviĝis inter la plej grandajn tiel, ke dume ili sobklinis sin al la plej malgrandaj. Vi, reĝo, kiel vi decidias?

Atilo

(prenas la manon de Ĉaba kaj Ildiko) La decido estas jam facila, ĉar mia koro kaj mia animo trovis la respondon, kiun ankaŭ mia menso sen duboj sekvas: mi rezignos pri la sankteco kaj grandeco, sed tiel, ke tiuj tamen ne perdiĝos.

Mallaŭta murmuro inter la hunoj.

Mi akceptas la sanktan kronon de mia praulo, la potenca Nimrodo, la kronon, kiu tuŝis la frunton de nia sinjoro Jesuo. *(kelkaj hezitaj huraoj)* Mi akceptas ĝin, tamen ne por mi, sed por la post mi venontaj. Mi volas kaj disponas tiel, ke anstataŭ mi la post mi sekvontaj reĝoj estu regantoj, konsekritaj senescepte per la Sankta Krono, dum hunoj kaj hungaroj vivos sur ĉi tiu tero. La popolo ne rekonu reĝo reganton sen la Sankta Krono, eĉ se la popolo, kun komuna volo, levas reganton sur ŝildo; se la Sankta Krono ne ĉeestas, la reĝa ofico ne estu valida.⁹ Mi volas egalrangan aliancon inter reĝo, popolo kaj Dio, kiun la sigelo de la Sankta Krono faros kompleta ĝis la fino de la tempo. La sankteco

⁹ Historia vero: neniu povis iĝi reĝo, sen esti kronita per la krono de Sankta Stefano.

kaj grandeco restu la nedividebla heredaĵo de la skita gento. Via misio, patro, kaj tiu de la vin sekvontaj papoj estu, ke ili protektu kaj subtenu la apostolajn reĝojn¹⁰ de mia popolo, firmigu ilian kredon sur la vojo al la vero. Ĉi tio estas mia ofero por mia amata frato kaj por la skita gento. Tiel mi volas, tiel estu!

Leono

Ĉu kun sincera koro kaj pura volo vi rezignas pri la potenco kaj gloro?

Atilo

Ĉu vi memoras, kion mi diris al vi pri la sangokontrakto de la skitoj? Se mi akceptus la Sanktan Kronon, mi estus pli granda kaj pli sankta ol eĉ vi, ĉar tiam mi estus ne nur la sinjoro de la mondo sed ankaŭ la kapo de la kristana eklezio, ja super mondereĝo ekzistas jam nur Dio. Sed mi faris kun vi sangokontrakton, Leono. Vi iĝis mia frato. Mi plenumos nian kontrakton. Mi rezignos pri la sankteco kaj potenco por via bono kaj por la feliĉo de mia gento. La kapo de la kristana mondo anoncos la mesaĝon de Dio el Romo.

Leono

Amen.

Atilo

Ĉu vi akceptas la aliancon inter mia popolo kaj la kristana eklezio, papo Leono?

Atilo

Mi akceptas.

Atilo

Ĉu vi faros ĵuron pri tio?

Leono

Antaŭ la sankta persono de Dio mi ĵuras en mia nomo kaj en tiu de la post mi venontoj, ke mi plenumos kaj plenumigos mian ĵuron, mi ne

¹⁰ Apostola: titolo de la unua hungara reĝo Stefano la Sankta (975-1038), kiu kristanigis la hungararon kaj patronis suverene la hungaran eklezion. Post ĉiuj hungaraj reĝoj ricevis ĉi tiun titolon.

iĝos ĵurrampanto, kaj protektos, subtenos kaj firmigos en la kredo la apostolajn reĝojn de via popolo, konsekrotajn reĝoj per la Sankta Krono samtiel, kiel la tri orientaj magoj konsekris per ĉi tiu Sankta Krono la Jesuon el Nazareto. Dio min tiel helpu!

Atilo

Restu fidela al via ĵuro ĉiutempe!

Soardo

Ĉu do ni kronos?

Atilo

Ne. Nun ankoraŭ ne.

Soardo

Kiam do, mia reĝo?

Atilo

Rememoru, Soardo, dum nia migrado sur la longega landvojo de la tempoj, kiom da popoloj ni vidis, kiuj kelkfoje aliĝis kunule al ni, kaj kelkfoje kontraŭbatalis nin, sed fine malaperis, fandiĝis kiel la printempaj neĝokampoj sur la deklivoj de Pamiro. Poste venis novaj, kaj tiujn pli novaj postsekvis. Sur la vastaj kampoj de Skitio, sub neĝkovritaj montopintoj, sur montetoj kaj en valoj milionoj kaj milionoj vivas sian vivon.

Ankaŭ ni, skitoj originas el multegaj triboj! Kiu scipovus kalkuli, el kiom da specoj de fadenoj estas teksita la tapiŝo de la hunoj kaj hungaroj? Kaj ĉi tiu nekalkulebla amaso estas senĉese moviĝanta. De jarcentoj ni iradas la senfinajn kampojn, ni serĉas nin mem, kiujn, migrante inter la ĉina Granda Muro kaj Atlantiko, eĉ en la senfinaj foroj ni ne trovis. La moviĝo fariĝis nia vivo. Ni elsvarmas kiel sovaĝabeloj printempe, inundas la mondon, poste ĉirkaŭ aŭtuno ni revenas, por printempe ree ekvoji.

Sed vi, Soardo, jam trovis vian patrujon sub la montoj de Transilvanio. Tie vi naskiĝis, kaj kiel ajn malproksimen vi venas kun mi, fine tien vi volas retiriĝi. Vi diris foje, vi ŝatus fine ripozi inter viaj ŝatataj rokoj.

Ankaŭ por mi estas memorinda tiu loko, ĉar tie mi estis la plej feliĉa kaj la plej malfeliĉa...

Soardo

Sinjoro!

Atilo

Nia tempo forpasis, Soardo. Nia vojo venis al sia fino. La gento de Hunoro kaj Magoro devas returniĝi hejmen en la vastan valon de la Karpatoj. Tie troviĝas tiu belega lando, mia frato en ĝia koro kun la urbo Buda. Tie regos baldaŭ la reĝoj de mia popolo. Jarcentoj forflugos kiel aŭtunaj folioj en tempesto, sed mi pensas en perspektivo de mil jaroj. Mi volas, ke la popolo de Hunoro kaj Magoro ĝuu la protekton de Jesuo, lasante siajn radikojn profunde en la teron, vivu sub la protekto de la Beata Virgulino en tiu benita lando.

Soardo

Majesta sinjoro! Ni do reiru hejmen al Sikambrio, mi volas diri al la urbo Buda, kaj tie ni aranĝu la kronadon. Ĉio troviĝas tie, kio necesas. Jen ĉi tie estas la Sankta Krono. Jen papo Leono kaj ankaŭ vi mem. Ĉi tie estas viaj fidelaj soldatoj, por akلامي vin. Reĝa moŝto! Ni iru hejmen!

Atilo

Ne eblas, Soardo, kelkajn aferojn ni ankoraŭ devas aranĝi. Ni devas remeti la Sanktan Kronon en ĝian dignon. Kaj ankaŭ al Jesuo ni devas doni satisfakcion. (*al Leono*)

Por tio, patro, mi petas vian helpon. Du trezoroj troviĝis en ĉi tiu sankta tago. Ni savis de la internaj militoj la kristanan Eŭropon, kiu ricevis krome du valorajn donacojn: la portreton de Jesuo kaj lian Sanktan Kronon. sed ĉi tie, en ĉi tiu preĝejo anstataŭ Jesuo nekonata, nudvanga junulo sobrigardas al ni de la muroj, kun glorklamo, pruntita de Budho ĉirkaŭ la kapo. Sed vi, patro, nun povas fari ordon. En via mano estas la pruvo: igu desegni sur la muroj de la preĝejoj la veran Jesuon, kaj desegnigu super lian kapon la Sanktan Kronon, per kiu la magoj sude, en Betlehemo sanktoleis lin, por ke la mondo fine vidu lin

tia sankta reĝo, kia reale li estis.

Leono

Mi faros tion, reĝa moŝto. Mi disponos, ke reĝo Jesuo en la kristana mondo estu ĉiam bildigata kun ĉi tiu belega krucbenda krono, kaj lia vizaĝo estu precize tia, kiel mi vidas ĝin sur ĉi tiu sankta tolo.

En la fono prilumiĝas la mozaika bildo de Jesuo el la 5a jarcento, kiel ĝi videblas en la preĝejo Sankta Apolinario Nova de Raveno.



Atilo

Do jam restis nur unu afero. *(etendas la manon por la krono, donas ĝin en la manon de Avieno)* Reĝido Ĉaba, genuiĝu!

*Ĉaba genuiĝas antaŭ sia patro,
Atilo levas la kronon super la kapon de sia filo.*

La forton por via misio, amata filo mia, mi donos al vi per ĉi tiu Sankta Krono. Kaj via misio estas, ke la armeon kaj ĉiujn, kiuj apartenas al ĉi tiu armeo, rekonduku hejmen en sekureco al la tero de Skitio, kaj tie setligu la popolon! Morgaŭ frumatene vi ekvojos. La beno de Dio estu sur vi kaj sur ĉiu membro de via popolo pere de ĉi tiu Sankta Krono, ĝis la mondo mondos.

Li transdonas la kronon al Soardo.

Mi konfidas al vi, komandanto Soardo, la trezoron de la skita nacio. Gardu ĝin fidele! Per tio mia misio finiĝis.

Soardo

Kaj kio okazos al mi, sinjoro?

Atilo

Mia vojo kondukos alidirekten.

Soardo

Tiam ankaŭ mia vojo kondukos tien.

Atilo

Ne, Soardo, via tasko estas helpi al mia filo ĉe la rehejmeniĝo. Vi konas lin de lia infanaĝo, sur viaj genuoj li lernis rajdi. Vi estos lia buŝo, sed vi estos ankaŭ lia ŝildo kaj lia glavo. Mi konfidas al vi mian filon. Sur la vojo hejmen vi konas ĉiun arbuston kaj ĉiun rokon. Vi precize scias, kie embuskas aŭdacaj rabistoj, kaj vi scias ankaŭ, kiel neniigi ilin. Kun via komando la armeo revenos sen malfeliĉo en la basenon de Karpatoj. (*rigardas al Ĉaba*)

Mi ne scias, kio bolas nun en la animo de mia filo. Da doloroj devas esti tie ankoraŭ multe. Povas esti, ke Ĉaba ne haltos sub la rokopintoj, sed pluiros en la fundon de Skitio. Sed via misio finiĝos ĉe la piedo de la monto Hargito. Vi povos decidi libere, ĉu vi iros kun li, aŭ returnos vin al via vilaĝo.

Li paŝas pli proksimen, brakumas Soardon.

Vi estis mia servisto, mia plej bona batalisto, poste iĝis mia plej bona komandanto, kaj nun mi jam adiaŭas vin kiel amikon. Dio benu vin, amiko! Portu hejmen, al la viaj, la memoron de malnova amiko, de la huno Atilo.

Li paŝas al Ĉaba, ankaŭ lin brakumas.

Ĉaba! Vi plej kara! En vi mi vidas la vizaĝon de mia karmemora frato Buda, kaj ankaŭ mian bravegan patron mi vidas en vi. Vi estas mia heredanto. Mi konfidas al vi Hunion kaj Panonion. Gardu kaj ŝirmu vian popolon sur la vojo.

Ĉaba

(per la dekstra mano karesas la vangon de sia patro kaj ekparolas hake ante la vortojn) Pat-ro...

Atilo

(emociite brakumas sian filon) Vi ekparolis, filo! (rigardas al la ĉielo) Dankon, Dio mia! (kisas la vangojn de Ĉaba) Do preparu vin por la vojaĝo!

Ĉaba elrapidas.

La sinjoro de la mondo atingis la zeniton de sia vivo, plenspiris siajn pulmojn per la pura kaj glaci-malvarma aero de la alto kaj nun demandas sin, kien plu? Li ne irus volonte malsupren, se li jam foje venis tiel alten, kaj supren ne kondukas vojo. Li rezignis pri ĉio, kio estis grava por li. Li rezignis pri la potenco, pri la bona famo, pri la gloro kaj pri la ebrio de la regado. Sed li ne sentas sin, kvazaŭ li estus mortinta, plie kiel renaskita.

Fone aperas Edekono kun la ora kaliko en la mano, singarde alŝteliĝas.

Edekono

Reĝa moŝto...

Atilo

Mondepoko finiĝis kaj nova komenciĝis. La suno de la antikvaj imperioj subiris. Ni, hunoj vidis, kiel la unua popolo de la mondo, la naskiĝon de la urbo Ur, ni surgrimpis la ĝisĉielan turon, ĉeestis ĉe la leviĝo de Egiptio kaj vidis ankaŭ ĝian dekadencan, ni vidis la floradon de la fenicoj, poste de la etruskoj, ni vidis la oran epokon de la greka arĥipelago, ni defendis Trojon kontraŭ la helenoj, unu el ni estis reĝido Pariso, kiu fuĝis kun sia popolo al Sikambrio, ni batalis kontraŭ la lasta antikva imperio de Romo, al kiu mi donis la finofaran ponardopuŝon. Mi kredis, ke ni, skitoj estas pli fortaj ol la tempo, ĉar la libereco, flamanta en nia animo estas nevenkebla kaj eterna. La antikvaj imperioj konstruis turojn, fortikaĵojn, murojn, sed ni jam estis ĉi tie antaŭ ili, ĉar la neŝanceblebla libereco estis nia forto. Ĉinio levis potencon muron kontraŭ ni, sed ni transflugis super ĝi kaj priridis la obstaklon. Ni pri-

ridis la forlasitajn piramidojn kaj la praajn urbojn, sinkintajn en sablo. Kun la senzorgeco de infano ni galopadis nevenkeble sur la kampoj de Eŭropo kaj Azio.

Li silentas.

Sed tio nun jam finiĝis. Hirtaharaj triboj ŝteliradas tra la eŭropaj arbaroj, okupas al si teritoriojn kaj adoras siajn kunprenitajn diojn skulptitajn. Ni ridas pri ili, sed ĉi tiuj triboj iam iĝos popoloj kaj iliaj setlejoj landoj. Lime de du mondepoko mi estus la lasta mondoreĝo... Sed mi ne estos! Per mia ofero mi savos la post mi venontajn jarmilojn. Estu donita al ili indulgo. La hunoj kaj la hungaroj venas hejmen...

Li ĵetas rigardon al Edekono.

Kion vi volas, servisto?

Edekono

Reĝa moŝto! Ĉi tiun belan oran kalikon sendas papo Leono la Granda signe de sia danko kaj petas, ke el ĝi vi trinku la vinon en la plej bela tago de via vivo!

Atilo

(transprenas la kalikon, enrigardas) Bela kaliko sed malplena. Kiel mi trinku el ĝi?

Edekono

(el sia ŝultrosako elprenas ledbotelon) Mi havas ĉe mi vinon, majesta reĝo, permesu al mi verŝi al vi!

Atilo

Kiu speco de vino ĝi estas?

Edekono

De bona speco. Rigardu, mi trinkas el ĝi, por ke vi vidu, mi regalas vin per bona vino. Ne venenita.

Li trinkas el la botelo, poste verŝas en la kalikon.

Je via sano, reĝa moŝto!

Guntero

Ne trinku el ĝi, reĝo! Tiu kaŝruza vulpo ŝpinas malicaĵon!

Leono

Reĝo, la kaliko estas ne de mi.

Guntero

Krimhildo! Faru ion!

Krimhildo

(ĝis nun staris paralizite, nun ŝi subite ekŝrikas) Veneno!

Edekono

Ĝi ne estas veneno, princino, sed bona vino! Ĉi tie ĝi produktiĝis sur la montetoj. Vi vidas, mi trinkas el ĝi! *(trinkas el la ledbotelo, poste etendas ĝin al Krimhildo)* Ĉu mi povas regali vin?

Krimhildo

(piedfrapas la teron) Forportu ĝin!

Voĉoj el la amaso

Ne trinku el ĝi! Atentu, reĝo Atilo! Veneno! Atentu! Ne trinku el ĝi!

Krimhildo

Majesta sinjoro, mi petegas vin...

Atilo

(donas la kalikon en la manon de Edekono kaj turnas sin al Krimhildo) Kara! Ne zorgu! Nia sorto jam estas en la mano de la ĉielanoj. Okazos, kio devas okazi. *(ĉirkaŭrigardas)* Mi sentas la fortan odoron de lavendo. Kio ĝi devas esti?

Krimhildo

Ve, mi ne scias. Tio zorgigas min, sinjoro.

Edekono

Reĝa moŝto, kio okazu al la vino?

Atilo

Nu, kio estu, servisto?

Edekono

Reĝa moŝto! Ĉi tiun belan oran kalikon sendas papo Leono la Granda signe de sia danko kaj petas, ke el ĝi vi trinku la vinon en la plej bela tago de via vivo! Ĉi tiun belan oran kalikon sendas papo Leono la Granda signe de sia danko kaj petas, ke el ĝi vi trinku la vinon en la plej bela tago de via vivo! Ĉi tiun belan oran kalikon sendas papo Leono la Granda signe de sia danko kaj petas, ke el ĝi vi trinku la vinon en la plej bela tago de via vivo! *(la tekston fine li jam apenaŭ kompreneble balbutas)*

Atilo

(prenas la kalikon kaj levas ĝin alten) Alvenis la tempo *(trinkas)*. Ne timu!

19a sceno

Samloke. Ĉiuj staras paralizite. Tiam aperas sur la scenejo mago Gencelo. Vestita en la sama neĝblanka robo kiel komence de la teatraĵo. Li enpaŝas, dum la aliaj rigidiĝas senmovaj. Li haltas meze, levas la kapon kaj observas, kiel ĉaro, muntita el maldikaj kaj brilaj stangoj, sinkas malrapide. La krucopunktoj de la stangoj glimas, la elstaranta apogstango, kiel ĉe la konstelacio, laŭlonge estas iom rompita. La ĉaro havas du sidilvicojn. Kiam la ĉaro atingas la plankon, la mago paŝas al Atilo kaj Krimhildo, tuŝas ilin, sekve de kio ili reviviĝas.

Gencelo

Mi estas Gencelo, la lasta membro de la ordeno de la magoj. Kiel via vojo atingis la finon, Atilo, tiel finiĝas ankaŭ la mia. Mi venis, por porti vin ambaŭ per ĉi tiu ĉaro en la ĉielregnon. Via ofero, reĝo, trovis akcepton.

Atilo

Vin mi vidis en mia sonĝo! Vi estis, kiu alvenis sur nubodorso kaj manvokis min. Nun mi jam komprenas. Ni devas iri, vi, Gencelo, estas ja la pordogardisto de la ĉielo. Vi enlasas la animojn antaŭ la Grandan Dion. Ĉu ankaŭ nin vi kondukos al Li?

Krimhildo

Ho ve, mi ne kunportis vojaĝkostumon... Reĝa moŝto, prenu mian manon! ...Guntero, adiaŭ! Nur por momento... sed ne, ni ekiru!

Gencelo

Sidiĝu kuraĝe! Ne timu! Mi estos bona koĉero por vi.

Atilo kaj Krimhildo sidiĝas en la ĉaro, Gencelo okupas la koĉeran sidilon.

Do ek, antaŭen. Ĉaro-stelaro, ek! Antaŭen! Supren, supren inter la stelojn!

La ĉaro malrapide leviĝas kaj malaperas en la alto.



20a sceno

Samloke.

Leono

(kiam li ekparolas, ankaŭ la aliaj reviviĝas) Kvazaŭ mi estus songinta. Reĝo Atilo kaj lia vivkunulino leviĝis en la ĉielon en ĉaro, ĉarpentita el steloj.

Soardo

Ĝi estis la ĉaro de Gencelo.

Tiro

Aktuale, jam de tridek mil jaroj ĝia oficiala nomo estas *Ursa Maior*.

Guntero

Tio estas Granda Ursino.

Soardo

Por ni Ĉaro de Gencelo, kaj ankaŭ tio ĝi restos, dum skito vivos sur la tero. *(rimarkas la elŝteliĝantan Edekonon)* Haltu, vi kanajlo! Nun mi dehakos vian kapon!

Leono

Lasu lin, komandanto Soardo! Lasu lin kuri, li portu kun si la malbenon de la malico, li pentofaru ĝis la fino de sia vivo, kaj riparu, kion li kulpis kontraŭ reĝo Atilo. Kuru, homo, kaj ne plu peku!

Edekono foriras. Leono venas antaŭen.

En la jaro kvarcent kvindek du de la Sinjoro, Atilo, la reĝo de la skitoj, sinjoro de la hunoj, hungaroj, medoj, danoj, tjurkoj, ĝermanoj kaj gotoj kaj ankoraŭ centoj da popoloj forloĝiĝis ĉe la flanko de sia edzino Krimhildo. La homoj plektis legendojn ĉirkaŭ la figuro de la plej granda reganto de la mondo. Kiuj pli frue timis lin, disvastigis, ke li mortis matene de sia nupto, ĉar sango ekfluis el lia nazo kaj sufokis lin. Laŭ aliaj li estis venenita, troviĝis eĉ tiaj, laŭ kiuj rekte lia nova edzino etendis al li la venenan kalikon.

Sed mi ne kredas tiajn mensogajn fabelojn, ĉar mi vidis, ke reĝo Atilo leviĝis en la ĉielan imperion, kie li ĝuas la regaladon de pli granda reĝo ol li. Lian volon mi plenumos ĉiurilate, kaj se alvenos la tempo, kaj el la popolo de reĝo Atilo leviĝos inda reganto, la kristana eklezio estos tie, por konsekri lin per la Sankta Krono por la bonfarto de lia popolo kaj por la gloro de Dio. Kaj la Sankta Krono protektos ĉiun sian subulon, ĝis la mondo ekzistos. Kaj nun akceptu mian papan benon!

Li levas la brakojn por beno.

En la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito: gardu vin la Plejpotenca Dio! Ŝirmu vin la ĉiam senmakula Sankta Maria, la bonema Sankta Virgulino de la skitoj! Kio okazis, okazis. Iru kun paco!

Amaso

Al Dio estu danko!

Soardo

(viŝas siajn larmoplenajn okulojn) Mi kredas esti vidinta ilin en la ĉaro de Gencelo. *(paŝas al la papo kaj transdonas al li la kronon)* Mi konfidas ĝin al vi, papa moŝto. Nun nia patrujo estas tro trablovata de sovaĝaj ventoj, ĝi ne estus ĉe ni en sekureco. Sed se ĉio rearanĝiĝos, ne forgesu nin kaj la Sanktan Kronon. Nun mia koro tre doloras, mi ne eltenas pli da ŝarĝoj, kaj de morgaŭ multaj taskoj atendos min. Dio benu vin, papo Leono! *(ekiras, sed post kelkaj paŝoj returnas sin)* Ĉu vi vere komprenas la lingvon de la birdoj?

Leono

Ankoraŭ ne, sed volonte mi lernus ĝin, se troviĝus iu, kiu instruus ĝin al mi. La beno de Dio akompanu vin, kune kun via popolo, komandanto Soardo.

Soardo

(malfermas la brakojn al la ĉielo) Dio benu vin, reĝo Atilo! Ni, ĉi tie, malsupre... ekiras hejmen!

Kurteno

Notoj

Laŭ la rilataj esploroj la renkontiĝo de la huna reĝo Atilo kaj papo Leono la 1a en la jaro 452 efektive okazis. La papo, kun siaj du kunuloj, ekskonsulo Avienus Gennadius kaj eksprefekto Memmius Aemilius Trigetius iris renkonte al la huna armeo, marŝanta kontraŭ Romo, por peti indulgon al la urbo. Armitoj ne akompanis ilin. Tre magraj datumoj konserviĝis pri la renkontiĝo, kiu laŭ ĉiuj vidpunktoj okazis nekutime. Estas nome malfacile akcepti, ke la ankoraŭ ĉiam plu potenca huna armeo, kiu unu jaron pli frue sur la kampo de Mauriacum (kaj ne Catalaunum), ne malproksime de la hodiaŭa Troyes en Francio, finrezulte venkis en feroca batalo la armeon de la Romia Imperio, ja unu jaron poste ĝi sen kontraŭstaro enmarŝis Italion, nun neatendite haltas, por ke ĝia estro aŭskultu la humilan peton de maljuna ĉefpastro, poste rezigninte pri sia origina intenco, nome okupi Romon, kontraŭ ĉiuj atendoj ĝi returnas sin kaj marŝas hejmen.



Tamen okazis ĝuste tio. Oni klarigas la kialon interalie per tio, ke kiam reĝo Atilo renkontiĝis kun la papo, li teruriĝis de vizio, en kiu li vidis proksimiĝi en nubo maljunan barbulon, kiu minace skuis al li sian glavon. Laŭ la ĝenerale konata legendo Atilo vidis Sanktan Petron mem.

La okcidenta publika opinio konsentas pri ĉi tiu interpreto, kiu eĉ Rafaelon inspiris, kiu preskaŭ mil jarojn poste, en 1514 pentris sian bildon *Atilo antaŭ Romo*. Li vidis Atilon barbara konkeranto, kaj ne tre ĝenas lin en lia opinio la fakto, ke sangomana barbaro, kia Atilo estis priskribita, kial terurigu pro la vizio de iu de li eble ankaŭ ne konata kristana sanktulo, plue estas apenaŭ verŝajne, ke la plej potenca reganto de la epoko, venkinta en centoj da sangaj bataloj, timiĝas de unu minuto al la alia kiel dekjara pucelo.

Feliĉe, dokumento el la 18a jc., *Acta Sanctorum* recitas la petegantajn vortojn de papo Leono la 1a, kiuj laŭvorte aŭdiĝas en la dramo. El ĝi elguŝigeblas, ke la vero estas tio, ke, kompreneble, la situacion ankaŭ plu regis Atilo, kiun la papo deviĝis petegi por indulgo. Estas do pli ĝuste konkludi, ke la decido, ŝanĝinta la ĝistiaman murdan intencon de la huna reĝo kaj instiginta lin returni sin, rekondukeblas al multe pli profundaj kialoj. La teatraĵo temas pri tiuj kialoj.

Kiel scenejon de la renkontiĝo nomas dokumentoj, 1200 jarojn pli malfruaj, la kunfluron de la riveroj Mincio kaj Pado proksime al Verono, kiu tamen estas tro malproksime de Romo, eĉ ankaŭ de Ravenna. Estas neverŝajne, ke la terurita papo estus veturinta tiel malproksimen renkonte al la huna armeo, entrepreninte kvincent-kilometran, almenaŭ unusemajnan vojaĝon surĉevalo. La scenejo de la renkontiĝo devis esti prefere inter Ravenna kaj Romo, Ravenna ja estis jam subiĝinta al Atilo. Mi elektis la kunfluron de la riveroj Sieve kaj Arno, rekte ĉe la hodiaŭa Pontassieve. La proksimeco de ĉi tiu loko al Romo (200 km) kaj Ravenna (90 km) jam motivas la terurigan reagon de la papo, kaj donas klarigon ankaŭ pri tio, kial li ne konsideris necesa la starigon de armita eskorto. Li do ne devis iri tro malproksimen. Kaj ĉar la agado rilatas al la teritorio de la hodiaŭa Toskanio, mi donis la rajton al Atilo, kun elstara lingvosento, parolanta plurajn mondlingvojn, transbapti la regionon anstataŭ la ankoraŭ latinecnoma Tuskio al la hodiaŭa nomo Toskanio.

Dum la renkontiĝo de reĝo Atilo – aŭ kiel retoro Priskos skribas en siaj notoj, la grandreĝo de la skitoj – kun papo Leono en 452, Atilo devis aĝi ĉirkaŭ kvardek jarojn. Laŭ fonto li plenkreskis en Engadi, kiun katolika leksikono situigas sub la nomo Engedi al la okcidenta bordo de la Morta Maro, 17 kilometrojn for de la fama fortikaĵo Massada. Ĝi

estas la plej seka punkto de la tero. Ĉi tiu regiono for de l' mondo, apenaŭ povis esti la naskoloko de la skita grandreĝo, krome multaj diskutas ankaŭ la nomon, tial mi elektis Edessa, kiu bone konformas al la legendo, ĉar ĉi tie estis malkovrita ĉirkaŭ la tempo de nia agado la fama tolo de Torino aŭ *Mandyllion*. Kiel stature fortikan, malhel-haŭtan, brunokulan, fieran viron kun decidema aspekto priskribas Atilon la heleno, kiu samtempe kun estimo rimarkigas, ke dum la festeno, al kiu ankaŭ li ricevis inviton kun siaj kunuloj, “al la ceteraj barbaroj kaj al ni oni priservis fajnaĵojn sur arĝentaj pletoj, sed al Atilo oni alportis nur viandon sur lignopleto, nenion alian. Li estis modera en ĉiuj ceteraj rilatoj, al la gastoj nome oni donis orajn kaj arĝentajn pokalojn, dum li uzis lignopokalon. Ankaŭ lia vesto estis simpla, nur laŭ pureco ĝi diferencis de tiuj de la ceteraj, nek la glavo sur lia flanko, nek la rimembukoj de liaj barbaraj botoj, nek la mordaĵo de lia ĉevalo estis tiaj, kiel tiuj de la ceteraj skitoj, tio estas sur ili estis nek oro, nek gemoj, nek ajnaj multekostaĵoj.”

Kaj kvankam la plej multaj kronikoj priskribas lin kiel sangomanan, senindulgan kaj barbaran konkeranton, iu observo de la akraokula Priskos dum festenado atestas pri io alia: *Li rigardis antaŭen kun senvibra mieno, kaj ni ne vidis, ke li dirus aŭ farus ion ridante, nure li karesis la vizaĝon de sia plej juna filo Ernak. Kiam tiu envenis kaj stariĝis apud li, liaj trajtoj mildiĝis. Kiam mi miris, ke lin ne interesas liaj aliaj filoj, nur al ĉi tiu li altiriĝas, barbaro, sidanta apud mi kaj parolanta la aŭsonian* (Ausonia estas eta komunumo en la regiono Lacio, do la viro, sidanta apud Priskos, parolis supozeble latine. – A.B.), *atentigis min, ke mi nenion disbabilu el tio, kion li estas dironta, kaj li klarigis, ke la aŭguristoj antaŭdiris al Atilo, ke lia gento pereos, sed en ĉi tiu filo ĝi pluvivos.*

Kiun retoro Priskos nomas Ernak, tiu estas fakte reĝido Csaba [ĉaba]. Ĉi tiun amoplenan rilaton inter la patro kaj la filo mi klopodis miamaniere reliefigi.

Papo Leono la 1a, t.e. Sankta Leono la Granda, naskita en Toskanio, aĝis dudek jarojn pli ol Atilo, kaj dek jarojn li postvivis la hunan grandreĝon. Li jam sidis dudek du jarojn sur la trono de Sankta Petro, kiam li renkontiĝis kun Atilo. Oni opinias pri li, ke dum sia pli ol dujardeka regado li firmigis la kristanan mondon, kaj baze fortikigis la

potencon de Romo. Dum la tempo de nia historio li do aĝis sesdek jarojn, tempo el hodiaŭa vidpunkto ne tro longa, sed tiutempe ĝi konsideriĝis jam longa vivotempo, tial nomas lin la tridek-jarumanta Szoárd [soard] “maljuna oĉjo”.

Ankaŭ la militestro Szoárd estas reala figuro, lin primemoras la kroniko de Simon Kézai¹¹, en kiu li detale rakontas la rabekskursojn de huna taĉmento, estrata de Szoárd, nome ke ili venis eĉ en la plej malproksiman ekstremon de la “itala boto”: *En la samaj tagoj, kiam Ethele pasigis la tempon en Ravenna, Szoárd, la ĉefkapitano de la militistaro de la reĝo, eniras kun la huna armeo en Apulia kaj Calabria, kie li detruas la urbojn Reggio kaj Catona, en kiu Cato naskiĝis kaj loĝis, poste pripredinte Terra di Lavoro, li rabadis kun sia taĉmento ĝis la monto Cassino, kaj de tie li revenis triumfe al Ravenna. Farinte ĉion ĉi, reĝo Ethele revenis al Panonio. Kaj post kiam li laŭ la priskribo disvastigis sian potencon, regante okcidente kaj oriente, norde kaj sude, larĝe kaj longe, li turnadis en sia menso, transŝipinte la maron, konkeri Egiption, Asirion kaj Afrikon.*

Kaj se iu en la vortoj de Szoárd rekonas la pensmanieron de la sikuloj¹², tio, se rigardi lian devenon, estas ne la kaprico de la hazardo.

La burgunda princino Kriemhild estas protagonisto de la *Kanto de la Nibelungoj*; la ĝermana legendo detale priskribas, ke fine de siaj peripetioj Kriemhild venas en la kortegon de la huna reĝo, kiu edzinigas ŝin. Mi ne sekvis la sangan rakontolinion de la *Kanto de la Nibelungoj*, mi opiniis, ke la princino, funebranta sian murditan amaton tra dek tri jaroj, meritis la feliĉon de la nova amo en la brakoj de reĝo Atilo kaj inverse.

La burgunda reĝo Gunther en la epopeo *Kanto de la Nibelungoj* donis edzine sian fratinnon Kriemhild al reĝido Siegfried preze de tio, ke helpe de siaj mirakloefikaj trezoroj Siegfried akiros al li edzine la nevenkeblan amazonon Brünhild. Kvankam tio okazis, post komplikaj insidoj, helpe de aliuloj, Gunther tamen mortigas la heroan Siegfried, por iĝi fruktouzanto de la mirindaj Nibelung-trezoroj, trovitaj de Siegfried.

¹¹ Kézai, Simon (13a jc.): hungara kronikisto. Li verkis sian *Gesta Hunnorum et Hungarorum* (Agoj de la hunoj kaj hungaroj) en 1282-83.

¹² Sikuloj: hungarlingva popolgrupo en Transilvanio (nun en Rumanio).

Fine, laŭ invito de reĝo Atilo li veturas kun siaj fratoj, ĉefoficuloj kaj multnombra akompano al Hunio por la la nupto de Kriemhild, kie ili ĉiuj viktimiĝas al la sanga venĝo de Kriemhild, kiun ŝi ĵurpromesis plenumi pro la murdo de sia edzo Siegfried... Nu, el tio ne multo transiĝis en la dramon. Pli ĝuste, nenio. Princo Gunther estas el nia vido iom senhelpa, sed baze bonintenca fremdulo, kiu volus feliĉige edziniĝi sian ĉiam plu belaspektan fratiron.

Csaba estas grava rolulo de la teatraĵo malgraŭ tio, ke nur unu vorto aŭdiĝas el lia buŝo, ankaŭ tiu nur hakate. Li estas stelo de la hungara legendaro, ankaŭ ĉi tie li devis aperi. La tragedion de lia patrino Réka konservis sikula popolfabelo (el la kolekto de Elek Benedek), kiun mi adaptis al la dramo.

Pastron aŭ magon Göncöl [gencel], por diri honeste, ni, hungaroj forgesis, kio estas ne inda de nia flanko, hodiaŭ vivantaj hungaroj. Por nia senkulpigo estu dirite, ke la konstelacion Granda Ursino ankaŭ nun ni nomas Ĉaro de Göncöl, kvankam ni ne scias, kial. La revivigo de lia figuro tial estis ankaŭ speco de historia devo.

En la disputo inter la arianoj kaj katolikoj la teatraĵo flankiĝas unuence al la katolikoj, ja ne eblus alimaniere. Por la priskribo de la konflikto ni povas danki interalie majstron Kézai.

Kaj post kiam reĝo Ethele konkeris Aquilea, de tie li iris al Friuli, kie, okupinte la urbon Concordia, li marŝis en la longobardian margrafujon, kie li metis sub sian regon Treviso, Brescia, Cremona, Verona, Mantua, Bergamo, Milano, Alessandria, Ferrara kaj plurajn aliajn urbojn de Italio. Poste, dum li proksimiĝis al Ravenna, la ĉefepiskopo de la arianoj, havanta en la menciita urbo abundon da trezoroj kaj investinta dek du kardinalojn el sia konfesio kontraŭ la volo de la Apostola Seĝo, sekrete, sen la scio de la civitanoj, enlasis la hunojn en la urbon, la katolikojn, kiuj tie estis pli bonhavaj, igis mortigi per la hunoj, promesante al Ethele, ke se li sekvos lian konfesion kaj persekutos la kristanojn, li ĵetos la urbon Romo kaj tutan Italion kaj Afrikon sen peno de lia popolo, senpage sub lian regadon. Kaj post kiam Ethele, prefere por la regado ol pro la menciita konfesio, inkliniĝis, la romianoj, rekoninte la danĝeron, kiu povus ekesti el tio por la kristanoj, sendis la roman papon Leono al Ethele, petante ke tiu eliru ekster la limojn de

la lombardoj, por kio ili pagos al li imposton, kaj kiam li deziras, ili donos al li armeon. Rapidinte do kun la granduloj de la lando kaj la roma pastraro al Ethele, ili kunvenis intertrakti sur la kampo antaŭ Ravenna. Kaj dum ili interparolis surĉevale, kaj al la reĝo ŝajnis malfacila akcepti, kion la romanoj deziras, dum la interparolado li hazarde ĵetis rigardon al la ĉielo, kaj super sia kapo li vidis ŝvebi viron en la aero, kiu svingadis glavon en la mano kaj minacis, ke li dehakos lian kapon. Je tio, terurite en sia koro, li akceptis ĉiujn petojn de la romanoj, kaj tiel la papo kun ĝojo returnis sin al Romo, kaj Ethele marŝis al Ravenna. Kie kaptiginte la arianan ĉefepiskopon kun ĉiuj liaj sekvantoj kaj komplicoj, li elprenis sesdek mil markojn da oro el ili kaj poste li igis ĉiujn buĉi.

Kvankam ankaŭ la kroniko de Simon Kézai spegulas la okcident-eŭropan koncepton, kaj li same vidas reĝon Ethele (Atilo) histerie timida, la citaĵo tamen konfirmas, ke Atilo decidis en la disputo inter la arianaj kaj la katolikoj per la forto de sia armeo favore al la katolikoj.

Mi konsideris necesa ankaŭ referenci al la sinkretismo de la hunoj, finsume ja kial la hunoj ankoraŭ ne povus aventuradi inter la diversaj spiritalaj tendencoj pli ol kvincent jarojn antaŭ la unua hungara reĝo Sankta Stefano, tamen, kiel ankaŭ la teatraĵo montras, reĝo Atilo fermis ĉi tiun epokon kun unusenca decidemo favore al la katolikoj. Kaj la distingita omaĝo de la hunoj kaj la hungaroj al la Beata Sinjorino¹³ estas tia, ĝis nun efikanta fakto, kiun neniu diskutas.

La ŝanĝo el la ariana al la katolika konfesio okazis ĉirkaŭ ĉi tiu tempo sur la mozaikoj de la preĝejo Sankta Apolinario Nova (Sant'Apollinare Nuovo), krome kun komika rapideco, sekve de kio la figuroj de la arianaj sanktuloj, forcenzuritaj per la transkomponado de la mozaikeroj, estis ja nerevenigeble kovritaj per kurtenoj, pendigitaj inter la kolonoj, tamen la elvidiĝantaj manoj de la sanktuloj ie-tie konserviĝis sur la kolonoj.

¹³ Beata Sinjorino nomiĝis la patrin-dio de la prahungaroj, kiu nomo poste identiĝis kun Sankta Maria.



Same arthistoria fakto estas, ke tiutempe aperis super la kapo de Jesuo la krucbenda aŭreolo kun gemoj kaj perloj, tio estas la sankta krono, kaj de tiam iĝas ĝenerale deviga la karakteriza, barbohava Jesu-vizaĝo.

En la konservita raporto de retoro Priskos Edekon estas duvizaĝa figuro. Li gvidis, en akompano de Flavius Orestes, la delegacion de la huna reĝo en la jaro 449 al Konstantinopolo, kie imperiestro Theodosius kaj lia ĉefministro persvadis lin murdi Atilon. Sed Orestes ekhavis suspekton, kaj pro timo Edekon mem malkovris la konspiron al Atilo, tiel li sukcesis savi sian vivon. Lia filo estis Odoaker, kiu depuŝis la lastan romian imperiestron de la trono, kaj dum mallonga tempo fariĝis reĝo de Italio. Jen du fragmentoj pri Edekon el la raporto de retoro Priskos:

...ree alvenis kiel delegito la skita Edekon, kiu havis en la milito elstaran rolon, kaj kun li Orestes de romia origino, kiu loĝis ĉe la rivero Sava sur la tero de Panonio, subigita, laŭ la kontrakto kun la okcident-romia militestro Aëtius, al la barbaro. Alveninte en la imperiestra palaco, Edekon transdonis la leteron de Atilo, en kiu tiu akuzis la romianojn pri la fuĝintoj, kaj minacis, ke li uzos armilon, se li ne rericevos ilin, kaj se la

romianoj ne ĉesos kulturi la teron, kiun li de ili konkeris.

Pli interesa estas la alia fragmento:

Oni voĉlegis la leteron al la imperiestro, post kio Edekon foriris kun Vigilas, interpretinta la buŝan mesaĝon de Atilo, kaj iris en liajn konstruaĵojn, por renkontiĝi kun la ĉefministro de la imperiestro, Chrysaphios, kiu havis tre grandan influon. Edekon primiris la grandiozecon de la reĝaj konstruaĵoj; kaj apenaŭ li komencis babili kun Chrysaphios, la interpretisto Vigilas malkaŝis, ke Edekon admiras la imperiestran palacon kaj laŭdas la riĉecon de la romia kortego. Chrysaphios respondis, ke ankaŭ Edekon povus havi ortegmentan domon kaj havaĵon, se li fortunus sin de la skitoj kaj transparentianigus al la romianoj. Post la respondo, ke servisto ne rajtas fari ion tiam sen la aprobo de sia mastro, la kastrito demandis, ĉu Edekon havas liberan aliron al Atilo kaj ian potencon ĉe la skitoj. Edekon respondis, ke li statas en proksima rilato kun Atilo, kiu konfidis sian gardon, kune kun aliaj, por ĉi tiu celo elektitaj eminentuloj, ĝuste al li; nome alterne, ĉiu en sia fiksitaj tago gardas armita Atilon. La kastrito denove diris, ke se Edekon ĵuros al li, tiam li diros al li ion tre bonan; kaj tial estus plej bone, se li vizitus lin sen Orestes kaj la aliaj delegitoj por tagmanĝo. Edekon promesis, iris por la tagmanĝo al la kastrito, kaj ĉi tie, kun la perado de la interpretisto Vigilas, ili donis al si la manon kaj ĵuris, Chrysaphios pri tio, ke li parolos ne por la damaĝo sed por la plej granda utilo de Edekon, kaj Edekon pri tio, ke li ne elbabilos, kion la kastrito estos al li dironta, eĉ se li ne solvus sian taskon. Tiam Chrysaphios prezentis al Edekon, ke li povus ekhavi feliĉan vivon kaj grandegan havaĵon, se reveninte al la skitoj, li mortigus Atilon kaj transirus al la romianoj. Edekon entreprenis tion, sed li diris, ke por ĉi tiu tasko li bezonas monon, ne multan, nur kvindek funtojn da oro, kiun li disdonos al la sub li servantaj soldatoj, por ke ili laŭnecese helpu lin en la afero.

Mi kredas, Gunther ne troigis, kiam li nomis Edekon “kaŝruza vulpo”.

Mi ne scias, kia homo estis Athanasios, sed proksimume li devis esti tia, kia mi priskribis lin; laŭ Kézai nome la hunoj, laŭ instigo de la ĉefepiskopo de Ravenna, ekstermis la katolikojn en la urbo, kaj ne estas pridubinde, ke se lia plano sukcesus, oni farus la samon ankaŭ en Ro-

mo, kaj tiam la hodiaŭa Eŭropo praktikus la arianan kristanismon. Do, laŭ mi ĝin trafis ne granda damaĝo. Ke Eŭropo mil jarojn post tio restis katolika, tio estas la merito de la granda huna reĝo Atilo, kaj mi ne volas fordisputi tion de li.

Prosper Tiro estis efektive sekretario de papo Leono, li laboris en la roma kancelario, al li ni ŝuldas la precizan priskribon de la renkontiĝo. Mi baldaŭ ekŝatis ĉi tiun kuriozan figuron, klopodis bildigi lin kun amo.

La figurojn de la du emeritaj romiaj politikistoj Avienus kaj Trigetius mi formis de unu jam ne vivanta amiko mia, kiu estis precizema, samtempe eleganta, simpatia homo kun siaspeca humuro. Ankaŭ ili estas realaj roluloj, kiuj havis la kuraĝon, pli precize kredeble nur ili havis la kuraĝon, akompani la papon al la kortego de la hunoj. Pri Avienus oni notis, ke unu el liaj prauloj havis la nomon Corvinus¹⁴, kaj ĉar ĉi tiu praulo havis ankaŭ panoniajn bienojn, kun referenco al li la familio Hunyadi alprenis la nomon Corvinus, sekve pere de la persono de Avienus ekzistas en la historio iu kaŝita hungara fadeno, kiu tamen restos ĝisfine ankaŭ kaŝita en la dramo.

(Onidire Marcus Valerius Messala akceptis antaŭ batalo en 349 a. Kristo la defion de barbara batalisto kun giganta staturato. Sed antaŭ ol ili interpuŝiĝis, neatendite korvo alflugis el arbokavo, sidiĝis sur la kasko de la barbaro kaj per sia beko tiel impete atakis ties okulojn, ke la barbaro blindiĝis, kaj tiel la romiano facile venkis lin. Memore pri ĉi tiu evento ricevis Marcus Valerius Messala la kromnomon Corvinus. Ĉar la familio Hunyadi konsideris Marcus Valerius Messala Corvinus, disponanta ankaŭ pri panoniaj bienoj, kiel unu el siaj prauloj, ankaŭ ili nomis sin Corvinus, kaj en ilia blazono aperis ankaŭ la korvo kun ringo en sia beko. Ĝin poste ankaŭ la blazonoj de polaj aristokrataj familioj alprenis, kaj la triumfon de Marcus Valerius Messala Corvinus anoncas ĝis hodiaŭ la gablo de la Krasinsky-palaco en Varsovio.)

Mi klopodis enkonstrui en la tekston laŭeble pli da originalaj citaĵoj. Ekzemple Priskos notis la galoplenan respondon de Atilo, kiam la romia delegito komplimentis al li per tio, ke li transdonas la bondezirojn de la senato kaj la popolo de Romo, al kio la huna reĝo respondis: “La

¹⁴ Mathias Corvinus (1443-1490): naskita HUNYADI Mátyás, Matiaso la 1a, hungara reĝo, filo de la fama militestro János Hunyadi.

sama bono okazu al la romianoj, kian ili deziras al mi.” La saman deziron papo Leono peras al Atilo, kiu respondis precize tiel, kiel siatempe tio efektive okazis. Aŭ kiam ekzemple Szoárd diras al papo Leono ĉe ilia unua renkontiĝo, ke li estas konata al li, ĉar sur monero li vidis lian grandan terpom-nazon, tiam li konfuzis lin efektive kun la bizanca imperiestro Leono la 1a (401-474), kiu laŭ la atesto de la tiutempaj moneroj havis vere sufiĉe grandan, terpomecan nazon.



Disvastiĝinta milita rimedo de la “arkostreĉaj” popoloj estis la drakokapa flago, kiun pli malfrue ankaŭ la romianoj transprenis. Ĉi tiuj flagoj funkciis kiel ventosakoj, kaj helpis al la batalistoj, kiuj, konante per ili la ventodirekton, flugigis laŭe siajn sagojn. En iu eseo (*A római sárkányos zászló, a draco*, Belvedere, 2011) György Palotás skribas: *Origine stepaj rajdistaj popoloj evoluigis la drakoflagon, sed poste ankaŭ partoj kaj sasanidoj faris la samon. La rajdantaj arkistoj bezonis uzi ĝin pliparte por difini la ventodirekton. En pluraj sud-rusiaj trovejoj, tiel ankaŭ en Kosika en la regiono de la Malsupra Volgo, estis elfosita arĝenta vazo, kies ornamaĵo bildigas batalon de sarmataj viroj. Unu el la plej famaj bildigoj videblas sur la ostolamenoj el Orlat: la batalsceno figuras eksterordinare vivosimile la ekipaĵon de persaj, peze kirasitaj rajdistoj. Nia plej preciza fonto pri la drakoflago de*

skita, eventuale sarmata origino estas la laboro 137 de L. Flavius Arrhianos, Taktike. Arrhianos opinias, ke la uzo de la drakoflago kiel ventosako ligiĝis unue al la sarmatoj en la rajdista batalmaniero.



La aŭtoro publikigas ankaŭ parton el la jam citita Arrhianos:

Ili atakas kun diversaj flagoj, ne nur la romianoj sed ankaŭ la skitoj, por ke ilia rajdista sturmo estu pli bunta kaj samtempe pli timiga. La flagoj de la skitoj estas samlongaj drakoserpentoj sur alte tenataj lancoj. Ili faras ĝin el kunkudritaj, farbitaj ĉifonoj, ties kapo kaj korpo, tute ĝis la vosto, similas al serpento, por ke ĉi tiu inventaĵo ŝajnu eĉ pli timiga. Kiam la ĉevaloj tute ne movas sin, vi povas vidi pleje nur la pendantajn, buntajn ĉifonojn, sed kiam oni faras rajdistan sturmon, pro la trapasanta vento la flagoj tiom ŝvelas, ke ili plej similas al sovaĝbestoj, kaj iom ili ankaŭ siblas, kiam pro la tro granda movado ŝtorma vento trablovas ilin.

Kun unu el tiuj drakokapaj flagoj ludis reĝo Atilo, kiam li rememoris la batalon ĉe Mauriacum.

Unu el la gravaj roluloj en nia historio estas la hungara Sankta Krono, pri kiu, pli precize, pri kies persono – se akcepti la tezon de la doktrino pri la Sankta Krono – la teatraĵo asertas, ke ĝi pretiĝis en la senlima tempo antaŭe, nome por la legenda grandreĝo Nimrod, post kies morto ĉi tiu mistika sankta relikvo venis pere de la mezopotamiaj magoj ankaŭ al Jesuo mem, kiun la magoj kiel etinfanon konsekris sankta reĝo per ĉi tiu sankta

krono. Ĉi tiu nekutima aserto estas prenita ne el la aero, en la ĉapitro pri la krono en mia libro *Aurum Coronarium* mi detale citas la libron de la jezuita teologo Ágoston Teres *Biblio kaj astronomio*, en kiu li skribas en la subskribo de la reliefo sur p. 77:

Ĉi tiu reliefo estas konservata en la Laterana Muzeo sub Sancto dogmatico no. 104, ties pli malnova versio en la Vatikana Muzeo (310-320). Jehezkel aŭguras pri la releviĝo de mortintoj en Babilono: en lia maldekstra mano estas librorulo, atributo de la profetoj. Per la ligno de la vivo en sia dekstra mano li revivigas la mortintojn: ili reviviĝis kaj stariĝis sur siaj piedoj, tre, tre granda armeo. (Jeh 37,1-10) Malantaŭ li staras la juna Daniel. De ilia flanko proksimiĝas la magoj, kaj en la fono videblas dezertaj kameloj. La unua mago montras al la sespinta stelo, kiu estas la signo de la konjunkcio kaj monogramo de Jesuo Kristo (I kaj X interkroĉitaj), en lia maldekstra mano li tenas la oran kapornamon (aurum coronarium). La dua alportas korbon da incenso, la tria mirhon. Laŭ Ireneus per la transdono de la ora diademo ili agnoskas la reĝan potencon de Jesuo, la incenso esprimas iliajn estimon kaj oferon al lia Dia Moŝto, kaj la mirho rilatas al la Savanto, kiu venis en la mondon, por oferi sin por la mortema homa gento (Adv. Haer. 3,9)

Sur alia sarkofago, same el la 3a jc., sidante sur trono, Maria akceptas la magojn, alportantajn la oran diademon. (La artefakto, farita inter 320 kaj 350 kaj nomata dogma sarkofago, estis malkovrita en la 19a jc. en la roma baziliko Sankta Paŭlo, kaj konservata nuntempe en la Vatikana Muzeo.



La interesaĵo de la reliefo estas, ke la supra vico komenciĝas per la kreo de la unua homparo, dum la malsupra per la magoj, alvenantaj al Maria. Estas okulfrappe, ke kaj la Di-Patro, simbolanta triobligite la Trinuon, kaj Maria sidas sur samforma trono, simbolanta la rangon de reganto. La unua el la magoj etendas al la infana Jesuo objekton, specon de florkrono, dum la du aliaj alportas potetojn, entenantajn iajn spicojn. Arĥeologoj trovis plurajn reliefojn de simila temo el la 3a jc.



La ora diademo, t.e. la *aurum coronarium*, kiun en la tempo de la imperiestroj Severus estis devige donenda donaco al la reganto, en la legendo estas identa kun la hungara Sankta Krono, kaj tial ĝi havas ŝlosilan rolon en la dramo. Ni ne scias, kie ĝi kaŝiĝis, nur tion, ke tiutempe ĝi devis aperi, ĉar ĝi tuj fariĝis rekvizito de la kanonizitaj Jesu-bildigoj.

La krucbendaj glordumoj, ornamitaj per orborderitaj gemoj kaj perloj, kiuj fakte estas kronoj, kongrue identas kun la hodiaŭa Sankta Krono, kvankam tiutempe la hodiaŭ konataj ikonoj ankoraŭ ne troviĝis sur ĝi. La bazon de la legendo donas ĉi tiu kongruenco.



La historio de *Mandylion* aŭ la mortotuko de Torino estas almenaŭ tiom eks-cita. Ĉi-koncerne tuj troviĝas iom da mistifiko, ĉar la superakvo inundis Edessa laŭ la enciklopedioj nur en 525, t.e. 73 jarojn post la granda renkontiĝo, kaj nur tiam troviĝis la mortotuko dum la rekonstruado de la urbomuro. Tamen mi opiniis, kial la inundo ne povus okazi iom pli frue, ja en tiu tempo ankoraŭ ne estis tiel preciza temporegistrado. Aliflanke estas fakto, ke proksimume por ĉi tiu tempo dateblas tiu fenomeno, ke la

ĝis tiam necertaj Jesu-ikonoj tutmonde fariĝas unuecaj, sekvante kun anatomia precizo la trajtojn de la viro, videbla sur la tuko.

La unuan tagon de la semajno Maria Magdalena venis frue, dum estis ankoraŭ mallume, al la tombo, kaj vidis la ŝtonon prenita for de la tombo. Ŝi do kuris kaj venis al Simon Petro kaj al tiu alia disĉiplo, kiun Jesuo amis, kaj ŝi diris al ili: "Oni forprenis el la tombo la Sinjoron, kaj ni ne scias, kien oni lin metis." Eliris do Petro kaj la alia disĉiplo, kaj iris al la tombo. Kaj ambaŭ ekkuris kune; kaj la alia disĉiplo kuris antaŭen pli rapide ol Petro, kaj unua alvenis al la tombo; kaj kliniĝinte, li enrigardis, kaj vidis la tolaĵojn kuŝantajn; tamen li ne eniris. Kaj poste venis Simon Petro, sekvante lin, kaj eniris en la tombon; kaj li vidis la tolaĵojn kuŝantajn, kaj la viŝtukon, kiu estis sur lia kapo, ne kuŝantan kun la tolaĵoj, sed kunvolvitan en aparta loko. Tiam eniris do la alia disĉiplo, kiu unua alvenis al la tombo, kaj li vidis kaj kredis." (Jn 20,1-8)

La kaŝitan paralelon inter Arthur kaj Attila – pri kiu ne menciigas en la dramo – endiskutigis inter aliaj angla pentristo de la 19a jc., siro Edward Coley Burne-Jones, kiam li pretigis sian grandegan, ĉ. tri metrojn altan, ses kaj duono da metrojn longan pentraĵon en 1881 kun la titolo *The Last Sleep of Arthur in Avalon* (La eterna endormiĝo de Arthur en Avalon), en kies centro videblas la hungara Sankta Krono antaŭ la kuŝanta Arthur.



Por ni ĉi tiu pentraĵo estas interesa, ĉar ĝi bildigas la hungaran kronon en frua stato sen la sanktobildoj, nur kun la perlo-kadritaj gemoj, kiel ĝi ankaŭ en la epoko de Attila aspektis kiel frukristanaj ikonoj atestas tion.

Fine mi volas diri kelkajn vortojn pri Buda (Bleda). Estas malfacile trovi klarigon pri tio, kial la belega ĉefurbo de Hungario portas de la komencoj la nomon de tiu el la du princoj, al kiu ligiĝas neniu evento, pri kiu ni scias nenion krom tio, ke post kampanjo al Balkano li malaperis, laŭ kelkaj tial, ĉar lia pli juna frato Attila mortigis lin. Kiel ajn tio okazis, nenio klarigas, kial la hungara ĉefurbo portas ne la nomon de la pli sukcesa frato, reĝo Attila, kiu fariĝis granda reganto. En ĝermanaj kronikoj ja skribiĝas pri Etzilburg, t.e. Atil-kastelo, proksimume sur la teritorio de la nuna Obuda (Malnova Buda), sed tio restigis nenium spuron en la hungara memoro. La dramo trovas klarigon por ĉi tiu kontraŭdiro. Ĉi tiu estis la parto, ĉe kies verkado mia koro doloris.





Bencsik, András (1951) estas konservativa ĵurnalisto, verkisto, influisto. Aŭtoris multajn radiodramojn, librojn kun politikaj, historiaj, scifiaj, literaturaj enhavoj. La dramo *Atilo, reĝo de la skitoj* bildigas la historian renkontiĝon de papo Leono la 1a kaj la huna reĝo Atilo en nova prilumo, kun aliro legendeca, enplektante la same novan vidmanieron pri la hungara reĝa krono. Li skribas: *Mi celis ne malkovri definitivan kaj*

nerefuteblan veron, nur malfermi vojon, kiun trairinte, aliaj esploristoj eble alvenos kun la tempo la kompletan veron. Tamen jam nun mi certas, ke la hungara Sankta Krono kaŝas en si tiajn sekretojn, kiuj rekondukas al la komenco de la tempoj, kiam la prauloj de la hungararo venis en nedisigeblan interligon kun la Plejaltulo. La mirige intensa respekto de la hungaroj al la Sankta Krono konstituas eble la plej gravan pilieron de la kolektiva nacia konscio de la hungaroj. Ne troigo estas aserti, ke en nia rilato al la Sankta Krono ni trovis ĉion tion, kio estas eksplicite hungara. Ne ekzistas alia popolo sur la Tero, kiu rilatus kun tiel neŝancelebla respekto, zorgema amo kaj omaĝo al ekzistanta artefakto. Ni aldonu, al artefakto, kiun la plimulto de la nacio ĝis hodiaŭ rigardas kiel vivantan personon, eĉ reganton. Estis logike, ke tempe retropasante sur ĉi tiu vojo, mi venu al reĝo Atilo.

* * *

Papo Leono la 1a:

En la jaro kvarcent kvindek du de la Sinjoro, Atilo, la reĝo de la skitoj, sinjoro de la hunoj, hungaroj, medoj, danoj, tjurkoj, ĝermanoj kaj gotoj kaj ankoraŭ centoj da popoloj forloĝiĝis ĉe la flanko de sia edzino Krimhildo. La homoj plektis legendojn ĉirkaŭ la figuro de la plej granda reganto de la mondo. Kiuj pli frue timis lin, disvastigis, ke li mortis matene de sia nupto, ĉar sango ekfluis el lia nazo kaj sufokis lin. Laŭ aliaj li estis venenita, troviĝis eĉ tiaj, laŭ kiuj rekte lia nova edzino etendis al li la venenan kalikon. Sed mi ne kredas tiajn mensogajn fabelojn, ĉar mi vidis, ke reĝo Atilo leviĝis en la ĉielan imperion, kie li ĝuas la regaladon de pli granda reĝo ol li. Lian volon mi plenumos ĉiurilate, kaj se alvenos la tempo, kaj el la popolo de reĝo Atilo leviĝos inda reganto, la kristana eklezio estos tie, por konsekri lin per la Sankta Krono por la bonfarto de lia popolo kaj por la gloro de Dio. Kaj la Sankta Krono protektos ĉiun sian subulon, ĝis la mondo ekzistos. Kaj nun akceptu mian papan benon!